

KAZIMIERZ BEIN

LITERATURA ANTOLOGIO
(REPRESO)

POLA ESPERANTO-ASOCIO

VARSOVIO – 1977

Handwritten text, possibly a title or header, appearing faintly in the upper center of the page.

Handwritten text, possibly a title or header, appearing faintly in the middle of the page.

Handwritten text, possibly a signature or date, appearing faintly in the lower center of the page.

Kazimierz Bein

LITERATURA ANTOLOGIO
/represo/

Pola Esperanto-Asocio
Varsovio - 1977



H. S I E N K I E W I C Z

LA LANTERNISTO

I

Foje okazis, ke la lanternisto en Aspinvall, proksime de Panamo, perdiĝis oni ne sciis kie. Ĉar tio ĉi fariĝis en ventego, oni supozis, ke la malfeliĉulo aliris ĝis la rando de la ŝtonega insuleto, sur kiu staras la lanterno, kaj ke li estas forportita de ondo. Ĉi tiu supozo estis tiom pli kredebla, ĉar en la sekvinta tago oni ne trovis lian ŝipeton, starintan en la ŝtonega kavo. Liberiĝis la ofico de la lanternisto, kiun oni devis anstataŭigi kiel eble plej baldaŭ, ĉar la lanterno havas grandan gravecon por la loka movado kaj por la ŝipoj, irantaj de Nov-Jorko Panamon. En la golfo de Moskitoj estas tre multe da sablaĵoj, inter kiuj la vojaĝo estas malfacila eĉ tage, kaj preskaŭ neebla nokte, precipe en la nebuloj, kiuj ofte leviĝas de ĉi tiuj akvoj, varmigataj de la tropika suno. La lumo de la lanterno estas tiam la sola gvidanto por la multaj ŝipoj. La klopodo trovi novan lanterniston falis sur la konsulon de Unuigitaj Ŝtatoj, loĝantan en Panamo kaj la klopodo estis ne malgranda, unue, ĉar oni devis trovi posteulon en la daŭro de dek-du horoj; due, la posteulo devis esti tre konscienca homo, sekve oni ne povis akcepti ĉiun; fine entute mankis kandidatoj por la ofico. La vivo sur la turo estas tre malfacila kaj tute ne plaĉas al la homoj de l'sudo, kiuj amas la liberan vagadon. La lanternisto estas preskaŭ malliberulo. Ekster la dimanĉo li tute ne povas forlasi sian ŝtonegan insuleton. La ŝipeto de Aspinvall alportas al li, unu fojon en la tago, nutraĵon kaj freŝan akvon; poste la alportantoj tuj

forveturas, do sur la tuta duonhektara insuleto estas neniu. La lanternisto loĝas en la lanterno; tage li faras signojn, pendigante diverskolorajn flagojn laŭ la montroj de la barometro; vespere li eklumigas la lanternon. Tio ĉi ne estus granda laboro, se oni ne devus suriri pli ol kvarcent ŝtupojn por atingi la supron de l'turo, kaj la lanternisto devas iatempe fari ĉi tiun vojaĝon kelke da fojoj en unu tago. Entute tio ĉi estas monaĥejo vivo, eĉ pli ol monaĥejo — ermita. Do tute ne estas mirige, se s-ro Izaak Folcembbridge havis nemalgrandan klopodon trovi konstantan posteulon de l'mortinto, kaj oni povas facile kompreni lian ĝojon, kiam plej neatendite la posteulo aperis samtage. Li estis jam maljuna homo, sepdekjara aŭ pli multe, sed vigla, kaj rekta; li havis movojn kaj teniĝon de soldato. Liaj haroj estis tute blankaj, lia vizaĝo estis bruna, kiel ĉe la kreoloj; sed, se oni juĝas laŭ la bluaj okuloj, li ne apartenis al la homoj de l'sudo. Lia mieno estis malgaja kaj sopira, sed honesta. De l'unua rigardo li plaĉis al Folcombridge. Restis sole ekzameni lin; komen-

— „De kie vi estas?”

— „Mi estas polo.”

— „Kion vi faris ĝis nun?”

— „Mi migradis.”

— „La lanternisto devas ami resti en la sama loko.”

— „Mi bezonas ripozon.”

— „Ĉu vi servis ie? Ĉu vi havas atestojn pri honesta registara servado?”

La maljuna homo eltiris el sia brusta poŝo ĉifonon, senkoloriĝintan, similan al deŝiraĵo de malnova standardo, disvolvis ĝin kaj diris:

— „Jen estas la atestoj! Tiun ĉi krucon mi ricevis en la trideka jaro. Ĉi tiu dua estas hispana de la karlista milito; la tria estas la franca ordeno „Légion d'honneur,” la kvaran

mi ricevis en Hungarujo. Poste mi batalis en Unuigitaj Ŝtatoj kontraŭ la sudanoj, sed tie oni ne donas krucojn. Jen estas la atesto."

Folcombridge prenis la paperon kaj komencis legi.

— „Hem! Skavinski? Tio estas via nomo? ... Hem! Du standardoj, akiritaj propramane en atako per la bajoneto ... Vi estis kuraĝa militisto!"

— „Mi estos ankaŭ honesta lanternisto."

— „Oni devas tie suriri la supron de la turo ĉiutage kelke da fojoj. Ĉu vi havas sanajn piedojn?"

— „Mi trairis pleny."

(Pleny oni nomas grandegajn stepojn inter Nov-Jorko kaj Kalifornio).

— „All right! Ĉu vi scias la maran servadon?"

— „Tri jarojn mi servis sur balenŝipo."

— „Vi provis multajn profesiojn."

— „Mi sole ne ĝuis trankvilon."

— „Kial?"

La maljuna homo levis la ŝultrojn.

— „Tia sorto ..."

— „Sed vi ŝajnas tro maljuna por esti lanternisto!"

— „Sir!" diriĝis subite la kandidato per kortuŝita voĉo. „Mi estas tre laca kaj elturmentita. Vi vidas, ke mi travivis multe. La ofico estas unu el tiuj, kiun mi plej varmege deziris ricevi. Mi estas maljuna, mi bezonas ripozon! Mi devas diri al mi: tie ĉi vi sidas, tio estos via haveno. Ho, Sir! tio ĉi dependas sole de vi! Duan fojon tia ofico eble ne troviĝos plu. Kia feliĉo, ke mi estis en Panamo! ... Mi petegas vin ... Ho, Dio mia! Mi estas, kiel ŝipo, kiu pereos, se ĝi ne eniros havenon ... Se vi volas feliĉigi maljunan homon ... Mi ĵuras, ke mi estas honesta, sed ... mi havas jam sufiĉe da migrado ..."

La bluaj okuloj de l'maljunulo esprimis tiel profundan

peton, ke Folcombridge, kiu havis bonan, simplan koron, sentis sin tuŝita.

— „Well!” diris li. „Mi akceptas vin. Vi estas la lanternisto.”

La vizaĝo de l'maljunulo ekbrilis pro neesprimebla ĝojo.

— „Mi dankas.”

— „Ĉu vi povas forveturi la turon hodiaŭ?”

— „Jes.”

— „Good bye do . . . Ankoraŭ unu vorton: pro ia ajn preterlaso en la servado vi estos eksigata.”

— „All right.”

Samvespere, kiam la suno ruliĝis al la alia flanko de l'terkolo kaj post radiantata tago fariĝis nokto sen krepusko, la nova lanternisto estis jam sur la turo, ĉar la lanterno ĵetis kiel ordinare garbojn da blindiganta lumo sur la akvon. La nokto estis tute kvieta, silenta, vere tropika, saturita de luma nebulo, kiu formis ĉirkaŭ la luno grandan, ĉielarke koloritan rondon kun molaj neprecizaj bordoj. Sole la maro bol's, ĉar leviĝis la alfluo. Skavinski staris sur la balkono, tuj apud la grandegaj fajrujoj, simila de malsupre al nigra punkteto. Li penis ordigi siajn pensojn kaj analizi sian novan situacion. Sed lia pensado estis tro sub premo, ol ke tio povus regule fariĝi. Li sentis ion, kion sentas persekutata sovaĝa besto, kiam ĝi fine kaŝis sin de l'kapto sur nealirebla ŝtonego aŭ en kaverno. Venis fine por li la tempo de trankvilo. La sento de l'sendanĝereco plenigis lian animon per ia nepri-skribebla ĝuo. Nun li povis sur ĉi tiu ŝtonego vere moki la antaŭan vagadon, malfeliĉon kaj nesukceson. Li estis vere kiel ŝipo, al kiu la ventego rompis la mastojn, deŝiris la ŝnurojn kaj velojn, kiun ĝi ĵetis de l'nuboj ĝis la fundo de l'maro, kiun ĝi batis per la ondoj, sur kiun ĝi ŝprucigis ŝaŭmon — kaj kiu tamen atingis la havenon. La rememoroj pri tiu ĉi ventego rapidis en lia cerbo kune kun pensoj pri trankvila estonteco, kiu komenciĝas. Parton de siaj mirigaj

aventuroj li mem rakontis al Folcombridge, sed li ne diris pri miloj da aliaj. Li havis malfeliĉon: kiom da fojoj li metis ie tendon kaj ekflamigis fajron por loĝi konstante, ia vento eltiris la lignajn najlojn de l'tendo kaj lin mem forportis por lin pereigi. Rigardante nun de l'tura balkono la lumigitajn ondojn, li rememoris pri ĉio, kion li suferis. Li batalis en kvar partoj de l'mondo kaj en sia migrado provis preskaŭ ĉiujn metiojn. Laborema kaj honesta, li ne unu fojon kolektis monon kaj ĉiam perdis ĝin malgraŭ ĉiuj antaŭvidoj kaj malgraŭ la plej granda singardemo. Li estis elfosisto de oro en Aŭstralio, serĉanto de brilantoj en Afriko, registara pafisto en Orienta Hindujo. Kiam li fondis bienon en Kalifornio, pereigis ĝin la sekeco; li provis la komercon kun sovaĝaj gentoj, loĝantaj en centra Brazilo: lia flosio estis rompita sur Amazono, kaj sen armilo kaj preskaŭ nuda li vagis en arbaroj dum kelke da semajnoj, nutrante sin per fruktoj kaj ĉiumomente minacata de la danĝero pereii en la buŝego de sovaĝa besto. Li konstruis forĝan laborejon en Heleno en Arkanzaso kaj — la laborejo forbrulis dum la granda brulado de l'urbo. Poste en la Ŝtonegaj Montoj li falis en la manojn de indianoj kaj nur mirakle estis liberigata de kanadaj pafistoj. Li servis kiel ŝipano sur ŝipo, kiu veturadas inter Bahia kaj Bordeaux, poste kiel kroĉilisto sur balenŝipo: ambaŭ pereis. Li havis fabrikon de cigaroj, kaj lia kunulo ŝtelis lian monon, kiam li mem kuŝis malsana pro „vomito.” Fine li venis Aspinvall-on, kaj ĉi tie devis esti la limo de liaj malsukcesoj. Ĉar kio povus atingi lin sur tiu ĉi ŝtonega insuleto? Nek la akvo, nek la fajro, nek la homoj. Cetere de la homoj Skavinski suferis nemulte. Li pli ofte renkontis bonajn ol malbonajn.

Sed ŝajnis, ke lin persekutis ĉiuj kvar elementoj. Tiuj, kiuj konis lin, diris, ke li ne havas feliĉon kaj tiel klarigis ĉion! Li mem fine fariĝis superstiĉa. Li kredis, ke ia ven-

ĝema mano persekutas lin ĉie, sur ĉiuj teroj kaj akvoj. Sed li ne volonte parolis pri ĉi tio; nur malofte, kiam oni demandis lin, kies estas tiu ĉi mano, li montris mistere la polusan stelon kaj respondis, ke ĝi venas de tie . . . Efektive, lia malsukceso estis tiel konstanta, tiel stranga, ke ĝi povis superstiĉigi tiun, kiu portis ĝin. Cetere li havis la paciencon de indiano kaj la grandan trankvilan forton de l'kontraŭstaro, kiun kaŭzas la honesteco. Jam en Hungarujo li ricevis dek-duon da bajonetaj pikoj, ĉar li ne volis kapti la piedingon, kiun oni montris al li kiel rimedon por savo, kaj krei: *pardon*. Same li ne cedis en la malfeliĉo. Li rampis supren tiel laboreme, kiel la formiko. Depuŝita centfoje, li trankvile rekomencis sian vojaĝon cent-unuan fojon. Li estis strangulo de miriga speco. Tiu ĉi maljuna militisto, batalinta en diversaj militoj, hardita en mizeroj, batita kaj frapita, havis la koron de infano. En la tempo de epidemio en Kubo li malsaniĝis, ĉar li donis al la malsanuloj sian tutan kininon, d. kiu li havis grandan provizon, lasinte por si neniun eron. Estis en li ankaŭ io admirinda, ke post tiom da malsukcesoj li estis ĉiam kredema kaj ne perdis la esperon, ke ĉio ankoraŭ iĝos bona. Vintre li ĉiam viviĝis kaj antaŭdiris grandajn okazojn. Li pacience atendis ilin kaj per la penso pri ili vivis tutajn jarojn. Sed la vintroj pasis unu post la alia kaj nur blankigis lian kapon. Fine li maljuniĝis — komencis perdi la energion. Lia pacienco fariĝis simila al rezignacio. Lia antaŭa trankvileco estis ŝanĝita en inklinon al kortuŝiĝemo, kaj tiu ĉi hardita militisto fariĝis plorulo, preta larmi pro ia ajn kaŭzo. Krom tio de tempo al tempo lin turmentis plej terura nostalgio, kiun kaŭzis plej malgranda okazo: vido de la hirundoj, de grizaj birdoj, similaj al la paseroj, la neĝo sur la montoj, aŭ melodio, simila al aŭdita de li antaŭe. Fine lin ekregis nur unu penso: la penso pri la ripozo. Ĝi tute okupis la maljunulon kaj ensorbis ĉiujn aliajn dezirojn kaj esperojn. La

eterna migranto ne povis revii pri io pli kara ol trankvila fako, en kiu li ripozus kaj atendus silente la finon. La miriga strangeeco de l'sorto ĵetadis lin sur ĉiujn marojn kaj landojn tiel, ke li preskaŭ ne povis ekspiri, kaj eble pro tiu ĉi kaŭzo li imagis, ke la plej granda feliĉo de l'homo estas sole ne migri. Oni devas konfesi, ke li havis rajton por tia modesta feliĉo, sed li tiel kutimis al la malsukcesoj, ke li pensis pri la trankvilo, kiel la homoj ordinare revas pri io neatingebla. Li ne kuraĝis esperi. Tamen, ne atendinte, en daŭro de dek du horoj li ricevis oficon, kvazaŭ elektitan por li el ĉiuj de l'mondo. Ne estis mirige, ke, kiam li vespere eklumigis la lanternon, li estis kvazaŭ ebria kaj demandis sin mem, ĉu tio estas vera, kaj ne havis la kuraĝon respondi: jes. Dume la realeco parolis al li per sendubaj pruvoj. La horoj unu post la alia fluis por li sur la balkono. Li rigardis, satiĝis, konvinkiĝis. Povus ŝajni, ke li vidas la maron la unuan fojon. La lenso de la lanterno ĵetis en la nokto grandegan luman konuson, post kiu la okulo de l'maljunulo perdiĝis en la malproksimo tute nigra, mistera kaj terura. Sed tiu malproksimo ŝajne kuris al la lumo. Longaj, verstaj ondoj ruliĝis el la mallumo kaj, kriegante, iris ĝis la insuleto, kaj tiam oni vidis iliajn ŝaŭmajn dorsojn, ruĝe brilantajn en la lumo de la lanterno. La alfluo fortiĝis kaj superakviŝ la sablaĵojn. La mistera parolado de l'maro aliris pli kaj pli potence kaj pli laŭte, simila jen al bruado de pafalegoj, jen al murmuro de grandegaj arbaroj, jen al miksita babilado de homaj voĉoj. Dum momentoj ĉio mallaŭtiĝis. Poste al la oreloj de l'maljunulo aliris kelke da grandaj sopiroj, poste ploregoj kaj ree minacaj eksplodoj. Fine la vento forblovis la nebulon, sed ĝi alpelis nigrajn disŝiritajn nubojn, kiuj kovris la lunon. De okcidento komencis blovi pli forte. La ondoj saltis furioze sur la krutaĵon de la lanterno, lekante jam la fundamenton per ŝaŭmo. En la malproksimo murmuris la ventego. Sur la

malluma ondanta supraĵo ekbrilis kelke da verdaj lanternetoj, pendantaj sur la ŝipaj mastoj. Tiuj ĉi verdaj punktetoj jen leviĝis supren, jen falis malsupren, jen balanciĝis dekstren kaj maldekstren. Skavinski iris en sian ĉambron. La ventego ekmuĝegis. Tie ekstere la homoj sur tiuj ŝipoj batalis kontraŭ la nokto, mallumo, ondoj; en la ĉambro estis trankvile kaj mallaŭte. Eĉ la voĉoj de l'ventego nur malforte trapenetris la dikajn murojn kaj sole la egalmezura tik tak! de la horloĝo balancis la laciĝintan maljunulon, kvazaŭ ĝi lulus lin por dormo.

II

Komencis fluadi la horoj, tagoj kaj semajnoj... La ŝipistoj certigas, ke iafoje, kiam la maro estas tre ventega, io vokas ilin per ilia nomo en la nokto kaj mallumo. Se la mara senfinaĵo povas tiel voki, estas eble, ke kiam la homo maljuniĝas, lin vokas ankaŭ alia senfinaĵo, ankoraŭ pli malluma kaj pli mistera, kaj ju pli laca li estas pro la vivo, des pli agrablaj estas por li tiuj ĉi alvokoj. Sed, por ke oni povu aŭskulti, trankvilo estas necesa. Krom tio, la maljunulo amas la izolecon, kvazaŭ antaŭsentante la tombon. La lanterno jam estis por Skavinski tia duona tombo. Estas nenio pli unutona ol tia vivo en la turo. La junaj homoj, se ili akceptas ĝin, baldaŭ forlasas la oficon. La lanternisto ordinare estas homo neĵuna, malgaja kaj nekomunikiĝema.

Se li iafoje forlasas sian lanternon kaj venas inter homojn, li iras inter ili kiel homo, vekita el profunda dormo. En lia turo ne ekzistas malgrandaj impresoj, kiel en la ordonara vivo. Ĉio, kion renkontas la lanternisto, estas grandega kaj sen precizaj formoj. La ĉielo: jen estas la unua senfinaĵo; la akvo: la dua, kaj inter ili la sola homa animo! Tio estas vivo, en kiu la penso estas kvazaŭ konstanta revo, kaj nenio, eĉ

lia okupiĝo vekas la lanterniston. Unu tago similas la alian kiel du eroj de rozario, kaj la ŝanĝoj de l'vetero prezentas la solan diversajon. Tamen Skavinski sentis sin tiel feliĉa, kiel li estis neniam antaŭe. Li leviĝis kun la matena ĉielruĝo, manĝis, purigis la lensojn de la lanterno, kaj poste, sidiĝinte sur la balkono, li rigardis la maran malproksimon, kaj liaj okuloj povis neniam satiĝi per la vidaĵoj, kiujn li havis antaŭ si. Ordinare sur la grandega turkisa supraĵo oni vidis arojn da plenblovitaj veloj, brilantaj tiel forte sub la radioj de l'suno, ke la okuloj fermetiĝis pro la troa lumo; iafoje la ŝipoj, utiligante la ventojn, kiujn oni nomas pasatoj, iris en longa vico unu post la aliaj, similaj al ĉeno da mevoj aŭ da albatrosoj. La ruĝaj bareloj, montrantaj la vojon, balanciĝis sur la ondoj en facila, delikata moviĝo; inter la veloj ĉiutage aperis tagmeze grandega grizeta rubando de fumo: la vaporŝipo el Nov-Jorko veturigis vojaĝantojn kaj komercaĵojn en Aspinvall-on, trenante post si longan ŝaŭman postsignon. De l'altra flanko de l'balkono Skavinski vidis, kvazaŭ sur la manplato, Aspinvall-on kaj ĝian moviĝeman havenon, kaj en ĝi arbaron da mastoj, ŝipetojn kaj barkojn; iom pli malproksime la blankajn domojn kaj turetojn de l'urbo. De l'alto de la lanterno la domoj similis al nestoj de mevoj, la ŝipetoj — al skaraboj, kaj la homoj moviĝis kiel malgrandaj punktetoj sur la blanka, ŝtona bulvardo. Matene malpeza orienta bloveto alportis la miksitan bruon de la homa vivo kaj la pli potencajn fajfojn de la vaporŝipoj. Tagmeze venis la horo de l'siesto. La movado en la haveno ĉesis; la mevoj kaŝis sin en fendoj de ŝtonegoj, la ondoj malfortiĝis kaj fariĝis kvazaŭ maldiligentaj, kaj tiam sur la tero, sur la maro kaj sur la lanterno regis momento da kvieto, de nenio interrompata. La flavaj sabloj, de kiuj defluis la ondoj, brilis kiel oraj makuloj sur la akva spaco; la tura kolono vidiĝis klare en la bluaĵo. Riveroj da sunaj radioj verŝiĝis de la ĉielo sur

la akvon, sablon kaj krutaĵojn. Tiam ankaŭ la maljunulon ĉirkaŭprenis ia malforteco, plena de dolĉeco. Li sentis, ke la ripozo, kiun li ĝuas, estas bonega, kaj kiam li ekpensis, ke ĝi daŭros, nenio mankis al li. Skavinski-n ebriigis lia propra feliĉo, sed, ĉar la homo facile kutimas al la bona sorto, iom post iom li akiris kredemon kaj konfidemon. Li pensis, ke, se la homoj konstruas domojn por invalidoj, kial do Dio ne povus doni rifuĝejon al sia invalido! La tempo fluis kaj plifortigis en li tiun ĉi konvinkon. La maljunulo kutimis al la turo, lanterno, krutaĵo, sablaĵoj kaj izoleco. Li konatiĝis kun la mevoj, kiuj metis ovojn en la ŝtonegajn fendojn kaj vespere unu kun aliaj konsiliĝis sur la tegmento de la lanterno. Skavinski ĵetis ordinare al ili la restaĵojn de sia manĝaĵo, kaj ili baldaŭ tiel kutimis, ke, kiam li faris tion ĉi, ĉirkaŭis lin vera ventego de blankaj flugiloj, kaj la maljunulo iris inter la birdoj, kiel paŝtisto inter la ŝafoj. Dum la forfluo li iris sur la malaltajn sablaĵojn, kie li kolektis bongustajn limakojn kaj belajn perlamotajn konkajn de naŭtiloj, kiujn la defluanta ondo restigis sur la sablo. Nokte, en la lumo de la luno kaj de la lanterno li iris por kapto de fiŝoj, kiuj naĝis amase inter la ŝtonegoj. Fine li ekamis sian ŝtonegon kaj sian senarban insuleton kun malgrandaj grasaj kreskaĵetoj gutigantaj gluan gumon. La malriĉecon de l'insuleto kompensis al li la plej malproksimaj vidaĵoj. Dum la tagmezaj horoj, kiam la atmosfero fariĝis tre diafana, oni povis vidi la tutan terkolon, ĝis Pacifiko kovritan de plej riĉaj kreskaĵoj. Al Skavinski ŝajnis tiam, ke li vidas unu grandegan ĝardenon. Faskoj da kokosoj kaj grandegaj bananoj formis kvazaŭ luksajn tufajn bukedojn tuj post la domoj de Aspinvall. Pli malproksime inter Aspinvall kaj Panamo oni vidis grandegan arbaron, super kiu ĉiumatene kaj antaŭ la nokto pendis ruĝetaj vaporigaĵoj, arbaro vere tropika, malsupre superakvita, ligita de lianoj, bruanta per ondo de grandaj orkisoj,

palmoj, arboj laktaj, feraj kaj gumaj.

Per sia gardista lorno la maljunulo povis vidi ne sole la arbojn, la larĝajn foliojn de l'bananoj, sed ankaŭ arojn da simioj, grandajn marabuojn kaj papagojn, kiuj leviĝis iafoje kiel ĉielarka nubo super la arbaro. Skavinski bone konis similajn arbarojn, ĉar post sia ŝippereo sur Amazono li eraris tutajn semajnojn inter similaj arkaĵoj kaj densejoj. Li vidis, ke la danĝero kaj la morto sin kaŝas sub ilia adminda kaj gajiga supraĵo. Dum la noktoj, kiujn li pasigis inter ili, li aŭdis de proksime voĉojn de micetoj kaj kriegojn de jaguaroj; li vidis grandegajn serpentojn, kiuj balanciĝis sur la arboj kvazaŭ lianoj; li konis tiajn dormantajn arbarajn lagojn, plenajn de torpilioj kaj de amase naĝantaj krokrodiloj. Li scis, sub kia jugo la homo vivas en tiuj ĉi nemezureblaj densejoj, en kiuj unu folio dekoble superas lian grandecon, en kiuj renkontiĝas amase sangavidaj kuloj, arbaj hirudoj kaj grandegaj venenaj araneoj. Ĉion li mem provis, sentis kaj suferis; tiom pli plezure li rigardis de supre tiujn *matos*, admiris ilian belecon, dum li estis gardita kontraŭ ilia perfido. Lia turo defendis lin kontraŭ ĉiu malbono. Nur malofte li ĝin forlasis dimanĉe matene. Li sin vestis tiam per blua gardista surtuto kun grandaj arĝentaj butonoj, kaj lia lakto-kolora kapo leviĝis kun fiereco, kiam li aŭdis, elirante el la preĝejo, kreolojn dirantaj: „Ni havas honestan lanterniston.” Kaj li ne estas herezulo, kvankam *yankee*! Sed tuj post la meso li revenis sur la insulon kaj revenis feliĉa, ĉar li ĉiam ankoraŭ ne konfidis al la kontinento. Dimanĉe li legis hispanan gazeton, kiun li aĉetis en la urbo, aŭ „New-York Herald,” pruntitan de Folcombridge, kaj li serĉis avide sciigojn el Eŭropo. Mizera maljuna koro! Sur tiu ĉi gardista turo kaj sur la alia duonglobo ĝi ankoraŭ batis por la patrujo . . . Iafoje, kiam la ŝipeto kun la ĉiutaga nutraĵo kaj akvo venis al la insuleto, li deiris de la turo por babil



kun gardisto Johns. Sed poste videble li fariĝis sovaĝa. Li ĉesis viziti la urbon, legi la gazetojn kaj disputi kun Johns pri la politiko. Tutaj semajnoj pasis kaj neniu vidis lin, nek li iun. La sola signo, ke la maljunulo vivas, estis la malaperado de l'nutraĵo, restigita sur la bordo, kaj la lumo de la lanterno, ekbruligata ĉiuvespere kun la akurateco, kun kiu la suno leviĝas matene el la akvo. La mondo indiferentiĝis por la maljunulo. La kaŭzo de tio ne estis nostalgio, — ĝi eĉ fariĝis rezignacio. La tuta mondo komenciĝis kaj finiĝis por la maljunulo sur lia insuleto. Li kutimiĝis al la penso, ke li ne forlasos la turon antaŭ la morto, kaj forgesis, ke estas ankoraŭ io ekster ĝi. Li fariĝis mistikulo. Liaj kvietaj bluaj okuloj similiĝis al la okuloj de infano, ĉiam rigardantaj atente ian malproksimon. En konstanta izoleco kaj ĉirkaŭita de naturo tre simpla kaj grandega, li komencis perdi la senton pri sia propra aparteco; li ĉesis ekzisti kiel persono kaj kunfandiĝis pli kaj pli kun la naturo. Li ne konsideris pri ĉi tio, li nur sentis tion senkonscie; sed fine ŝajnis al li, ke la ĉielo, la akvo, liaj ŝtonego kaj turo, la oraj sablaĵoj, plenblovitaj veloj, alfluo kaj forfluo, — ĉi ĉio estas granda unuaĵo kaj unu granda miriga animo; kaj li mem trempiĝas en tiun ĉi mirigaĵon kaj sentas tiun animon, kiu vivas kaj kvietiĝas. Li dronis, luliĝis, kvazaŭ perdis la konscion kaj en tiu ĉi limiĝo de l'propra aparta ekzistado, en ĉi tiu duondormo li trovis tiel grandan trankvilon, ke tio estis preskaŭ simila al duonmorto.

III

Sed venis vekiĝo.

Foje, kiam la ŝipeto alveturigis akvon kaj provizon da nutraĵo, Skavinski, post unu horo veninte de la turo, rimarkis, ke krom la ordinara ŝarĝo estas ankoraŭ unu pakaĵo. Sur

ĝi estis poŝtmarkoj de Unuigitaj Ŝtatoj kaj adreso „Skavinski, esq.,” skribita sur dika vela tolo. La mirigita maljunulo distranĉis la tolon kaj ekvidis librojn; li prenis la unuan, rigardis kaj skuiĝis; liaj manoj komencis forte tremi. Li kovretis siajn okulojn kvazaŭ ne kredante al ili; ŝajnis al li, ke li songas — la libro estis pola. Kion ĉi tio signifas? Kiu povis sendi al li librojn? En la unua momento li forgesis, ke ankoraŭ en la komenco de sia lanternista vivado li legis iam en „Herald,” pruntita de l’konsulo, pri la fondo de pola societo en Nov-Jorko kaj ke li tuj sendis al la societo duonon da sia monata salajro, kiu cetere estis por li tute superflua en la turo. La societo danke sendis al li librojn. Ili venis laŭ natura vojo, sed en la unua momento la maljunulo ne povis ordigi siajn pensojn. Polaj libroj en Aspinvall, en lia turo, en lia izoleco, — tio estis por li io neordinara, ia spiro de l’antaŭaj tempoj, ia miraklo. Nun ŝajnis al li, kiel al la maristoj nokte, ke io elparolas lian nomon per voĉo tre amata, sed preskaŭ forgesita. Li sidis momenton kun fermataj okuloj kaj estis preskaŭ certa, ke, kiam li malfermos ilin, la sonĝo malaperos. Ne! La distranĉitaj pakaĵoj kuŝis antaŭ li klare, lumigata de la brilo de la posttagmeza suno, kaj sur ĝi — la malfermita libro. Kiam la maljunulo ree etendis la manon al ĝi, li aŭdis en la silento la batadon de sia propra koro. Li ekrigardis; tio ĉi estis versoj. Supre estis skribita la titolo per grandaj literoj, kaj malsupre la nomo de l’aŭtoro. Tiu ĉi nomo ne estis fremda por Skavinski; li sciis, ke ĝi apartenas al glora poeto, kies verkojn li legis eĉ post la trideka jaro en Parizo. Poste, batalante en Alĝerio kaj Hispanujo, li aŭdis de samlandanoj pri la ĉiam plikreskanta gloro de l’granda poeto, sed tiam li tiel estis kutiminta al la pafilo, ke li eĉ ne prenis librojn en la manojn. En la kvardeknaŭa jaro li forveturis Amerikon, kaj en la aventura vivo, kiun li vivis, li preskaŭ ne renkontis polojn, kaj neniam

H. SIENKIEWICZ

polajn librojn. Kun tiom pli granda avideco kaj kun pli vive batanta koro li turnis la titolan paĝon. Ŝajnis al li, ke sur lia izola ŝtonego komenciĝis io festa. Estis momento de granda trankvilo kaj silento. La horloĝoj de Aspinvall sonoris la kvinan horon post la tagmezo. Neniu nubeto mallumigis la ĉielon, nur kelke da mevoj naĝis en la bluaĵo. La oceano luligis. La apudbordaj ondoj apenaŭ balbutis mallaŭte, disfluante sur la sablo. En la malproksimo gajige vidiĝis la blankaj domoj de Aspinvall kaj la admirigaj grupoj da palmoj. Vere estis iel feste, mallaŭte kaj solene. Subite en tia trankvileco de l'naturo eksonis la tremanta voĉo de l'maljunulo, kiu legis laŭte, por pli bone kompreni sin mem:

„Litova, kara patroland', la sanon vi prezentas!
Valoron vian tiu nur en plena vero sentas,
Kiu vin perdis. Pleje nun min via ĉarm' altiras,
Ravita mi priskribas vin, ĉar mi je vi sopiras.”

Al Skavinski mankis la voĉo. La literoj eksaltis antaŭ liaj okuloj; en lia brusto io deŝiriĝis kaj iris de l'koro kiel ondo pli kaj pli supren, surdigante la voĉon, premante la gorgon. Ankoraŭ unu momento: li trankviliĝis kaj legis:

„O Sankta Virgulino, Vi defendo Ĉenstohova,
Lumanta en la Ostra-Bram' kaj en kastel' malnova,
De Novogrodek, kie Vi la urbon feliĉigis!
Kiel infanon iam min mirakle Vi sanigis,
Tiel mirakle al patruj' per Vi revenos filoj...”

Altiĝinta ondo rompis la digon de l' volo. La maljunulo kriegis kaj ĵetis sin sur la teron; liaj blankaj haroj miksiĝis kun la apudmara sablo. Dum kvardek jaroj li ne vidis la patrujon kaj Dio scias, dum kiom li ne aŭdis la patrujan

lingvon, kaj nun tiu ĉi lingvo mem venis al li — tranaĝis la oceanon kaj trovis lin izolulo sur la alia duonglobo, — la lingvo tiel amata, tiel kara, tiel belega! En la plorego, kiu skuis lin, ne estis doloro, sed sole subite vekita supermezura amo. Per ĉi tiu granda ploro li petis pardonon de tiu ĉi amato malproksima, ke li jam tiel maljuniĝis, tiel kutimis al la izola ŝtonego kaj tiel forgesis, ke eĉ la sopiro komencis estingiĝi. Kaj nun li „revenis mirakle,” la koro ŝiriĝis en li. La momentoj pasis unu post la alia; li senĉese kuŝis. La mevoj alflugis super la lanterno, kriante, kvazaŭ maltrankvilaj pri sia maljuna amiko. Venis la horo, en kiu li nutris ilin per la restoj de sia manĝaĵo, kaj kelke da ili flugis ĝis li de l'supro de la lanterno. Poste alvenis ankoraŭ pli multe da ili kaj komencis malforte beki lin kaj brui per la flugiloj super lia kapo. La bruo de la flugiloj vekis lin. Nun, kiam li estis plorinta, li havis iajn trankvilon kaj feliĉon kaj liaj okuloj estis kvazaŭ inspiritaj. Li senkonscie donis sian tutan nutraĵon al la birdoj, kiuj ĵetis sin sur ĝin kun kriego, kaj li mem ree prenis la libron. La suno transiris jam super la ĝardenoj kaj super la virga arbaro de Panamo kaj malrapide ruliĝis trans la terkolon, al la alia oceano, sed Atlantiko estis ankoraŭ plena de brilo; en la aero estis tute lume; li do legis.

„Sed nun animon mian Vi forportu sur flugiloj
Al la montetoj de arbar', al tiuj verdaj kampoj ¹⁾”

La krepusko kovris la literojn sur la blanka paĝo, — krepusko mallonga, kiel ekrigardo. La maljunulo apogis la kapon al la ŝtonego kaj fermetis la okulojn. Tiam „Defendo

¹⁾ El „Sinjoro Tadeuŝ” de Mickieviĉ, traduko de d-ro Zamenhof.

Ĉenstoĥova" prenis lian animon kaj forportis ĝin „al la montetoj de arbar', al tiuj verdaj kampoj." Sur la ĉielo brulis ankoraŭ longaj vojoj, ruĝaj kaj oraj, kaj en tiuj ĉi lumajoj li flugis al la amata lando. Ekbruis en liaj oreloj la pinaj arbaroj, ekmurmuris la patrujaj riveroj. Li vidas ĉion, kia ĝi estis antaŭe. Ĉio demandas lin: „Ĉu vi memoras?" Li memoras! Cetere li vidas: vastajn kampojn, limon, herbejojn, arbarojn kaj vilaĝojn. Jam estas nokto! En tiu ĉi tempo la lanterno ordinare jam lumigis la marĝan mallumon; sed li estas nun en la patruja vilaĝo! Lia maljuna kapo kliniĝas al la brusto kaj sonĝas. La pentraĵoj pasas antaŭ liaj okuloj rapide kaj iom senorde. Li ne vidas la patran domon, ĉar ĝin detruis la milito; li ne vidas la gepatrojn, ĉar ili mortis en lia infaneco, sed cetere li vidas la vilaĝon kvazaŭ li estus forlasinta ĝin hieraŭ: la vico da dometoj kun lumetoj en la fenestroj, la digo, la muelejo, du lagetoj bruantaj la tutan nokton per ĥoroj de ranoj. Iam en ĉi tiu vilaĝo li nokte staris garde, nun tiu estinteco revenas subite kiel vico da fantomoj. Jen li ree estas husaro kaj staras garde; malproksime la drinkejo rigardas per brilantaj okuloj, bruas, kantas kaj sonas en la nokta silento per piedfrapado, voĉoj de violono kaj violonĉelo. U-ha! U-ha! Jen fajreroj saltas sub la hufetoj de husaroj, kaj li enuas sur sia ĉevalo. La horoj treniĝas maldiligente, fine la lumoj estingiĝas; nun, kien la okulo povas atingi, nebulo kaj nebulo netravedeblaj; vaporaĵoj leviĝas de la herbejoj kaj ĉirkaŭprenas la tutan mondon per blanketa kovrilo. Sed tio estas la herbejoj; baldaŭ la ralo aŭdiĝos en la mallumo kaj la ojstro ekmurmuros en la kano. La nokto estas kvietaj kaj malvarmeta, vera pola nokto! En la malproksimo la pina arbaro bruas sen vento . . . kiel mara ondo. Baldaŭ la matena ĉielruĝo koloros la orienton; jen la kokoj krias post la plektobariloj. Unu al alia ili transdonas la voĉon el dometo al dometo; jen ankaŭ la

gruoj jam krias ie de supre. La husaro sentas sin vigla, sana. Oni ion parolis pri la morgaŭa batalo. Ankaŭ li iros, kiam iros la aliaj kun krio kaj kun murmuro de la standardoj. Lia juna sango ludas kvazaŭ trumpeto, kvankam la nokta venteto malvarmigas ĝin. Sed jam venas la matena ĉielruĝo! La nokto pasas, el la ombro aperas la arbaroj, la arbetoj, la vicoj da dometoj, la muelejo, la poploj. La putoj krakas, kvazaŭ lada ventoflago sur turo. La amata lando, kiel belega ĝi estas en la brilo de l'ĉielruĝo!

Silentiĝu! La vigla gardisto aŭdas, ke iu proksimiĝas. Eble oni venas anstataŭi lin.

Subite eksonas voĉo super Skavinski.

„Maljunulo, leviĝu! Kio al vi estas?”

La maljunulo malfermas la okulojn kaj rigardas kun miro homon starantan antaŭ li. La resto de l'songaj fantomoj batalas en lia kapo kontraŭ la realeco. Fine ĉio paliĝas kaj malaperas. Antaŭ li staras Johns, la havena gardisto.

„Kio estas?” demandas Johns. „Ĉu vi estas malsana?”

„Ne.”

„Vi ne eklumigis la lanternon. Vi estos eksigata el la ofico. Ŝipeto de San-Geromo rompiĝis sur sablaĵo; feliĉe neniu dronis; alie vi estus juĝata. Sidiĝu kun mi; la reston vi aŭdos en la konsulejo.

La maljunulo paliĝis: efektive li ne eklumigis la lanternon en ĉi tiu nokto!

Post kelke da tagoj oni vidis Skavinski-n sur la ferdeko de la ŝipo, iranta de Aspinvall Nov-Jork-on. La mizerulo perdis sian oficon. Malfermiĝis antaŭ li novaj vojoj de migrado; la vento ree forportis tiun ĉi folion por ĵetadi ĝin sur terojn kaj marojn, por mokadi ĝin laŭ sia deziro. La mizerulo dum tiuj ĉi tagoj tre plimaljuniĝis kaj kliniĝis; sole liaj okuloj brilis. Por la novaj vojoj de l'vivo li havis sur la brusto sian libron, kiun li premis per

la mano de tempo al tempo, kvazaŭ timante perdi ankaŭ ĝin.

DU HERBEJOJ

Hinda legendo.

Estis du landoj, kuŝantaj unu apud la alia, kvazaŭ du grandegaj herbejoj, dividitaj nur de hela rivereto.

La bordoj de tiu ĉi rivereto delikate disiĝis en unu loko, formante malprofundan trairejo, laĝeton kun kvieta kaj travidebla akvo.

Oni vidis sub la blua fluo la oran fundon, el kiu kreskis trunketoj de la lotusoj, florantaj super la brila supraĵo; ĉielarkaj papilioj flirtis ĉirkaŭ la ruĝaj kaj blankaj floroj; inter la apudbordaj palmoj kaj en la radiant aero la birdoj sonis kvazaŭ arĝentaj sonoriloj.

Tio estis la trairejo el unu lando en la alian, el Herbejo de Vivo en Herbejon de Morto.

Ambaŭ estis kreitaj de plej alta kaj ĉiopova Brahma, kiu ordonis, ke en la lando de Vivo estu bona Viŝnu, kaj en la lando de Morto saĝa Ŝiva.

Kaj li diris:

„Faru, kion vi trovos bona.”

En la lando, apartenanta al Viŝnu, Vivo ekbolis. La suno komencis leviĝi kaj subiri, aperis la tagoj kaj noktoj, la maraj vastaĵoj komencis alflui kaj forflui; sur la ĉielo ekrapidis la nuboj, plenaj de pluvo; sur la tero la arbaroj ekkreskis; amase aperis la homoj, bestoj kaj birdoj.

Por ke ĉiuj vivaj estaĵoj povu naski idojn, la bona dio kreis Amon, al kiu li ordonis, ke ĝi estu samtempe feliĉo.

Tiam Brahma alvokis Viŝnu-n kaj diris:

„Sur la tero vi ne povos elpensi ion pli perfektan; la ĉielo jam estas kreita de mi; ripozu do, kaj la kreitaĵoj, kiujn vi nomis homoj, ŝpinu la fadenon de Vivo sen ies helpo.”

Viŝnu obeis la ordonon de Brahma kaj la homoj komencis mem zorgi pri si. De iliaj bonaj ideoj naskiĝis la ĝojo, kaj de la malbonaj la malĝojo; ili do mire rimarkis, ke Vivo ne estas seninterrompa gaja festo, ke la fadenon, pri kiu parolis Brahma, ŝpinas du ŝpinistinoj: unu havas ridetantan vizaĝon, la alia larmojn en la okuloj.

La homoj iris al la trono de Viŝnu kaj plendis:

„Sinjoro, Vivo en malĝojo estas malfacila!”

Li respondis:

„Amo konsolu vin!”

Aŭdinte tion ĉi, ili trankviliĝis kaj foriris. Amo efektive forigis la malĝojojn, kiuj ŝajnis malgravaj kompare kun la feliĉo, donacata de ĝi.

Sed Amo estas samtempe la granda naskanto de Vivo. Kvankam la lando de Viŝnu estis grandega, baldaŭ mankis por la homaj amasoj arbaraj beroj, mielo de la abeloj, fruktoj de la arboj. Tiam la plej saĝaj homoj komencis dehaki la arbojn kaj displugi la arbarojn, kulturi la kampojn, semi grenojn kaj rikolti.

Kaj tiamaniere Laboro venis en la mondon. Baldaŭ ĉiuj devis partopreni ĝin; ĝi fariĝis ne nur la bazo de Vivo, sed preskaŭ Vivo mem.

Sed Laboro naskis Penon, Penon — Laciĝon.

Amasoj da homoj ree venis antaŭ la tronon de Viŝnu:

„Sinjoro!” kriis ili, etendante la manojn, „la peno malfortigis niajn korpojn, la laciĝo loĝiĝis en niaj ostoj; ni dezirus ripozi, sed la vivo devigas nin seninterrompe labori!”

Viŝnu respondis:

„Granda Brahma ne permesis al mi ŝanĝi Vivon, sed mi povas krei ion, kio estos interrompo de ĝi, sekve ripozo.”

Kaj li kreis Dormon.

La homoj ĝoje akceptis la novan donacon kaj baldaŭ proklamis ĝin plej granda favoro, ricevita el la manoj de l'dio.

En la dormo ili forgesis pri siaj penoj kaj malĝojoj, en la dormo la lacaj reakiris la fortojn, la dormo sekigis la larmojn, kvazaŭ bona patrino, kaj ĉirkaŭis la kapojn de l'dormantoj per nebulo de l'forgeso. La homoj gloris la dormon, dirante:

„Estu benata, ĉar vi estas pli bona ol Vivo en la maldormo.”

Kaj ili riproĉis ĝin nur pro tio, ke ĝi ne daŭras eterne, ke venas la vekiĝo, kaj post ĝi la laboro, — novaj penoj kaj laciĝo.

Tiu ĉi penso tiel turmentis ilin, ke ili triafoje iris al Viŝnu:

„Sinjoro,” diris ili, „vi donis al ni bonon grandegan kaj neesprimeblan, sed nekompletan. Faru, ke la dormo estu eterna.”

Viŝnu sulkigis la dian frunton, kolera pro ilia trudem, kaj respondis:

„Tion ĉi mi ne povas doni al vi, sed trans la rivero vi trovos, kion vi serĉas.”

La homoj obeis la voĉon de l'dio kaj iris amase al la lageto; veninte al ĝia bordo, ili komencis rigardi la kontraŭan flankon.

Post la kvieta kaj hela supraĵo, brodita de floroj, kuŝis Herbejo de Morto, la lando de Ŝiva.

Tie ne leviĝis, nek subiris la suno, ekzistis nek tagoj nek noktoj; lilikolora, monotona lumo saturis la tutan spacon.

Neniu objekto ĵetis ombron, ĉar tiu ĉi lumo penetris ĉien; ŝajnis, ke ĝi plenigas la universon.

La lando ne estis dezerta: ĉie, kien la rigardo povis atingi, oni vidis valojn kaj montojn, kovritajn de belaj aretoj da arboj, ĉirkaŭ kiuj volviĝis hederoj; sur ŝtonegoj pendis

vinberoj. Sed la ŝtonegoj kaj la trunkoj de l'arboj estis preskaŭ travideblaj, kvazaŭ faritaj el densigita lumo.

La hederaj folioj havis delikatajn, helajn brilojn de l'matena ĉielruĝo; ĉio estis admirinda, kvieta, pura, kvazaŭ sonĝanta en dormo sonĝon feliĉan, seninterrompan.

Nenia bloveto estis en la hela aero, moviĝis neniue floro, tremis neniue folio.

La homoj, kiuj venis al la bordo brue parolante, eksilentis, kiam ili vidis la lilikoloran, senmovan spacon. Post momento ili murmuretis:

„Kiaj silento kaj lumo!”

„Ho jes, trankvilo kaj eterna dormo...”

La plej lacaj diris:

„Ni iru serĉi la eternan dormon.”

Kaj ili eniris en la akvon. La blua profundaĵo disiĝis antaŭ ili por faciligi la trairon. Tiuj, kiuj restis sur la bordo, igitaj per subita sopiro, komencis voki ilin; sed neniue ili returnis la kapon; ĉiuj gaje kaj vive daŭrigis la vojon, altirataj de la ĉarmo de l'admirinda lando.

La amaso, staranta sur la bordo de Vivo, rimarkis ankaŭ, ke la korpoj de l'forirantoj fariĝis lumaj, travideblaj, pli kaj pli senpezaj kaj radiantaj kaj kvazaŭ kuniĝis kun la ĝenerala lumo, kiu plenigis Herbejon de Morto.

Transirinte, ili kuŝiĝis inter la tieaj floroj kaj arboj aŭ ĉe la ŝtonegoj. Iliaj okuloj estis fermitaj, sed iliaj vizaĝoj estis neesprimeble trankvilaj kaj feliĉaj. Sur Herbejo de Vivo similan feliĉon ne donis eĉ Amo. Vidante tion, ĉiuj, kiuj restis ĉe Vivo, parolis unuj al la aliaj:

„Pli dolĉa kaj pli bona estas la lando de Ŝiva...”

Kaj ili komencis transiri tien pli kaj pli grandnombre. Iis kvazaŭ solenaj procesioj da maljunuloj, junuloj, geedzoj, patrinoj kondukantaj etulojn, knabinoj, kaj poste miloj, milionoj da homoj komencis puŝi unuj la aliajn ĉe Silenta

Trairejo, ĝis fine Herbejo de Vivo preskaŭ tute malpleniĝis. Tiam Viŝnu, kies "devo estis gardi Vivon, ekstremis, rememorinte, ke li mem donis la konsilon al la homoj. Ne sciante, kion fari, li iris al plej alta Brahma.

„Kreinto, " diris li, „savu Vivon! Vi faris la landon de Morto tiel bela, luma kaj feliĉa, ke ĉiuj forlasas mian regnon.”

„Ĉu neniuj restis ĉe vi?” demandis Brahma.

„Nur unu junulo kaj unu knabino, kiuj tiel amas unu la alian, ke ili preferas perdi la eternan trankvilon, ol fermi la okulojn kaj ne vidi plu unu la alian.”

„Kion do vi postulas?”

„Faru la landon de Morto malpli bela kaj feliĉa, ĉar alie ankaŭ ĉi tiu paro forlasos min, kiam pasos la printempo de ilia amo.”

Brahma konsideris momenton kaj diris:

„Ne! Mi ne malgrandigos la belecon kaj feliĉon de la lando de Morto, sed mi faros ion alian, por savi Vivon. De nun la homoj estos devigataj tien transiradi, sed ili ne faros tion volonte.”

Dirinte ĉi tion, li teksis el mallumo dikan, netravedeblan kurtenon, kreis du estaĵojn: Doloron kaj Timon kaj ordonis, ke ili pendigu la kurtenon ĉe la trairo.

Herbejon de Vivo ree plenigis Vivo, ĉar, kvankam la lando de Morto restis same luma kaj feliĉa, la homoj timis Trairejon.

ĈE LA FONTO

Hieraŭ ankoraŭ mi estis studento, kaj mia doktora diplomo de filozofio ankoraŭ ne estas tute seka — tio estas vera. Mi ne havas oficon, mi ne estas riĉa. Tuta mia havo konsistas

el malriĉa dometo kun ĝardeno kaj el kelkaj centoj da rubloj de enspezoj — mi do komprenas, ke ili rifuzis al mi la manon de Tola — sed ili ankaŭ ofendis min.

Kial? Kion mi faris? Mi alportis al ili, kvazaŭ sur la manplato, mian honestan koron kaj diris: „Donu ŝin al mi, mi estos por vi plej bona filo kaj danka ĝis la morto — kaj ŝin mi portos sur miaj manoj, amos kaj gardos.”

Estas vere, ke mi diris tion ĉi mallerte, per fremde sonanta voĉo, balbutante kaj apenaŭ spirante. Sed vi vidis, ke parolas mia tuta koro, ke parolas amo, kian oni ne ĉiutage trovas en la mondo, kaj eĉ se vi decidis rifuzi, kial vi ne rifuzis, kiel homoj bonaj kaj kompatemaj, kial vi ofendis min?

Vi, pseŭdokristanoj, vi, pseŭdoidealisto, ĉu vi povis scii, kion mi faros post tia interparolado kun vi? Kiu certigis vin, ke mi ne pafos kuglon en mian kapon, unue, ĉar mi ne povos vivi sen ŝi, due, ĉar mi ne toleros tian kontraŭecon inter la vortoj kaj agoj, tiajn farizeismon kaj mensogemon? Kial vi ne kompatis min eĉ unu sekundon? Ankaŭ min oni ne devas piedpremi, ankaŭ min oni devas domaĝi! Se mi ne estus renkontinta vin sur mia vojo, eble mi farus ion por la aliaj. Mi estas juna, preskaŭ ankoraŭ studento, sen ofico, sen riĉaĵo — jes! Sed la estonteco estas antaŭ mi kaj, pro Dio, mi ne scias, kial vi kraĉis sur ĝin.

La glaciaj vizaĝoj! La malŝata indigno! . . . Kelkajn tagojn pli frue mi ne povus supozi tion: — „Mi opiniis vin honesta homo, kaj vi trompis nin, vi trouzis nian konfidemon” — jen estas la vortoj, per kiuj ili vipis mian vizaĝon. Antaŭ momento ili tiel kore gratulis min pro mia diplomo, kvazaŭ mi estus ilia filo — kaj kiam, paliĝinte pro kortuŝeco, mi klarigis al ili, kio plej multe instigis min al la laboro, estingiĝis ilia bonkoreco kaj iliaj ridetoj, glaciigis iliaj vizaĝoj, ĉar „mi trouzis ilian konfidemon.”

Ili tiel ofendis, piedpremis min, ke unu momenton eĉ ŝajnis

al mi, ke mi agis malnoble kaj ke mi efektive trompis ilin.

Sed kiamaniere? Kiel? Kiu trompis? Kiu estas malnoblulo? Aŭ mi tute freneziĝis, aŭ ne estas malnoble ami honeste kaj proponi siajn animon, sangon kaj laboron. Se vi efektive indignis — kiu do estas malsaĝulo?

Aĥ! — ankaŭ pri vi, Tola, mi trompiĝis, mi, kiu tiel kredis al vi! Ili diris al mi: „Ni estas certaj, ke nia filino neniel rajtigis vin al tia paŝo.” Kompreneble, mi ne neis. Kaj poste venis ĉi tiu „filino,” kun la tuta pasiveco de bone edukita fraŭlino kaj balbutis kun mallevitaj okuloj, ke ŝi tute ne komprenas, kiamaniere simila penso povis veni al mi.

Vi ne komprenas? Aŭskultu min do, fraŭlino Tola: vi ne diris al mi, ke vi min amas — ne! Mi ne posedas kvitancon kun via subskribo, kaj eĉ se mi havus ĝin, mi ĝin ne montrus. Sed jen kion mi diros al vi: ekzistas ia justeco, ekzistas ia tribunalo — ĉu ie super la nuboj, ĉu en la homa konscienco, antaŭ kiu vi devos konfesi: ĉi tiun honon mi trompis, ĉi tiun homon mi forlasis, ĉi tiun homon mi fordonis al humiligo kaj malfeliĉo.

Ĉu kuraĝo mankis al vi, aŭ amo? — mi tion ne scias, sed mi scias bone, ke vi terure min trompis. Mi ankoraŭ amas vin kaj ne volas malbeni, sed vi devus scii, ke, kiam oni decidas pri savo aŭ pereigo de homo, tiam oni devas havi kuraĝon, tiam la honesteco kaj amo devas esti pli grandaj ol la timo. Alie oni estas kulpa pri tio, ke la traboj de la pene konstruata domo falas al iu sur la kapon. Tio ĉi okazis ankaŭ al mi: Mi konstruis tutan mian estontecon sur la fundamento de mia kredo al via amo, sed montriĝis, ke mi konstruis sur sablo, ĉar en la decida horo mankis al vi kuraĝo, ĉar, kiam vi devis elekti la malbonan humoron de viaj gepatroj, aŭ mian malfeliĉon, vi elektis la lastan. Se en la katastrofo vi restus tia, kia mi vin opiniis, mi havus esperon kaj konsolon. Ĉu vi scias, ke ĉion, kion mi faris dum

la lastaj jaroj, mi faris por vi kaj per vi? Mi laboris kiel bovo, maldormis noktojn, akiris medalojn kaj diplomojn, vi estis mia vivo, al vi mi dediĉis ĉiun mian spiron, nur pri vi mi pensis. Kaj nun antaŭ mi kuŝas dezerto, kie la malĝojo kriegas kiel hundo. Nenio restis al mi.

Ĉu vi iam pensos pri tio?

Sed la prudentaj gepatroj klarigos al vi, ke mi estas malsaĝa entuziasma studento. Se mi efektive estus tia, mi povus diri, kiel Shylock de Shakespeare: „Ĉu ni ne estas samaj homoj, kiel vi? Se vi trapikas nin, ĉu ne fluas el ni la sango? Se vi agas maljuste kontraŭ ni, ĉu ni ne larmas?” Ofendu neniun, kiu ajn li estas. Mia entuziasmo, ĉu saĝa, ĉu malsaĝa, rajtigas neniun turmenti min. Bone estas, ke nia nuna mondo, ĉi tiu grandega, senanima konstruaĵo de malsaĝeco, mensogemo kaj hipokriteco, jam fendiĝas kaj disfalas, ĉar neeble estas tie vivi. Nun mi havas multe da tempo: mi fariĝis, Dio scias por kio, doktoro de filozofio, do kiel filozofo mi analizas la diversajn homajn interrilatojn, kiuj antaŭ nelonge ruinigis mian vivon. Vi, tiel nomataj prudentaj homoj, estas tute kontentaj, se vi trovas malvivan esprimon, sensignifan vorton por afero, kaj ke la afero rompas al iu la kolon — tio ĉi vin tute ne ĉagrenas. Malsaĝa entuziasmo! Kiom utilas la vorto, se la koro doloras min? Ĉu via vortaro min helpas? Al ĉio, kion ne sentas viaj malsentemaj nervoj, vi rifuzas la rajton ekzisti. Kiam ĉiuj dentoj elfalis el la maljunaj makzeloj, vi ne kredas plu la dentdoloron. Laŭ via opinio, la reŭmatismo estas grava afero, sed la amo estas nur malsaĝa entuziasmo. Ĉiufoje, kiam mi pensas pri tio, en mi aperas du estaĵoj: unu, la hieraŭa studento, la varmega batalanto kontraŭ la homa malsaĝeco; la dua, la maljuste ofendita homo, ĉiam preta malbeni kaj plori. Tiel oni ne povas vivi. Ni jam havas sufiĉe da idealismo en la vortoj, kaj da utilitarismo en la faroj. Proksimiĝas la

tempo, en kiu oni devos agi laŭ la principoj, aŭ kuraĝe proklami principojn same cinikajn, kiel la faroj. Kiom da fojoj mi aŭdis de l'gepatroj de Tola, ke la riĉaĵoj ne liveras la feliĉon, ke la karaktero valoras pli multe ol la riĉeco, ke la trankvila konscienco estas la plej granda bono! Ĉu efektive? Mi ja posedas karakteron, laboremon, trankvilan konsciencon, junecon kaj amon — kaj malgraŭ ĉio oni mortis al mi la pordon; sed se mi gajnus hodiaŭ en la loterio duonon da miliono, morgaŭ ili ĝoje donus al mi sian filinon. La patro venus al mi kun malfermitaj brakoj, sendube, kiel certe estas, ke Dio ekzistas en la ĉielo!

Kiu volas esti komercisto, devas scii kalkuli, sed vi, prudentaj homoj, ne scias eĉ tion ĉi. Via prudento kaŭzas nur iluziojn. Vi ne scias kalkuli, ĉu vi aŭdas? Mi ne parolas en febro, mi ne fantazias. La amo estas, ekzistas, oni ne povas nei ĝian realecon. Se genia matematikisto kalkulus al vi ĝian monan valoron, vi miregus, kian riĉaĵon ĝi egalas! La amo estas same pozitiva, same reala, same necesega en la vivo kiel la mono. La kalkulo estas simpla: la vivo valoras tiom, kiom da feliĉo ĝi enhavas, kaj la amo ja estas neelĉerpebla fonto de feliĉo, grandega kapitalo; ĝi egalvaloras sanon kaj junecon. Sed via cerbo ne povas kompreni tiel simplajn aferojn. Mi ripetas ankoraŭ unu fojon: vi ne scias kalkuli! Miliono valoras milionon kaj neniom plu, sed laŭ via opinio ĝi enhavas, ekster la mona valoro, ĉiujn bonaĵojn de l'vivo. Kaj tial vi erarvagas en artefarita mondo; vi ne vidas la ĝustajn rilatojn kaj la efektivajn prezojn. Vi estas romantikuloj, sed malaltaj, monaj romantikuloj; viaj principoj estas malutilaj, ĉar ili detruas la vivon ne nur de fremdaj personoj, sed eĉ de viaj propraj infanoj.

Tola estus feliĉa kun mi! Nu, kion vi bezonas plu? Ne diru, ke ŝi mem estus forpuŝinta min. Se vi ne estus mortigintaj en ŝi per via edukado la volon, sincerecon kaj kura-

ĝon, mi ne sidus nun sola kun kapo krevanta pro doloro. Neniu tiel rigardis la okulojn de Tola, kiel mi, neniu do scias pli bone, kion ŝi sentis kaj kia ŝi estus nun, se vi ne estus venenintaj ŝian animon.

Kaj nun mi perdis ŝin kaj multajn aliajn aferojn, same necesegajn por la vivo kiel la pano, kaj sen kiuj oni mortas. Ho vi, miaj ne realiĝintaj bogepatroj, ho vi, mia perdita edzino! Iafoje mi pensas, ke vi tute ne suspektas, kion vi faris, ĉar alie vi revenigus min. Neeble estas, ke vi min tute ne kompatas.

Kiom utilos la riproĉoj?! Mi estas prava; ĉio, kion mi skribis, estas vera, sed la vero ne redonos al mi Tola-n.

Sed ankaŭ tion mi ne povas kompreni, kial la praveco kaj la vero utilas neniom. La mondo ja estas konstruita same, kiel la homa spirito; kio do kaŭzas la malkonsenton? Se estas alie, oni devas eterne turniĝi ĉirkaŭ si mem en la rondo.

Mi ne povas plu skribi.

* * *

Post longa interrompo mi reprenas la plumon. Parolu la vero mem — mi nur simple rakontos, kio okazis. La klarigo venis nur pli malfrue, mi do priskribos la faktojn unu post alia, klujn mi tiam ankoraŭ ne komprenis.

Matene, post la malfeliĉega tago, la patro de Tola venis al mi. Ekvidinte lin, mi rigidiĝis. Ĉiuj pensoj forlasis mian cerbon, kiel aro da birdoj arbon. Ŝajnas al mi, ke ion similan oni sentas mortante. Sed li havis serenajn vizaĝon kaj tuj ĉe la sojlo li diris, etendante al mi la manojn:

„Ni pasigis malbonan nokton — ĉu ne vere? Mi tion komprenas, ankaŭ mi estis iam juna.”

Mi ne respondis, mi komprenis nenion; mi ne kredis al miaj okuloj, ke mi vidas lin antaŭ mi. Kaj li, skuinte miajn

manojn, devigis min sidiĝi, okupis la seĝon kontraŭ mi kaj diris:

„Trankviliĝu kaj ni pace interparolu. Kara sinjoro, ĉu vi pensas, ke vi estis la sola, kiu ne dormis? Ankaŭ ni ne povis ekdormi. Kiam post via foriro iom pasis nia ekscitiĝo, venis dolora ĉagreno. Jes! Se io neatendata baras al homo la vojon, li perdas la kapon kaj moderemon. Ni ĉagreniĝis kaj, mi tion ne kaŝas, ni hontis. La infano forkuris en sian ĉambron, kaj ni, maljunaj, kiel ordinare faras la maljunuloj, komencis riproĉi unu la alian: „Vi estas kulpa pri tio.” — „Ne, vi estas kulpa.” Tia estas la homa naturo. Sed pripensinte, oni komencas bedaŭri: Li estas juna, honesta, kapabla, amas nian infanon tutkore, — kial, pro diablo, ni obstinis? Nur unu cirkonstanco povas senkulpigi nin! Se vi iam estos patro, vi komprenos, ke la gepatroj trovas neniun sufiĉe bona por sia infano. Sed poste ni pripensis, ke tio, kio ne sufiĉas al ni, eble tute sufiĉas al Tola; ni do decidis esplori, kion kaŝas la koro de l'knabino, kaj ni vokis ŝin al konsiliĝo. — Bona tria konsilisto! — Neniu tion neos! Kiam ŝi komencis ĉirkaŭpreni niajn genuojn kaj meti sur ilin la belan kapeton, tiam . . . la gepatra koro . . .!”

Kortuŝita li eksilentis kaj ni sidis sen vorto, sen movo, unu kontraŭ la alia. Ĉio, kion mi aŭdis, ŝajnis al mi sonĝo, fabelo, miraklo; pasis mia turmento kaj komencis reveni la espero. Li kvietiĝis kaj diris:

„Verŝajne vi kulpigis nin pri malnobleco, kaj ni ja estas bonaj homoj, kvankam tro rapidemaj; por pruvi ĉi tion, jen kion mi diros al vi: se vi preferas Tola-n ol vian ofendiĝon, venu ĉi tien . . .”

Li malfermis la brakojn, kaj mi ĉirkaŭprenis lian kolon, duone freneza, feliĉa. Mi sentis, ke io premegas mian gorĝon kaj mi povus nur ploregi. Mi volis nepre paroli, sed mi ne povis diri eĉ unu vorton. Mia animo estis plena de feliĉo,

mirego kaj dankemo. Ĉio ĉi trafis min kvazaŭ tondro; nek mia kapo, nek mia koro povis kompreni tion kaj mi sentis preskaŭ doloron pro la troo da ŝanĝoj kaj pensoj. La patro de Tola demetis delikate miajn manojn de siaj ŝultroj kaj, kisante mian frunton, diris:

„Bone, jam bone! Mi tion esperis, konante vian amon al Tola. Forgesu ĉion, kio okazis, kaj trankviliĝu.”

Vidante, ke mi vane batalas kontraŭ la kortuŝeco, li komen-
cis bonkore riproĉi min:

„Estu viro, venku vian malforton! Vi tremas kiel februlo. Ho, la etulino profunde penetris vian koron . . .”

„Profunde, tre profunde!” respondis mi pene.

La patro ridetis:

„Kvieta akvo ¹⁾ . . .”

Sendube mia granda amo flatis lian patran vantecon, ĉar li ŝajnis tre kontenta kaj ripetis, senĉese ridetante:

„Lapo! Vera lapo!”

Mi eksentis subite, ke, se mi restos en la ĉambro ankoraŭ kvaronon da horo, konfuzo tute ekregos mian kapon. Ordinare mi facile kontraŭstaras la kortuŝecon, sed tiuĉifoje la impresoj estis tro fortaj. Mi bezonis enspiri freŝan aeron, vidi la stratan movadon; sed antaŭ ĉio mi bezonis vidi Tola-n por konvinkiĝi, ke ŝi efektive ekzistas en la mondo, ke mi ne sonĝas, ke oni donas ŝin al mi.

Mi petis la patron, ke ni tuj iru en lian hejmon; li volonte konsentis.

„Mi mem intencis proponi tion al vi,” diris li, „ĉar certe ĉe ni ĉu platigas sian nazon sur la fenestra vitro, rigardante la straton. Nun vi ne povus paroli pri la aferoj, ni do pripa-
rolos ilin poste.”

Post kelke da minutoj ni jam estis sur la strato; en la

¹⁾ Pola proverbo: Kvieta akvo ŝiras la bordojn.

komenco mi rigardis la homojn, domojn kaj veturilojn kiel homo, kiu post longa malsano unuafoje promenas ekstere kaj sentas kapturniĝon. Iom post iom la movado kaj la freŝa aero rekonsciigis min. Jena penso forigis ĉiujn aliajn:

„Tola vin amas kaj post momento vi ekvidos ŝin.” Mi sentis fortegan pulsobaton en la tempioj, kvazaŭ mia kapo estus krevonta. Ankoraŭ antaŭ unu horo mi pensis, ke mi neniam revidos Tola-n, aŭ eble iam kiel edzinon de alia. Kaj nun mi iris al ŝi por diri, ke ŝi estos mia kaj mi iris, ĉar ŝi mem etendis al mi la manojn. Hieraŭ mi nomis ŝin senpensa pupo en la sama momento, kiam ŝi kisis la genuojn de l'gepatroj kaj petis pro ni ambaŭ. Mia koro estis plena de pento, doloro, de sento, ke mi ne indas Tola-n; mi solene decidis, ke ĉiun hieraŭan larmon mi rekompencos al ŝi per karesemo, fideleco kaj senlima sindonemo.

La amo faras aliajn homojn blindaj, sed ĉe mi tio ĉi ne povis okazi, ĉar por Tola parolis ŝiaj faroj. Ŝi kaŭzis la miraklon. Mi maljuste juĝis ŝin kaj ŝiajn gepatrojn. Se ili estus tiaj, kiaj mi ilin opiniis, ili ne estus cedintaj al la petegoj, ili ne estus kapablaj al la nehoma, anĝela boneco, kun kiu la patro venis al mi kaj diris: „Ni eraris — prenu ŝin!” Haltigis lin nek la societa konveneco, nek ambicio. Mi rememoris liajn vortojn: „Verŝajne vi kulpigis nin pri malnobleco, kaj ni ja estas bonaj homoj, kvankam tro rapidemaj.” Ju pli mi pensis pri miaj hieraŭaj kulpigoj, des pli hontigis min ilia boneco. Neniu superflua vorto aŭ frazo; ŝerca rideto — jen estis ĉio. Kiam mi nun rememoris tion, mi ekkaptis la manon de l'patro kaj estime levis ĝin al mia buŝo.

Li ree bonkore ekridetis kaj diris:

„Ni jam antaŭ longe decidis kun mia edzino, ke nia bofilo devas ami ankaŭ nin.”

Iliaj deziroj estis plenumitaj, ĉar mi jam amis ilin kiel

filo, pli frue ol mi fariĝis ilia bofilo.

Ĉar mi iris tre rapide, la patro komencis inciteti min: li spiregis, ŝajnigis laciĝon, diris, ke li ne povas plu sekvi min, plendis pri la varmego. Efektive, hieraŭ la vintro forkuris de nia lando. Varma vento krispigis la akvon en la urba parko. En la aero oni sentis la vivigan printempan blovon. Fine ni venis al la loĝejo de Tola. Ĉe la fenestro iu aperis kaj tuj kaŝis sin en la ĉambro, sed mi ne estis certa, ĉu tio estis Tola. Sur la ŝtuparo mia koro ree komencis bati. Mi timis la patrinon. Trairinte la manĝoĉambron, ni trovis ŝin en la salono. Kiam mi eniris, ŝi rapide proksimiĝis kaj etendis al mi al manon, kiun mi respektige kisis, balbutante:

„Ĉu mi tion meritas . . .”

„Pardonu al ni la hieraŭan rifuzon”, diris ŝi. „Ni ne pripensis, ke tian amon Tola ne trovos en la tuta mondo.”

„Tio estas vera! Tio estas vera, sinjorino!” ekkriis mi.

„Kaj, ĉar ni zorgas antaŭ ĉio pri la feliĉo de nia infano, ni konsentas doni ŝin al vi . . . kaj mi povas nur diri: Dio donu al vi feliĉon!”

Dirinte ĉi tion, ŝi kisis mian frunton, turnis sin al la pordo kaj vokis:

„Tolal . . .”

Kaj venis mia plej amata, pala, kun ruĝiĝintaj okuloj, kun malordaj harbukloj sur la frunto, same konfuziĝinta, kortuŝita, kiel mi. Kiamaniere mi estis kapabla ĉion rimarki, — mi ne komprenas. Mi scias nur, ke mi vidis la larmojn en ŝiaj okuloj, la tremantajn lipojn, la ĝojon, kiu briletis tra la larmoj, la rideton sub la konfuziĝo.

Unu sekundon ŝi staris kun mallevitaj brakoj, kvazaŭ ne celante, kion fari. La patro, kiun neniam forlasis la humoro, diris, levante la ŝultrojn:

„Hm! Nenio estas farebla! Li obstinas, li ne deziras vin.”

Tiam ŝi ekrigardis min, ĉirkaŭprenis la kolon de l'patro

kaj ekkriis pasie:

„Mi ne kredas tion, paĉjo, mi ne kredas!”

Se mi estus obeinta la volon de mia koro, mi estus min ĵetinta al ŝiaj piedoj. Mi ne faris tion, ĉar kuraĝo mankis al mi kaj ĉar mi perdis la kapon. Restis al mi nur tiom da konscio, ke mi ripetis al mi mem: „Azeno, nun, kriegu!” La divenema patro ree helpis nin, ĉar, liberiĝinte de l'ĉirkaŭpreno de Tola, li diris al ŝi, ŝajnigante koleron.

„Se vi al mi ne kredas, iru al li!”

Kaj li ŝovis ŝin al mi. En ĉi tiu momento la ĉielo al mi malfermiĝis. Mi kaptis ŝiajn manojn, premis ilin al mia buŝo, ne povante, mi ne scias kiel longe, forŝiri de ili miajn lipojn. Antaŭe mi ofte imagis, ke mi kisas ŝiajn manojn, sed ĉu la fantazio povas egali la realecon! Mia amo similis ĝis nun kreskaĵon, fermitan en malluma ĉambro. Subite oni portis ĝin en liberan aeron, permesis al ĝi ĝui la sunon kaj varmon. Plenega estis la pokalo de mia feliĉo. Mi trinkis malkaŝe el la fonto de l'ĝojo. Ami kaj kaŝi sian amon, kaj ami kun konvinko, ke oni havas la rajton por tio—estas du tute malsamaj aferoj. Sed, ĉu ĝis nun mi komprenis, ĉu mi povis kompreni tion?

La gepatroj, beninte nin, foriris kaj intence lasis nin solaj, por ke ni povu diri unu al la alia, kion ni sentas. Anstataŭ paroli, mi nur rigardis Tola-n kun ravo, kaj ŝia vizaĝo jen paliĝis, jen ruĝiĝis sub mia rigardo. La anguloj de ŝia buŝo tremetis pro timema kaj hontema rideto, ŝiaj okuloj malklariĝis, la kapeto kliniĝis flanken — de tempo al tempo ŝi mallevis la palpebrojn kaj kvazaŭ atendis miajn vortojn.

Fine ni sidiĝis kune ĉe la fenestro, tenante la manojn unu de l'altra. Ĝis nun ŝi estis por mi io senkorpa, abstrakta, pli ĝuste amata spirito, kara nomo, admirata ĉarmo, ol persono; sed nun, kiam ŝia brako tuŝis la mian, kiam mi sentis la varmon de ŝia vizaĝo, mi ne povis kontraŭstari al la miro,

ke ŝi estas io reala. Oni pensas, ke oni scias tion ĉi, sed oni sentas tion nur proksime de l'amata virino. Nun mi rigardis kun tia miro ŝiajn vizaĝon, buŝon, okulojn, ŝiajn helajn harojn kaj ankoraŭ pli helajn okulharojn, kvazaŭ mi neniam estus vidinta ilin. Mi satiĝis. Neniam virina vizaĝo plenumis tiel perfekte ĉiujn miajn revojn pri la virina ĉarmo, neniu tiel logis min. Kaj kiam mi pensis, ke ĉiuj ĉi tiuj trezoroj estos miaj, ke ili jam apartenas al mi kaj estas mia plej kara havo — la tuta mondo turniĝis kun mi.

Fine mi ekparolis. Mi komencis febre rakonti, ke mi ekamis ŝin de l'unua momento, antaŭ unu kaj duono da jaro en Vielička, kie mi renkontis ŝin en grandnombra societo ne konata de mi. Ŝi duonsvenis en la minejo, kaj mi alportis al ŝi akvon el la lageto. En la sekvinta tago mi vizitis ŝiajn gepatrojn kaj forlasis ŝian hejmon tute enamiĝinta. Ĉion tion ĉi ŝi sendube bone sciis, tamen ŝi aŭskultis kun plej granda plezuro, ridetante, ruĝiĝante, eĉ murmuretante demandojn de tempo al tempo. Mi parolis ankoraŭ longe kaj fine malpli malsage, ol mi tion timis, — mi rakontis, kiel ŝi poste fariĝis mia sola celo, mia sola ĝojo; kiel profunde malĝoja mi estis hieraŭ, kiam mi devis diri al mi, ke ĉio estas perdita, kaj kiam mi perdis konfidon eĉ al ŝi.

„Mi estis same malfeliĉa . . .” respondis ŝi. „Vere, en la komenco mi ne povis diri eĉ unu vorton, sed poste mi penis rebonigi ĉion.”

Momenton ni ambaŭ silentis. En mi la timemo ree batalis kontraŭ la deziro kisi ŝiajn piedojn; fine mi demandis ŝin mallerte, idiote, ĉu ŝi iom amas min.

Ŝi penis respondi al mi, sed ne povante fari tion, leviĝis kaj foriris.

Post momento ŝi revenis kun albumo, sidiĝis apud mi kaj montris al mi desegnaĵon — mian propran portreton.

„Mi desegnis ĝin el la memoro,” diris ŝi.

„Vi?”

„Sed tie estas ankoraŭ io,” daŭrigis ŝi, metante sian fingreton sur la paĝon.

Nur tiam mi rimarkis sur la marĝeno ĉe la rando malgrandajn literojn: *J. v. a.*

„Oni devas legi ilin france,” murmuretis ŝi.

„France?”

En mia senlima naiveco mi ankoraŭ ne povis diveni, kion tio signifas, ĝis ŝi komencis:

„*Je vous . . .*”

Subite, kaŝinte la vizaĝon en la manoj, ŝi kliniĝis tiel malsupren, ke mi povis vidi la mallongajn buklojn sur la kolo kaj la kolon mem. Fine mi komprenis kaj komencis ripeti kun batanta koro:

„Nun jam oni havas la permeson!”

Ŝi leviĝis ridetanta kaj radiantanta.

„Kaj la devon,” aldonis ŝi, palpebrumante kaj kvazaŭ ordonante.

Oni vokis nin al la matenmanĝo. Mi miras, ke mi ne englutis tiam la tranĉilojn kaj forkojn.

* * *

Al nenio oni kutimas tiel rapide, kiel al la feliĉo. Ĉio, kio okazis, estis ja vico da mirakloj; tamen post du tagoj tio ŝajnis al mi tute natura, ke Tola estas mia fianĉino; ŝajnis al mi, ke mi rajte devis ricevi ŝin — ĝuste tial, ke neniu tiel amis ŝin, kiel mi.

* * *

Oni baldaŭ eksciis en la urbo pri mia fianĉiĝo, kaj mi komencis ricevi la dezirojn de miaj kolegoj. Mi veturis kun Tola kaj kun ŝiaj gepatroj ekster la urbon por promenado kaj multe da personoj vidis nin kune. Tola en sia palto „loutre” kaj en sama ĉapo estis belega; ŝia diafana vizaĝkoloro ŝajnis ankoraŭ pli delikata ĉe la malhele blua pelto.

Ĉiuj rigardoj sin turnis al ni, kaj kelkaj miaj konatoj haltis, ŝtoniĝinte pro mirego.

Post la urba pordego, preterpasinte vicon da dometoj pli kaj pli malgrandaj, ni fine atingis liberan spacon. Sur la kampoj inter la bedoj lumetis la akvoj, kvazaŭ brilantaj rubandoj. La herbejoj estis tute superakvitaj, la arboj — senfoliaj, sed oni jam sentis la printempon. Venis la tempo de l'krepusko, kiam en la tuta naturo granda trankvilo estas.

Sama trankvilo ĉirkaŭprenis ankaŭ nin. Post la tremigantaj impresoj de la lastaj tagoj mi sentis grandan, dolĉan, kvietan feliĉon. Antaŭ mi mi vidis la amatan vizaĝon de Tola, ruĝan pro la vento, ankaŭ kvietan en la vespera silento. Ni ambaŭ silentis kaj rigardis unu la alian, ridetante de tempo al tempo. La unuan fojon en mia vivo mi komprenis, kio estas perfekta feliĉo. Mi estis juna kaj ne multon travivis; mia konscienco do ne estis tre ŝarĝita per pekoj, tamen, kiel ĉiu homo, mi ne estis sen kulpoj, eraroj kaj mankoj. En tiu momento mi ne sentis la ŝarĝon, mi sentis neniun malkontenton aŭ koleron kontraŭ la homoj; mi estis preta ĉiun pardoni, ĉiun helpi, unuvorte mi estis kvazaŭ renaskiĝinta: la amo forprenis mian animon kaj anstataŭe metis animon anĝelan.

Ka, estis tiel, ĉar oni permesis al mi ami kaj donis al mi la karan estaĵon, kiu nun sidis kontraŭ mi. Pro la sama kaŭzo la kvar personoj, kiuj sidis en la kaleŝo, estis ne nur pli feliĉaj, sed ankaŭ pli bonaj, ol antaŭe. Ĉiujn vantaĵojn, ambiciojn, ĉion, kio faras la vivon triviala kaj hipokrita, ni forskulis de ni kune kun la antaŭa ĉagreno. Tuj, kiam la gepatroj de Tola malfermis la pordon al la benita gasto — la amo, ni komencis kompreni la vivon pli vaste kaj pli alte ol antaŭe. Tial mi ne komprenis, kial la homoj tiel ofte forpudas la solan, plej grandan feliĉon de l'vivo.

Sed ankoraŭ pli ofte ili malŝparas ĝin. Mi diris al mi: mi

konas tiujn opiniojn, disvastigitajn ĉe la homoj kiel falsajn monerojn, ke la amo maljuniĝas, velkas, pasas, malaperas kaj ke postĉe nur kutimo ligas la virinon kaj viron. Mi pruvos, ke ĉi tiu aksiomo koncernas nur homojn malsaĝajn aŭ malnoblajn, sed ne elektitajn animojn; mi jam konis tiajn kaj mi mem nepre estos tia. Se ĉi tiu flamo faras min tiel feliĉa, mia devo, eĉ mia egoismo igas min subteni la flamon, por ke ĝi ne estingiĝu, nek malgrandiĝu en la estonteco. Mi vokas do la estontecon! Ĝi havas tempon, mi mian grandan amon kaj bonajn intencojn. Vivi kun Tola kaj ĉesi ami ŝin — nition vidos!

Subite mi varmege ekdeziris plej baldaŭ komenci ĉi tiun vivon. Mi sciis, ke la societaj moroj ne permesas al la gefianĉoj edziĝi antaŭ ol pasos multaj semajnoj kaj monatoj, sed mi rememoris, ke la gepatroj de Tola ne estas ordinara homoj. Krome mi estis certa, ke Tola helpas min, kaj mi decidis fari ŝin mia liganino.

Kiam, reveninte hejmen, ni restis solaj, mi konfesis al ŝi miajn pensojn. Ŝi aŭskultis kun granda plezuro. Mi rimarkis, ke ne nur la projekto, sed ankaŭ la konsiliĝo, havanta la ĉarmon de konspiro, ŝin ravas. Ŝi havis mienon de infano, al kiu oni promesas, ke baldaŭ okazos neordinara ludo; ŝi eĉ dancis en la ĉambro. En ĉi tiu vespero ni nenion diris pri tio al la gepatroj; ĉe la teo mi rakontis nur pri miaj esperoj, intencoj kaj vojoj irotaj. La gepatroj aŭskultis min, kvazaŭ ili opiniis, ke la esperoj jam estas plenumitaj. Eĉ se mi supozus, ke ĉi tiuj bonkoraj homoj agas tiel pro diplomatio, mi devus konsenti, ke ĝi estas plej bona diplomatio, ĉar vidante ilian konfidon, mi diris al mi: Mi pravigos vian konfidon, eĉ se mi devus perdi la vivon!

Mi foriris malfrue. Tola kuris post mi kaj ripetis ankoraŭ en la antaŭĉambro:

„Bone! Bone! Kial prokrasti? Mi ne amas malrapidemon!

Bone! Bonan nokton. Mi timas nur panjon pro la dota vestaro."

Mi neniam povis kompreni, kial oni preparas vestaron antaŭ la edziĝo; la fraŭlinoj ja devas havi provizon da vestoj; aliflanke ĉiuj tiaj esprimoj certigantaj, ke mi ne songas, ke mi efektive edziĝos kun Tola, ekstreme feliĉigis min. Revenante hejmen, mi ripetis nevole: Vestaro! vestaro! Mi ne supozis, ke ĝi povus iel malhelpi nin. Per miaj animaj okuloj mi vidis multe da helaj, multkoloraj, malhelaj vestoj kaj amis ilin ĉiujn unu post alia. Nur tiam mi ekpensis, ke mi devas ankaŭ prepari hejmon por Tola. Ĉi tiu penso estis plena de nova ĉarmo. La mono mankis al mi, tamen mi decidis aranĝi ĉion plej baldaŭ. Nokte mi ne povis dormi, ĉar mia kapo estis plena de vestoj, ŝrankoj, tabloj, seĝoj k. t. p. Antaŭe mi ne povis dormi pro ĉagreno, nun pro feliĉo.

* * *

En la sekvinta tago mi estis ĉe la lignaĵisto. Li tuj komprenis, kion mi bezonas. Li montris al mi diversajn meblojn. Rigardante ilin, mi imagis, ke tio estas nia geedza loĝejo, ke mi jam vivas kune kun Tola. Mia koro ekbatis rapide. La lignaĵisto konsilis kolorigi la murojn, ĉar la paperaj tapetoj sekigis tro longe. La komplezema homo promesis aranĝi ĉion por modera rekompenco.

De li mi iris al du kolegoj plej amikaj por peti, ke ili estu miaj fianĉokunuloj. Familianon mi havis neniun. La deziroj de miaj amikoj miksiĝis en mia kapo kun aliaj impresoj kaj formis veran haoson.

* * *

Mi trovis Tola-n en la salono; mi apenaŭ havis tempon kisi liajn manojn, kiam ŝi stariĝis sur la piedfingroj kaj murmuretis en mian orelon unu solan vorton:

"Mi konsentis!"

La lasta ombro, kiu kovris mian feliĉon, malaperis. Tola

radiis pro ĝojo. Ni promenis en la ĉambro, brakon ĉe brako, kaj babilis. Ŝi rakontis al mi, kiel ĉio okazis.

„Panjo diris en la komenco, ke tio estas neebla, kaj aldonis: „Vi tute ne komprenas, kiel ne dece estas, ke juna fraŭlino rapidas al la edziĝo.” Mi respondis, ke ni ambaŭ rapidas. Panjo levis la okulojn al la plafono kaj ekmovis la ŝultrojn; paĉjo, ridante, premis min al si kaj kisis mian kapon, eĉ miajn manojn. Panjo diris al li: „Vi estis ĉiam malforta por ŝi, oni ja devas iom atenti la mondon.”

Tiam paĉjo rediris: „La mondo! la mondo! . . . La mondo ne donos al ili la feliĉon, ili mem devos akiri ĝin; en ĉi tiu afero ni tute malatentis la mondon — ni agu same ĝis la fino. Nun estas la fasto-tempo, sed tuj post Pasko ili povos edziĝi kaj la dotan vestaron oni preparos poste.”

Panjo cedis, ĉar ĉiam venkas la volo de paĉjo . . . (Vi sendube estos sama.) Mi tiel kisis panjon, ke ŝi ne povis ekparoli. Poste ŝi ripetis: „Frenezuloj, frenezuloj!” Mi do triumfis en la batalo. Ĉu vi estas kontenta?”

La amo faris min tiel timema, ke ĝis nun mi neniam kuraĝis ĉirkaŭpreni ŝin. Hodiaŭ unuafoje mi volis kisi ŝin, sed ŝi delikate eliĝis, dirante:

„Tiel agrable estas iri brakon ĉe brako . . . kiel ĝentilaj infanoj.”

Kaj ni daŭrigis la promenadon. Mi rakontis al ŝi, ke mi jam zorgis pri la loĝejo kaj ke mi ordonis kolorigi la murojn, ne per olea kolorilo, ĉar ĝi kostas tro multe, sed per alia, kiu tute similas la olean kaj rapide sekiĝas. Tola ripetis: „Rapide sekiĝas . . .” kaj mi ne scias, kial ni ambaŭ ekridis, verŝajne pro troaj ĝojo kaj feliĉo. Poste ni interkonsentis, ke la salono estos ruĝa, ĉar la kapoj kontrastas plej bele la ruĝan fonon. La manĝoĉambro havos pale-verdajn kahelojn fajencosimilajn, pri aliaj ĉambroj ni ne povis plu paroli, ĉar boto de Tola malligiĝis kaj ŝi iris en alian ĉambron por ĝin ligi.

H. SIENKIEWICZ

Post momento ŝi revenis kun la patro, kiu nomis min flamema kapo, sed samtempe promesis, ke nia edziĝo okazos la unuan mardon post la festoj.

* * *

En la unuaj tagoj nia amo estis plena de kortuŝiĝo kaj havis senĉese larmojn en la okuloj, sed poste ĝi ekfloris gaje, kiel printempa floro. Nun ni ridis la tutan tagon.

* * *

Pro la malfruaj festoj la printempo jam ekregis sur la tero. La arboj estis kovritaj de burĝonoj. Antaŭ la sankta semajno ni faris vizitojn kun Tola kaj kun la gepatroj. Oni rigardis min tiel scivole, ke iafoje mi volonte estus min kaŝinta. Kelkaj pli maljunaj sinjorinoj eĉ metis okulvitrojn. Sed ĉion oni devis toleri. Tola, freŝa kaj gaja kiel birdo, milfoje rekom-pencis min pro la tedaj vizitoj.

* * *

Mi mem kontrolis la kolorigon de l'ĉambroj. Pro la bela vetero ĉio sekiĝis ekstreme rapide. La dormoĉambron mi ordonis kolorigi ruĝa.

* * *

Mi amis Tola-n pli kaj pli varmege. Nun mi estis certa, ke, eĉ se ŝi ŝanĝiĝus aŭ malbeliĝus, mi dirus al mi: „Mal-feliĉo min trafis,” sed mi ne ĉesus ami ŝin. En tia stato la homo tiel sin donas al la amata virino, ke li ne scias, kie finiĝas lia propra *mi*.

* * *

Ofte ni ludis, kiel infanoj; iafoje ni incitetis unu la alian. Je eksemple, veninte matene, mi trovis ŝin sola, mi komen- cis ĉirkaŭrigardi en la ĉambro, kvazaŭ ne vidante ŝin, serĉi kaj demandi: „Ĉu neniue enamiĝinta estas ĉi tie?” Kaj ŝi, rigardante en ĉiujn angulojn kaj skuante la helan kapeton, respondis: „Ne, neniue! . . .” „Kaj ĉi tiu fraŭlino?” „Jes, ŝi

iomete! . . .” Post momento ŝi aldonis murmurete: „Eble eĉ tre!”

Nova sento kunplektiĝis kun mia amo. Mi ne nur amis Tola-n, sed mi ankaŭ ŝatis ŝin. Mi preferis ŝian societon ol ĉion. Mi pasigis kun ŝi tutajn horojn, babilante pri io ajn. Iafoje ni parolis serioze pri nia estonteco, kvankam ĝenerale mi evitis ĉiujn diskutojn kaj teoriojn pri la geedza vivo. Mi pensis: kial meti en antaŭpreparitajn formulojn tion, kion instruas al ni la amo? Oni ja ne bezonas klarigi al la floroj la teorion de l’florado!

* * *

La sankta sabato pasis trankvile, malgaje. En la stratoj estis nebulo kaj falis eta pluvo. Mi vizitis kun Tola kaj ŝiaj gepatroj la tombojn de Savinto en la preĝejoj kaj ni oferdonis, laŭ eblo, sur la almozpletojn. Tola, nigre vestita, serena, kvieta kaj serioza, ŝajnis al mi pli bela ol iam. En la preĝeja krepusko, ĉe la ekflagrado de la kandeloj, ŝi ŝajnis ĉiela anĝelo. En ĉi tiu tago ŝi iom malvarmumis kaj mi kuris en ĉiujn magazenojn por aĉeti maljunan malagon, kiun iu konsilis al ŝi trinki.

* * *

La festojn mi pasigis ĉe la gepatroj de Tola. Mi havas plu neniun el mia propra familio, kaj nun mi komprenis, kion signifas havi siajn karajn kaj esti kara por iu. En la dua festotago estis jam plena printempo.

Nia hejmo estis jam preskaŭ tute aranĝita jam antaŭ la festoj. La ĝardeneto jam verdiĝis, la maljunaj ĉerizarboj floris.

Antaŭ la festoj aperis ankaŭ mia doktora disertacio pri la Novoplatonanoj. Tola komencis legi ĝin. La kompatindulino palpebrumis pro enuo, turnis senĉese la kapon, sed legis pro la sento pri la devo.

* * *

Kaj nun en mia kapo senorde, febre puŝas unu la alian la rememoroj — ne — pli ĝuste la figuroj de nia edziĝa festo. Ĉie mi vidas multegon da floroj, sur la ŝtuparo, en la ĉambroj. En la domo kurado, venado de gastoj, multe da fremdaj aŭ preskaŭ nekonataj vizaĝoj. En la salono Tola, blanke vestita, kun longa vualo, bela kiel anĝelo, sed alia ol ordinare, pli solena, pli fremda. Restis al mi impresoj pri maltrankvila rapidado. Ĉio, kio okazis post la forveturo preĝejon, mi rememoras malklare: la preĝejo, altaro, kandeloj, flanke helaj tualetoj de l'sinjorinoj, scivolaj okuloj, murmuretoj. Ekĝenuinte kun Tola antaŭ la altaro, ni donis la manojn unu al la alia kaj post momento eksonis niaj voĉoj, kiuj ŝajnis al mi tute fremdaj:

„Mi prenas vin al mi . . .” k. t. p. Mi aŭdas ankoraŭ la orgenon kaj la laŭtan kanton, kiu eksonis subite en la ĥoro: „*Veni Creator . . .*” La eliron el la preĝejo mi tute ne memoras, la edziĝan festenon nur malklare; la beno de l'gepatroj, la vespermanĝo . . . Tola sidis apud mi kaj mi rememoras, ke ŝi ĉiuminute premis la manojn al la brulantaj vangoj. Tra la bukedoj sur la tablo mi vidis diversajn vizaĝojn, kiujn mi hodiaŭ ne rekonas. Oni trinkiŝ por nia sano kun tinto kaj bruoj. Ĉirkaŭ noktomezo mi prenis mian sedilon hejmen.

Mi neniam forgesos la reveturon: ŝia kapo estis apogita al mia brako, ŝia blanka vualo odoris violojn.

* * *

En la sekvinta tago mi atendis ŝin en la manĝoĉambro de la teo. Dume ŝi sin vestis kaj eliris tra alia pordo en la ĝardenon, — mi ekvidis ŝin tra la fenestro inter la florantaj arbaroj. Mi tuj kuris al ŝi, sed ŝi deturnis sin kaj apogis la kapon al trunko, kvazaŭ kaŝante sin de mi.

Mi pensis, ke ŝi ŝercas kaj mi proksimiĝis mallaŭte, ĉirkaŭprenis ŝin kaj diris:

„Bonan tagon. Ĉu oni sin kaŝas de l'edzo? Kion vi faras ĉi tie?”

Sed mi rimarkis, ke ŝi ruĝiĝas, ke ŝi evitas mian rigardon kaj efektive penas kaŝi sin.

„Kio al vi estas, Tola?” demandis mi.

„Mi vidas . . .,” diris ŝi konfuziĝinte, „ke la vento forskuis la florojn de l'ĉerizarboj . . .”

„Ĝi tute forskuu ilin,” respondis mi, „se nur vi restos al mi . . .”

Kaj mi klinis ŝian vizaĝon al la mia; ŝi murmuretis kun fermitaj okuloj:

„Ne rigardu min, foriru . . .”

Sed samtempe ŝi proksimigis sian buŝon al mi preskaŭ pasie, kaj mi avide premis al ĝi miajn lipojn.

La vento ŝutis blankajn florojn sur niajn kapojn.

* * *

Vekiĝinte, mi ekvidis la nudajn murojn de mia ĉambro. Mi havis tifon — tre danĝeran tifon. Du semajnojn mi kuŝis senkonscia.

Sed eĉ la febro estas iafoje kompatema donaco de Dio.

Rekonŝciiĝinte, mi eksciis, ke la gepatroj de fraŭlino Antonino forveturis kune kun ŝi Venecion.

Kaj mi, ree sola kiel antaŭe, finas mian rakonton per konfeso, kiu eble ŝajnos stranga: En miaj febraj sonĝoj mi estis tiel senlime feliĉa, ke, kvankam mi komencis skribi nur por konservi al la aliaj miajn ironiajn observojn de l'vivo, mi finas sen doloro kaj kun la antaŭa kredo, ke el ĉiuj fontoj de l'feliĉo tiu, el kiu mi trinkis en la febro, estas plej pura kaj plej vera.

Vivo, kiun ne vizitas la amo eĉ en sonĝo, — estas ankoraŭ pli malĝoja.

H. SIENKIEWICZ
QUO VADIS?

Fragmento.

Preskaŭ en la sama momento la prefekto de l'urbo ĵetis antaŭ sin ruĝan tukon, kaj ĉe tiu ĉi signo la pordaj kroĉiloj antaŭ la imperiestra podio ekgrincis kaj el la malluma kavo eliris sur la helan arenon Ursus.

La grandegulo palpebrumis, blindigita de la lumo; post momento li iris sur la mezon de l'areno kaj rigardis ĉirkaŭe, kvazaŭ volante ekscii, kontraŭ kio li devos batali. Ĉiuj aŭgustanoj kaj la plimulto da publiko sciis, ke li estas la viro, kiu sufokis Krotonon. Murmuro eksonis sur ĉiuj benkoj. En Romo ne mankis gladiatoroj, kies kresko multe superis la ordinaran homan altecon, sed tian koloson neniam ankoraŭ vidis la okuloj de l'kviritoj. Cassius, kiu staris sur la podio post Cezaro, ŝajnis, kompare kun la ligo, malgranda hometo. La senatanoj, vestaloj, Cezaro, aŭgustanoj kaj la popolo rigardis kun admiro de kompetentuloj kaj amantoj liajn potencajn femurojn, dikajn kiel branĉegoj, lian bruston, similantan du kunigitajn ŝildojn, liajn herculesajn brakojn. La murmuro pli kaj pli laŭtiĝis. Por ĉi tiu homamaso ne povis ekzisti pli granda ĝuo, ol vidi tiajn muskulojn streĉitajn en batalo. La murmuro fariĝis krio. Ĉiuj demandis, kie loĝas la popolo, kiu naskas tiajn grandegulojn. Ursus staris en la mezo de l'amfiteatro, nuda, pli simila al ŝtona koloso, ol al homo, kun atentema kaj samtempe malĝoja mieno de barbaro. Vidante, ke la areno estas malplena, li mire rigardis per siaj bluaj okuloj de infano jen la publikon, jen Cezaron, jen la kradojn de l'*cunicula*, de kie li atendis siajn ekzekutistojn.

En la momento, kiam li iris sur la arenon, lia simpla koro lastfoje pli forte batis pro l'espero, ke la kruco lin atendas,

sed, kiam li ekvidis nek krucon, nek pretan kavon, li pensis, ke li ne indas ĉi tiun favoron kaj ke li estas mortonta alie, kredeble inter la dentoj de sovaĝaj bestoj. Li estis sendefenda kaj decidis morti, kiel konvenas al adoranto de „Ŝafido,” trankvile kaj pacience. Dume li volis preĝi al Savinto; li do ekgenuis sur la areno, kunmetis la manojn kaj levis la rigardon al la steloj, kiuj briletis tra la supra malfermo de l'cirko.

Lia konduto ne plaĉis al la rigardantoj. Oni vidis jam sufiĉe da kristanoj, kiuj mortis kiel ŝafoj. Oni komprenis, ke, se la grandegulo sin ne defendos, la spektaklo malsukcesos. Tie ĉi kaj tie eksonis sibloj. Oni komencis voki la mastigoforojn, kies devo estis vipi la malkuraĝajn batalantojn. Sed post momento ĉio eksilentis, ĉar neniuj sciis, kion faros la grandegulo, kiam li renkontos la morton, okulon kontraŭ okulo.

Oni ne longe atendis. Subite eksonis laŭtege kupraj trumpetoj kaj post ĉi tiu signo malfermiĝis la kradoj kontraŭ la imperiestra podio kaj sur la arenon sin ĵetis kolosa germana uro, portanta sur la kornoj nudan virinan korpon.

„Ligio! Ligio!” kriis Vinicius.

Li ŝiris la harojn sur la tempioj, kurbiĝis kiel homo, kiu eksentis en sia brusto la pinton de lanco kaj komencis ripeti per raŭka, nehoma voĉo:

„Mi kredas, mi kredas! Kristo, miraklon!”

Kaj li ne sentis, ke Petronius kovras lian kapon per la togo. Ŝajnis al li, ke la morto aŭ doloro blindigas liajn okulojn. Li ne rigardis, li ne vidis. Sento de terura malpleno ĉirkaŭis lian animon; en lia kapo restis neniuj penso, nur lia buŝo ripetis, kvazaŭ freneze:

„Mi kredas! Mi kredas! Mi kredas!”

Subite eksilentis la amfiteatro. Kvazaŭ unu homo ekstariis la aŭgustanoj, ĉar io eksterordinara okazis sur la areno. Humila kaj preta morti, la ligo, ekvidinte sian reĝidinon

sur la kornoj de l'sovaĝa besto, eksaltis kiel brulvundita kaj, kurbiĝinte, komencis kuri oblikve al la furiozanta uro.

El ĉiuj brustoj elŝiriĝis mallonga krio de mirego, post kiu eksilentis la cirko. La ligo dume atingis la ŝaŭmantan beston kaj kaptis ĝiajn kornojn.

„Rigardu!” ekkriis Petronius, kaj forŝiris la togon de l'kapo de Vinicius.

Tiu ĉi leviĝis, klinis posten sian vizaĝon, palan kiel tolo, kaj ekrigardis la arenon per vitrecaj, senkonsciaj okuloj.

Ĉiuj brustoj ĉesis spiri. En la amfiteatro oni povus aŭdi flugantan muŝon. Oni ne kredis al la propraj okuloj. Dum la tempo, kiam ekzistas Romo, oni vidis nenion similan.

La ligo tenis la beston per la kornoj. Liaj piedoj penetris ĝis super la maleoloj en la sablon, lia dorso kurbiĝis kiel streĉita pafarko, la kapo kaŝiĝis inter la ŝultroj, sur la brakoj la muskoloj tiel ŝvelis, ke la haŭto preskaŭ krevis sub ilia premo, sed li haltigis la uron. La besto kaj la homo restis senmovaj; al la rigardantoj ŝajnis, ke ili vidas pentraĵon, prezentantan la heroaĵojn de Herkuleso aŭ Tezeo, aŭ ŝtonan grupon. Sed en la ŝajna senmoveco oni povis rimarki la teruran penegon de la batalantaj fortoj. Ankaŭ la uro, same kiel la homo, eniĝis en la sablon, kaj ĝia malpala, vila korpo tiel kuntiriĝis, ke ĝi ŝajnis simila al grandega globo. Kiu malfortiĝos unua, kiu falos unua? Jen estis la demando, kiu en tiu momento estis pli grava por ĉi tiuj amantoj de cirkaj bataloj, ol tuta Romo kaj ĝia mondoregado. La ligo estis nun per ili duondio, kiu indas adoradon kaj skulptaĵojn. Ankaŭ Cezaro leviĝis. Li kaj Tigellinus aŭdis pri la forto de ĉi tiu viro, intence aranĝis la batalon kaj diris moke: „Venku ĉiu Krotonmortiginto la bovon, kiun ni elektos por ti.” Sed nun kun mirego ili rigardis la arenon, kvazaŭ ne kredante, ke ili vidas realaĵon. En la amfiteatro oni vidis homojn, kiuj, levinte la manojn, restis tiaj, senmovaj; ŝvito

aperis sur la fruntoj de aliaj, kvazaŭ ili mem batalus kontraŭ la besto. En la cirko oni aŭdis nur la sibladon de la flamoj en la lampoj kaj la murmureton de l'karboj, defalantaj de l'torĉoj. La voĉo ekmortis en la buŝoj de l'rigardantoj, la koroj batis, kvazaŭ volante krevigi la brustojn. Al ĉiuj ŝajnis, ke la batalo daŭras jam jarcentojn.

Same staris sur la areno la homo kaj la besto ŝajne senmovaj.

Subite eksonis bleko, simila al ĝemo, post kiu ĉiuj ekkriis kaj ree ekregis silento. Al la homoj ŝajnis, ke ili songas: la grandega kapo de l'bovo turniĝis malrapide en la feraj manoj de l'barbaro.

La vizaĝo de la ligo, la nuko kaj la brakoj ruĝiĝis purpure, la dorso pli forte kurbiĝis. Oni povis rimarki, ke li uzas la reston de siaj superhomaj fortoj, sed ke ili sufiĉos jam por nelonge.

La pli kaj pli raŭka kaj dolora blekado de l'uro miksiĝis kun la siblanta spirado de la brusto de l'grandegulo. La kapo de l'besto turniĝis pli kaj pli, el la buŝo eliĝis la longa lango kovrita de saŭmo.

Ankoraŭ unu momento, kaj la orelojn de pli proksimaj rigardantoj atingis kvazaŭ krakado de rompataj ostoj. La besto falis teren kun la nuko morte turnita.

La grandegulo forigis la ŝnurojn de la kornoj, prenis la virgulinon sur la brakojn kaj komencis rapide spiri.

Lia vizaĝo paliĝis, la haroj gluiĝis pro la ŝvito, la ŝultroj kaj brakoj estis kvazaŭ surverŝitaj de akvo. Unu momenton li staris kvazaŭ duonkonscia, poste li levis la okulojn kaj komencis rigardi la publikon.

La amfiteatro freneziĝis.

La muroj de l'konstruaĵo komencis tremi pro la bruego de kelkdekoj da miloj da homoj. De la komenco de l'bataloj oni ne vidis tian ekscitegon. La publiko forlasis la suprajn ben-

kojn kaj iris malsupren, puŝante unuj aliajn en la trairoj inter la benkoj, por pli bone vidi la fortegulon. De ĉie eksonis voĉoj, kiuj pasie, obstine petis pardonon kaj baldaŭ fariĝis unu, ĝenerala krio. Al ĉi tiu popolo, adoranta la fizikan forton, tiu ĉi grandegulo fariĝis nun kara kaj unua persono en Romo.

Li komprenis, ke la popolo postulas, ke oni donacu al li la vivon kaj liberecon, sed li zorgis ne nur por si mem. Momenton li rigardis ĉirkaŭe, poste li proksimiĝis al la imperiestra podio kaj, balancante la korpon de l'knabino sur la etenditaj brakoj, li levis la okulojn petege, kvazaŭ li volus diri:

„Sin kompatu! Sin savu! Por ŝi mi faris ĉi tion!”

La rigardantoj komprenis bone, kion li deziris. La sveninta knabino, kiu kompare kun la grandega korpo de la ligo ŝajnis malgranda infano, kortuŝis la popolamason, la kavalirojn. Ŝia eta, alabastre blanka korpo, ŝia sveno, la terura danĝero, el kiu liberigis ŝin la grandegulo, fine ŝia beleco kaj lia sindonemo tremigis la korojn. Kelkaj pensis, ke li estas ŝia patro, kaj ke li petas kompaton kaj pardonon por sia infano. La kompato subite ekflamis kvazaŭ fajro. Sufiĉe da sango, morto kaj turmentego! Sufokiĝantaj pro larmoj, rakaj voĉoj kriis pardonon por ambaŭ.

Dume Ursus iris ĉirkaŭ la areno kaj lulante la knabinon sur la brakoj, per la movoj kaj okuloj petis por ŝi pri la vivo. Nun Vinicius leviĝis de sia seĝo, transsaltis la ĉirkaŭbaron, kiu apartigis de l'areno la unuajn benkojn, kuris al Ligio kaj kovris per la togo ŝian nudan korpon.

Poste li disŝiris la tunikon sur la brusto, malkovris la sulkatojn, kiuj restis post la vundoj, ricevita en la armenia milito, kaj etendis la manojn al la popolo.

La eksciteco de la publiko superis ĉion, viditan iam ajn en la amfiteatroj. La popolamaso komencis piedfrapi kaj

kriegi. La voĉoj fariĝis minacaj. La popolo petis nun ne nur por la atleto, sed defendis ankaŭ la virgulinon, la militiston kaj ilian amon. Miloĵ da viroj sin turnis al Cezaro kun kolera brilo en la okuloj kaj kun kunpremitaj pugnoj. Sed li malrapidis kaj ŝanceliĝis. Li sentis nenian malamon kontraŭ Vinicius kaj la vivo aŭ morto de Ligio estis por li indiferenta; tamen li preferus vidi la korpon de l'knabino disŝirita per la kornoj de l'bovo aŭ per la dentoj de l'sovaĝaj bestoj. Lia krueleco, liaj degenerintaj instinktoj kaj fantazio ĝuis tiajn vidaĵojn. Kaj jen la popolo volis forpreni ilin de li. Ĉe tiu penso kolero ekbrilis sur lia grasa vizaĝo. Ankaŭ la ambicio ne permesis al li cedi al la volo de l'homamasoj, kaj samtempe pro malkuraĝeco li ne riskis kontraŭstari.

Li do komencis ĉirkaŭrigardi, ĉu almenaŭ iuj el la aŭgustanoj turnis la fingrojn malsupren, kiel signon de l'morto. Sed Petronius levis la manon supren kaj rigardis preskaŭ minace lian vizaĝon. Superstiĉa, sed ekscitiĝema Vestinus, kiu timis la spiritojn, sed ne timis la homojn, donis la signon de pardono. La samon faris senatano Scevinus, la samon Nerva kaj Tullius Senecio, la samon la maljuna, glora militestro Ostorius Scapula kaj Piso kaj Vetus kaj Crispinus kaj Minucius Thermus kaj Portius Telesinus kaj respektata, ŝatata de l'popolo Thraseas. Vidante tion, Cezaro mallevis la smeraldon, kiun li tenis antaŭ sia okulo kun esprimo de malŝato kaj malkontento, sed Tigellinus, kiu volis kolerigi Petronius-on, kliniĝis al Nero kaj murmuretis:

„Ne cedu, dia; ni havas la pretorianojn.”

Nero turnis la okulojn al la loko, kie staris la komandanto de la pretorianoj, severa kaj tutkore al li fidela Subius Flavius, kaj ekvidis ion eksterordinaran. La vizaĝo de la maljuna tribuno estis severa, sed surverŝita de larmoj, kaj la manoj li etendis supren.

Dume rabio ekokupis la korojn de l'homamasoj. Polva

nebulo leviĝis pro l'piedfrapado kaj kovris la amfiteatron. Estis aŭdeblaj krioj: „Ahenobarbus! Patrinmortiginto! Brulkrimulo!”

Nero ektimis. En la cirko la popolo estis la sola estro. La antaŭaj cezaroj, precipe Caligula, kuraĝis iafaje kontraŭstari ĝian volon, sed tio kaŭzis ĉiam ribelojn, eĉ sangverŝon. Sed alia estis la pozicio de Nero. Unue li bezonis la popolon, kiel komedianto kaj kantanto, due li volis havi ĝin sia partiano kontraŭ la senato kaj patricioj, fine post la brulo de Romo li penis per ĉiuj rimedoj reakiri ĝian favoron kaj turni ĝian koleron kontraŭ la kristanoj. Nun li komprenis, ke danĝere estus pli longe malcedi. Ribelo, komenciĝinta en la cirko, povus malobeigi la tutan urbon kaj havi ne antaŭvideblajn konsekvencojn.

Lia do ekrigardis ankoraŭ unu fojon Sobrius Flavius-on, centurion Scevinus, la parencon de l'senatano kaj, vidante ĉie sulkiĝintajn brovojn, kortuŝitajn vizaĝojn kaj fiksitajn sur li rigardojn, li donis la signon de pardono.

Pulmotondraj aplaŭdoj eksonis sur ĉiuj benkoj. La popolo jam estis certa pri la vivo de l'kondamnitoj, ĉar nun ĝi fariĝis ilia zorganto kaj eĉ Cezaro ne kuraĝus plu persekuti ilin per sia venĝo.

★ ★

★

M. GAWALEWICZ

LA LASTA AMKUNVENO

Ĉu vi scias, kiam mi konvinkiĝis, ke mi estas maljuna? . . . De l'momento, kiam mi trovis sur mia kapo la unuan grizan haron? . . . Ne, vi eraras.

La arĝentaj fadenoj sur miaj tempioj tute nu timigis min; kontraŭe — mi povas certigi vin, ke mi salutis ilin per rideto. Mia frizisto volis elŝiri ilin; mi ne permesis . . . Ĉi tiu arĝento sur la kapo eltiris multe da oro el mia poŝo.

Viro en sia kvardeka jaro ne sen kaŭzo griziĝas. La antaŭtempa grizeco sendube kostis ion, se ne kontantan monon, ion pli multekostan, ĉar . . . Sed ni lasu tion! . . . Mi preferas rakonti al vi, kiamaniere mi konvinkiĝis, ke mi komencas maljuniĝi.

Kuŝiĝu, mi petas vin, sur la kanapo; vi ne amas kuŝi sur ursa felo? . . . kial? . . . Mi kontraŭe tre amas tion. Ĉiutage post la tagmanĝo mi faras ĉi tie mian sieston kun cigaro en la buŝo kaj kun libro en la mano; varme estas sur la haregoj kaj kun la aĝo la homo fariĝas sibirito.

Ĉu mia kafo kaj likvoro estas bongustaj? Jes? Plej bone. Ĉu vi havas cigaron? Prenu, mi petas vin. Mi ne povas regali vin per pli bona tagmanĝo; mi do donos kiel deserton al vi fraŭlan rakonton.

Ĉu vi amas la nigraharulinojn? . . .

Kial mi demandas vin pri tio? . . . Por ekscii, ĉu ni havas la saman guston. Iam mi amis ilin super ĉio.

Laŭ mia opinio Eva estis nigraharulino kaj Adamo blon-

dulo. El tio, kion ni scias pri niaj pragepatroj, ni devas konkludi, ke nia prapatrino havis pli multe da temperamento, vivemo kaj spriteco, ol nia prapatro, kaj ĉio tio, kara amiko, karakterizas la nigraharulinojn, ne la blondulinojn, kiuj estas pli idealaj, poetaj, bonkoraj kaj eble pli virtaj, ol ĉi tiuj tentulinoj el la infero, sed . . . mi preferis la nigraharajn.

La lasta, kiu min delogis, havis ebonajn harojn, nigrajn okulojn, brunan vizaĝon, koralajn dentojn, diajn formojn. Kio estis Venus kompare kun ŝi! Malnova antaŭjuĝo, ke nur Venus estis la plej bela! Ĉiu jarcento, ĉiu lando havas sian Venus kaj havos ŝin ĝis la fino de l'mondo, dum naskiĝados knabinoj. Cetere mi devas konfesi, ke, se reviviĝus ĉiuj marmoraj diinoj, kiujn mi vidis en la muzeoj, ili povus sin montradi por mono aŭ havi sukcesegon en la baletoj, sed permesite estas dubi, ĉu ili sukcesus en la privata vivo, *tête-à-tête*, kaj ĉu ili ĉarmus la virojn per sia beleco. Mi pensas, ke ne, ĉar ili ŝajnas tro malvarmaj, tro kvietaj, tro similas pupojn, tute ne havas temperamenton kaj sen ĝi virino eble kaŝigus kiel diino, sed por io alia — ne . . .

Mia belulino, ho kara amiko, estis edzinigita . . . Ne ridetu antaŭtempe, mi scias, pri kio vi nun pensas . . . Al vi ŝajnas, ke la edzinoj ekzistas nur por esti delogataj. Terure malmorala estas la nuna mondo! . . .

Sinjorino . . . sinjorino . . . kiel nomi ŝin, por ne esti nediskreta? . . . Sinjorino Y., ni diru, estis originala fenomeno en niaj salonoj. Junaj kaj maljunaj adorantoj kuŝis ĉe ŝiaj piedoj, amase kuris post ŝi, en la baloj unuj ŝin elŝiris el la manoj de aliaj, en la vesperkunvenoj ŝi estis sieĝata, en la teatro ĉiuj lornetoj celis ŝin la tutan vesperon, sur la stratoj oni haltis por ŝin rigardi; ŝi havis ion tian en la vizaĝo, en la tuta eksteraĵo.

Ĉu vi rimarkis, ke ekzistas virinoj, kiuj per siaj ĉarmoj malsatigas la virojn, forprenas ilian prudenton? Kaj ĉi tio

estas granda maljusteco de l'naturro, ke ĝi donis al la bela sekso tian superecon super ni. Sufiĉas, se la virino estas bela, ĉarma, alloganta, kaj ŝi povas per sola rigardo venki la tutan mondon, eĉ ne malferminte la buŝon. Iafoje en ĉi tiu buŝo sidas tia sensencaĵo, ke vi eksentas malvarmon, kiam ŝi komencas paroli, tamen . . . la plej naiva kokete ridetas, okulumas, kaj jen vi ree flamiĝas. Ĉu mi ne estas prava? . . .

Vi pensas, ke ankaŭ sinjorino Y, apartenis al tiaj anseraj belulinoj? . . . Tute ne! Ŝi estis virino perfekta en la plena senco de l' vorto.

Foje mi diris al ŝi:

„Vi sendube faris solenan promeson kolekti tutan rozarion da viraj koroj kaj nur tiam fariĝi piulino.”

„La rozarion oni portas ĉe la flanko; vi eble preferus, ke mi kolektu la korojn por ĉirkaŭkolo, ĉar tiam mi portus ĉiujn miajn oferaĵojn . . . sur la kolo.”

En balo, post la vespermanĝo, iu tre juna adoranto kuraĝis kisi ŝian kubuton . . . Ŝi ŝajnis, ke ŝi ne rimarkis tion. La junulo kisis ŝin duan fojon. Ŝi turnis sin al li kaj diris:

„Vi pensas, ke mia kubuto estas mirakla, sankta restaĵo? Lasu ĝin, la miraklo ne venos, sed pro vi minacos min la danĝero esti dronigita en la maraj profundaĵoj pro la . . . malĉastigado de l'etuloj.”

Kaj ŝi kovris siajn ĉarmajn brakojn per la punta manteto.

Multaj tiaj pikaj diroj estis konataj en la salonoj. Ili faris reklamon en la mondo al ŝia spriteco, naskis la scivolemon de ĉiuj, kiuj ne konis ŝin persone. Ŝi ridis kaj amuziĝis bonege.

De nia unua renkonto mi havis privilegiojn ĉe sinjorino Y., cetere, eble tio nur ŝajnis al mi . . . Tio ĉi ŝajnas al ĉiu, se la virino estas ruza kaj lerte manovras kun siaj adorantoj.

La plej saĝa skeptikulo estas trompita kaj konvinkita, ke li sola estas elektita kaj feliĉa, li sola ne estas kondukata per la nazo. Sinjoro, ekzistas neniu nazo, per kiu ĝia posedanto ne povus esti kondukata de virinaj fingretoj.

Mi ne rakontos al vi la detalojn de nia interrilato, tio estus tro longa kaj neinteresa. *Sempre lo stesso*. La milito pro la virino estas ĉiam sama, kvankam ĉiu ŝajne postulas alian strategion; tion ĉi diras al vi maljuna veterano, kiu gajnis pli ol unu batalon, pli ol unu fojon lasis la batalan kampon, vundita, sed kun dekoracio.

Mi devas konfesi, ke al nia Moloĥo — ni nomis ŝin Moloĥo — plej multe altiris min la scivolemo. Tiu ĉi sento ja kreis la inferon, pereigis la unuajn gepatrojn, degradis la anĝelojn, fermis la paradizon, kaŭzis la malĉastecon de l'virinoj kaj la malvirtecon de la viroj. La scivolemo, laŭ mia opinio, estis la patrino de la seniluziiĝo kaj tedo.

Vi diras, ke tio estas sofismo? . . . Eble vi estas prava, sed mi amas sofismojn kaj tio ĉi pravas, ke mi multe interrilatis kun virinoj.

Mi do estis scivola, de kiu flanko oni povas sukcese ataki ĉi tiun nevenkeblan citadelon, kiu tamen ŝajnis malfermita de ĉiuj flankoj.

Mi komencis esplori mian Moloĥon; li manĝis ĉiujn, mi volis ekscii, ĉu ne eble estas ekmordi ankaŭ lin. Ŝajnis al mi, ke tio estas ebla. Sed ĉi tiuj esploraj bataletoj iom min laciĝis. Kiam oni estas kvardekjara, ne facile estas vetkuri kun la junuloj, furiozi, ĝemi . . . Don Juan post la kvardeko certe devus kapitulaci pli ol unu fojon . . .

Mi plu ne memoras, kiamaniere tio okazis, sed post longa petolado mi ricevis de mia Moloĥo promeson por la unua amkunveno; post la amindumado devis fine komenciĝi la vera romano.

Se la virinoj scius, kiom ili riskas per la unua konsento,

ili neniam elparolus la sakramentajn vortojn:

„Morgaŭ do, en tia horo . . . tie . . . Mi venos, mia kara!”

Ĉu vi komprenas homon, kiu kun fermitaj okuloj dismordas rapon kaj imagas, ke ĝi estas ananaso? . . . Vi lin ne komprenas? Sed kiom da ni, gustumante la tiel nomatajn „malpermesitajn fruktojn,” faras la samon! . . . Vin mirigas tio, kion mi diras en la momento de escepta sincereco, tamen tio estas unu el multaj veraĵoj, kiujn instruis al mi la vivo. Mi skribos iam teorian kurson de l' delogado por nespertaj kandidatoj al la amo kaj malfermos al ili la okulojn. La lastaj vortoj estos: Fratoj, kontentiĝu per la rapo kaj ne deziru la imagatajn ananasojn.

Vi ridetas skeptike kaj levas la ŝultrojn? Sed mi parolas tute serioze kaj kun pentio, bedaŭrinde tre malfrua, — ni ne parolu plu pri tio.

Morgaŭ do estis okazonta la amkunveno. Mi malfrue revenis hejmen de l'vespermanĝo, dum kiu mi trinkis multe da ĉampana vino, fumis fortajn cigarojn, englutis maron da nigra kafo kaj riverojn da konjako. Mi longe ne povis ekdormi. Mi kuŝis sur mia fraŭla lito, sur mia risorta matraco kaj pensis pri mia *rendez-vous*.

„Jen feliĉulo”, — mi diris al mi — „vi havas, kion vi volis. Vi prenas citadelon, ĉirkaŭ kiu galopas aro da azenoj kaj ŝafoj kun elpendantaj langoj. Morgaŭ . . . la unua amkunveno, — vi devos diri al ŝi, ke vi ŝin amas, adoras, ke la unuan fojon en la vivo vi ekkonis tiel ĉarman virinon, vi devos ripeti ĉiujn malnovajn mensogojn, kiujn vi tiom da fojoj diris al aliaj. Post kelke da tagoj vi ree interkunvenos, poste ree, poste ĉiutage almenaŭ unu momenton, el la estro vi fariĝos sklavo. Kaj poste? . . . Tio komencos enuigi vin, lacigos vin la interrilato, ĉiam kaŝata pro timo de skandalo kaj vi provos ekŝiĝi . . . Ŝi komencos plendi pri via mal-

M. GAWALEWICZ

varmo, vi devos senkulpigi vin, ree ĵuri, reveni devigite, mensogi. Ĵaluzaj scenoj, riproĉoj, larmoj, ploroj . . . Kaj la edzo? . . . Vi vidas, vi tute forgesis pri li. Se li ekscios, preta estas la skandalo. Duelo estas neevitebla; sed pli malbona estas la eksedziĝo. Nenia artifiko vin helpos, vi devos edziĝi kun ŝi, vi, kiu dum kvardek jaroj feliĉe evitis ĉiujn embuskojn kontraŭ via fraŭla libereco! . . .”

Mia kapo estis kvazaŭ malfermita botelo da ĉampano, la pensoj ŝaŭmis, kiel gasaj veziketoj, flugis supren kaj krevis en la aero.

Sed kiom utilas tro malfruaj pripensoj!

Mi ekdeziris venki Molohon kaj mi venkis. Morgaŭ, amiko, vi iros al la *rendez-vous*. Mi vin konas, maljuna lupo, vi ploros pro la nigra ŝafeto, sed vi grincos viajn lastajn dentojn, maljuna cinikulo, maljuna hipokritulo!”

Mi ekdormis, kiam jam tagiĝis.

En la sekvinta tago mi vekigis tagmeze: estis griza, aŭtuna tago, ne pluvis, tamen estis malseke.

„La diablo prenu tian veteron, en la tago de l'unua interkunveno kun virino!” ripetis mi, kuŝante sub la litkovrilo kaj rigardante tra la fenestro, ĉu reaperos la blua ĉielo. Pera estis mia kapo, mi estis dormema kaj provis ankoraŭ ion dormeti . . . Tio ĉi daŭris ĝis la dua horo.

Fine mi devis leviĝi, min lavi, razi, freŝigi, por esti preta antaŭ la kvina. La akurateco estis ĉiam mia principo. *L'exactitude est la politesse des rois.*

Oni povas tute ne veni al la *rendez-vous*, sed ne konvenas malfruigi eĉ unu minuton kaj igi la virinon atendi.

Mi komencis bedaŭri, ke mi elektis tiel neoportunan horon. Kvina! Stranga horo por amkunveno! Se almenaŭ unu horon pli malfrue, sed tiam mi ja tagmanĝas — en tia okazo la sepa, oka, naŭa! . . . La kvina horo komencis ekstreme malplaĉi al mi.

Mi sonorigis al la servisto.

„Kiaj novaĵoj?” demandis mi.

„Ah, via sinjora moŝto, pluvo, trapenetranta malsekeco, hunda vetero.”

„Malbone,” pensis mi, „la ĉielo konspiras kontraŭ ni.”

Mi ordonis alporti la noktan surtuton, pantoflojn, teon, gazetojn.

Mi rigardis en la speguleton ĉe la lito — ho ve! . . . Mi estis flava, pala, dormema, kun ŝvelintaj okuloj; ŝajnis al mi, ke mi estas dek kvin jarojn pli aĝa ol hieraŭ. Jes, efektive mi leviĝis kuintiriginta, kurba; mi sentis doloron en la piedoj, murmuron en la kapo; mi oscedis ĉiuminute. La varmaj kusenoj logis min pli multe, ol la plej ĉarma virino.

Eksonoris la tria horo; la horloĝasono preskaŭ timigis min.

„Jen, la tria! . . . Pro Dio, donu la lavovazon.”

La servisto kun miro min rigardis.

„Kia urĝo hodiaŭ? . . . Vi ja ne eliros dum tia vetero? Mi alportos la tagmanĝon.”

„Silentu, malsaĝulo, donu akvon kaj spongon!”

La akvo estis malvarma, kiel neniam antaŭe. Mi tute perdis la deziron lavi min, sed ĉu eble estas iri nelavita al *rendez-vous*?! . . .

Mi staris antaŭ la lavovazo, kvazaŭ ĉe la bordo de Glacia Oceano, tremoj kuris sur mia dorso, mi oscedis tiel, ke mi preskaŭ englutis la tutan lavujon kune kun la sapo kaj spongoj.

Vi aŭdis sendube pri kapricaj ĉevaloj, kiuj ne povas transsalti foson, se ili vidas sekan branĉon ĉe la bordo. La malvarma akvo estis por mi kvazaŭ tia seka branĉo. Sin lavi ŝajnis al mi ofero, kruelaĵo, turmentego. Mi komencis paŝi en la ĉambro, haltis antaŭ la spegulo, rigardis min kaj meditis.

Ĉiuj malsaĝuloj filozofas ne ĝustatempe. Oni povas elpensi nenion seriozan, kiam oni oscedas ĉiun kvinan minuton, eĉ se oni estus Sokrato. Unu horon antaŭ la amkunveno mi meditis kiel la lasta malsaĝulo kaj kiel Hamleto en la nokta surtuto mi demandis min: „Ĉu iri — aŭ ne iri?”

Poste venis diversaj bagatelaj duboj: ĉu mi havos sufiĉe da tempo por min lavi, razi kaj vesti dum la sola horo, kiu restis ĝis la kunveno.

La hieraŭaj meditoj ree okupis miajn pensojn.

„Fine, por kio,” mi diris al mi, „serĉi novan romanon! . . . Ĉu vi ne havis sufiĉe da ili dum via vivo? Vi delogos virinon originalan, ĉarman, esceptan, sed kiu ĝis nun estis virta. Ne atendu novajn impresojn. Por ŝi ĝi estas novaĵo, sed ne por vi! Ŝi venos kun batanta koro, kun rapida spirado, ĉar ŝi venos la unuan fojon. Vi iros kiel sperta, memfida deloganto. Por kio klopodi? Jen ĉi tie vi havas varman ĉambron, molan noktan surtuton kaj pantoflojn, kiujn brodis al vi unu el viaj sentimentalaj amikinoj. Vi ne iras teatron, se oni ludas malnovan dramon, sed vi iras al *rendez-vous*, eble la centa aŭ mila! . . . Se vi ne venos, vi kompromitos vin kiel malĝentilan homon, sed senvole vi havos meriton: la nekonsiderema virino, kiu senpripense konsentis vian perfidan peton, komprenos la ruzon, evitos la danĝeron.”

Mi iafoje estas elokventa, se mi nepre volas konvinki iun, precipe tian skeptikulon, kian mi; mi sukcesis tute konvinki min, ke plej bone, honeste, noble estos — resti hejme.

Mi sidiĝis en la seĝego, en la sama, en kiu vi nun sidas; mi enmetis la manojn ĝis la kubutoj en la manikojn kaj mi restis. Tio estis malkonvena, malĝentila ago, ĉu ne vere? . . . Mi diris tion ĉi al mi; eĉ pli multe, post la kvina horo mi plej maldelikate insultis min, sed mi ne moviĝis de la seĝo, ne demetis la noktan surtuton kaj manĝis hejme tagmanĝon, alportitan el restoracio, elpensante belajn fra-

zojn, per kiuj mi estis petonta pardonon de sinjorino Y, pro mia neveno al la *rendez-vous*.

Mi malkaŝe diris al mi tiam ĉiujn verojn, ekster unu: en la kvina horo mi komencis maljuniĝi, fariĝis peza, ne-moviĝema; mi perdis la reston de la arte daŭrigata juneco, mi komencis griziĝi — morala griziĝo, kontraŭ kiu ne ekzistas kolorilo.

Vi demandas, kion diris Moloĥo? Ŝi estis eksterordinara virino en ĉiu rilato. Ŝi sin estimis pli multe ol mi pensis, kaj punis min pli severe ol mi supozis.

Ĉu vi divenas? . . . ŝi tute ne venis al la *rendez-vous*; ŝi ŝercis min kaj ridis poste, pensante, ke ŝi trompis min same kiel la aliajn.

Mi diris al vi, ke ne ekzistas nazo, per kiu ĝia posedanto ne povus esti kondukata de virinaj fingretoj kaj tial la ne okazinta amkunveno kun sinjorino Y, estis la lasta *rendez-vous* en mia vivo.

★ ★

★

KION NE KOMPRENAS LA HIRUN- DOJ KAJ PAPILIOJ

Foje ni foriris de nia muelejo tiel malproksimen, ke la bruo de ĝiaj radoj ĉesis atingi nin.

Anjo deŝiris kampajn florojn por bukedo kaj ju pli malproksimen ni iris, des pli belajn kaj grandnombrajn florojn ĝi trovis.

Kolektante do bluajn cejanojn, ni foriris kelke da verstoj kaj tute ne rimarkis, kiel kaj kiam ĝi okazis.

Cetere jam antaŭ longe ni ĉesis kalkuli la horojn kaj zorgi pri ili. Niaj horloĝoj kuŝis jam unu monaton sur la fundo de nia komodo.

Kiu dum amkunveno observas la horloĝajn montrilojn? Kiu, ricevante tiom da karesoj de l'naturro, tedas ĝin, kalkulante la tempon per egalaj kaj etaj partumoj?

La suno brilis sur la ĉielo tuj antaŭ ni, — ŝajnis do al ni, ke paŝante ni iras al la suno.

Subite inter la herbejoj, delikate ondantaj, sur kiuj staris garde izolaj kampaj pirarboj, aperis super ni monteto kun malgranda aro da pinoj.

La pinaro estis malsanema kaj maldensa; tra ĝi oni povis vidi tute klare flavajn murojn kaj ruĝan tegmenton de vilaĝa domo.

La flava-ruĝa domo ekinteresis nin; ni do eniris inter la pinojn, kvankam ili tute ne estis allogaj.

Ekzistas arboj, same kiel homoj, kiuj mallogas de l'unua rigardo.

La teron inter la pinoj ne kovris eĉ unu trunketo de herbo. Se ĝi iam kreskis tie, oni videble detruis ĝin per paŝado. Ĉe la bazo de l'trunkoj oni vane serĉus junajn kreskaĵojn, kiuj ordinare akompanas la maljunajn arbojn. Tio estis vegetado sen estonteco, kiel ekzistas vivoj sen morgaŭo.

Preterpasinte la malĝojajn pinojn, ni ekvidis antaŭ ni grandan domon, sur kies muroj rampis sovaĝaj vinberujoj. Al unu el la muroj estis apogita laŭbo el bastonoj kunplektitaj de konvolvuloj kaj pizoj. Post la domo estis ĝardeno, nezorgita kaj plena de lolo.

Plej granda kaj ŝajne plej grava parto de l'konstruaĵoj estis ekstreme longaj staloj, starantaj ĉe ambaŭ flankoj de l'domo kaj kvazaŭ formantaj kun ĝi nedivideblan tuton. Iom pli malproksime kuŝis flava grenkampo. Malalta barilo apartigis ĝin de l'konstruaĵoj kaj de l'malgranda placeto antaŭ ili.

La barilo formis angulon kaj en la loko, kie kuniĝis ĝiaj du oblikvaj duonoj, ĝi havis pordegon, altan, larĝan kaj en tiu momento tute malfermitan.

Ni proksimiĝis al la malalta barilo. Anjo havis apenaŭ sufiĉe da tempo por apogi sur ĝi sian ombrelon, kiam en la flava domo oni jam malfermis la pordon, kaj viro stariĝis ĉe la sojlo kaj laŭte demandis:

„Ĉu vi iras eksterlandon?”

Ni komprenis. La barilo, malzorge konstruita el kurba bastonoj, estis io pli grava, ol limo de kampara propraĵo...

Ĉi tiu barilo apartigis du naciojn, du landojn, du civilizaciojn.

La sekalo, kreskanta post ĝi, estis jam germana sekalo la cejanoj, kiuj, kiel bluaj lumetoj, bruletis inter la spikoj,

estis jam germanaj cejanoj.

Germana estis eĉ la vento, fluganta de tie kune kun la mielaodoro de l'konvolvuloj . . .

Kompreneble, Anjo devis rifuzi al si la riĉigon de sia bukado per germanaj floroj kaj ŝi tuj sciigis pri tio la laŭte demandantan viron.

Li reiris domon, trankviliĝinte, sed sendube dek-kelkaj paroj da viglaj, kvankam nevideblaj okuloj observis ĉiujn niajn movojn.

Kun stranga sento ni komencis rigardi ĉirkaŭe.

„Kial?” demandis Anjo, larĝe malfermante la okulojn, „sekve la spiko, kiu elkreskis tie ĉi el grajno, alportita de tie de la vento, estas nia, sed milionoj da aliaj spikoj, ĝiaj fratoj, estas fremdaj nur tial, ke ili kreskas unu paŝon malpli proksime?”

Mi penis klarigi al ŝi, ke tio ĉi estas tute natura, eĉ necesega.

„Por kiu?”

Anstataŭ respondo mi levis la ŝultrojn.

Okupataj per la penso pri la divido, ni turnis la okulojn al la ĉielo, serĉante ankaŭ sur ĝi liman linion.

Sed la ĉielo estis nur unu, nedividita.

Ni rigardis la sunon.

Ankaŭ la suno estis nur unu, nedividita.

En la sama momento papilio, kiu sidis proksime de ni sur la barilo kaj jen etendis, jen kuntiris siajn ruĝajn flugiletojn kun arĝenta subaĵo, rapide leviĝis kaj transflugis al la germana flanko.

Ĝi longe flirtis tie super la balanciĝantaj spikoj kaj, trovinte amikon aŭ amikinon, ankoraŭ pli trankvile revenis.

Bamtempe kelke da hirundoj, antaŭsentante proksimiĝon de fulmotondro, komencis kun laŭta pepado rondflugi mal-

W. GOMULICKI

proksimen kaj senpune trans la limon . . .

„Vi vidas!” ekkriis Anjo kun infana triumfo. „La hirundoj kaj papilioj ne konsentas la „necesecon,” pri kiu vi tiel saĝe parolis.”

Ĉi tiuj senkonsideraj vortoj malĝojigis min.

„Ah, Anjo, Anjo!” diris mi riproĉe, „ĉu vi forgesis, ke la homo estas pli saĝa kreitaĵo ol la flirtemaj birdoj kaj papilioj senpripensaj? . . .”

★ ★

★



LA FLOROJ DE L'MALFIDELECO

Afrika legendo.

Malproksime, tre malproksime de l'bordo de la maro, post la montoj, sur kiuj neniam paŝis la piedo de blanka homo, kuŝas bela kaj feliĉa lando. Eĉ ĝia nomo ne estas konata de la blankuloj.

La palmoj de ĉi tiu lando liveras la plej fortan vinon kaj plej bongustan oleon; sur la fundo de ĝiaj bluaj riveroj estas pli multe da oro ol da sablo, kaj la benitaj fruktoj de la *kola* sufiĉege kreskas tie spite la certigoj de la blankuloj, ke ĉi tiu frukto bezonas la proksimecon de l'maro.

Reganto de tiu ĉi feliĉa lando estis iam la potenca estro Itoki (la vorto signifas „suno”). Li loĝis en palaco kun kvardek balkonoj kaj dek kvar kortoj. Ĉirkaŭ la palaco vivis kaj laboris por sia sinjoro dek kvarmil sklavoj kaj en la kortoj promenis liaj cent kvardek edzinoj, unu pli bela ol la alia.

Itoki estis jam naŭdekjara, kaj kelkaj liaj edzinoj apenaŭ atingis la aĝon de dek kvin jaroj, sed malgraŭ ĉio ili montris al li plej varmegan amon. Kiam li aperis inter ili, ne ekzistis en la tuta mondo homo pli dorlotata ol li.

Tamen Itoki ne havis feliĉan mienon. Kiam la juneco beligis lian vizaĝon, oni malofte vidis sur ĝi malĝojon, sed pli malĝoja li fariĝis, des pli ofte vizitis lin strangaj pensoj, kiuj plenigis lin per maldolĉo kaj malespero.

Forlasante la ĉambrojn de siaj edzinoj, li diradis al si mem: „Ĉu estas eble, ke ili tiel varmege amas min malgraŭ miaj grizaj haroj kaj sulkiĝinta vizaĝo? Ekzistas kelkaj inter ili, kiuj povus esti miaj pranepinoj, kaj tiuj ŝajnas plej karesemaj por mi. Mi havas tiel multe da ili kaj mia koro sufiĉas por ĉiuj, sed ili havas min solan. Ĉu iliaj koroj estas tiel malgrandaj aŭ ĉu tiel granda estas ilia virteco? Mi havas tiel multe da ili . . . kaj kiom mi jam havis! Eĉ iliajn nomojn mi ne memoras plu . . . Ili mortis junaj, donante la vivon al infanoj, aŭ laŭ la volo de Grandaj Spiritoj. Sed tiuj povis kore min ami, ĉar mi estis juna kaj bela . . .”

Ĉi tiuj pensoj de Itoki pravas, ke, kvankam la civilizacio estis al li tute fremda, tamen li bone komprenis la aferojn, eble ĝuste tial, ke la civilizacio ankoraŭ ne malklarigis lian prudenton.

Sed la pensoj de Itoki ne gajigis lin; li komencis perdi la dormon kaj apetiton; kiam la zorgemaj korteganoj rimarkis tion ĉi, ili alvokis gloran ŝagulon, kiu loĝis izola en monta dezerto kaj pri kiu oni diris, ke li rilatas kun Plej Alta Spirito.

Itoki, kiu havis kaŝeman karakteron, en la komenco ŝanceliĝis konfidi al la saĝulo la sekreton de siaj zorgoj, sed kiam li pripensis, ke la saĝo trapenetras ĉiujn pensojn, li diris:

„Mi estas nek enviema, nek venĝema, sed mi ne amas esti trompata. Diru al mi, maljunulo, kion mi devas pensi pri la amo de miaj edzinoj? Ĉu ĝi estas sincera? Ĉu en iliaj koroj ne estas perfido?”

„Potenca estro,” rediris la saĝulo, „demandu pri ĉio, nur ne pri tio ĉi. Ne ekzistas saĝulo, kiun plej malsaĝa virino ne povus trompi. Ion tute certan oni povas ekscii nur post ilia morto. Eĉ tio ne estas ebla por ĉiu. Sed mi konas rimedon . . .”

HAJOTA

„Aĥ!” diris Itoki, „kiom ĝi utilis? Mi ja ne revivigos ilin por ilin puni.”

„Sendube,” konsentis la saĝulo. „Sed laŭ la mortintaj edzinoj vi povos konkludi pri la vivaj. Ĉiuj virinoj, en la fideleco kaj malfideleco, en la amo kaj scivolemo, similas unu la alian.

Itoki ankoraŭ ne estis konvinkita.

„Ne! Ne!” diris li, skuante la grizan kapon, „pri miaj mortintaj edzinoj mi estas tute trankvila.”

Kaj li ripetis al la saĝulo, kion li ofte diris al si mem:

„Ili amis min kaj estis fidelaj, ĉar mi estis juna kaj bela.”

La saĝulo nur ridetis.

„Ho, granda Itoki!” diris li, „facile estas vidi, ke vi ne konas la virinojn. Ili eble trompis vin ĝuste por maljunaj malbeluloj. Ĉu vi volas konvinkiĝi?”

„Bone,” respondis Itoki post momenta konsidero. „Kion mi devas fari?”

La saĝulo levis la okulojn al la ĉielo kaj komencis paroli per sòlena voĉo:

„Dufoje en la jaro, antaŭ la grandaj pluvoj kaj antaŭ la granda sekeco, de la montoj, sur kiuj loĝas Plej Altaj Spiritoj, venas super la tutan mondon grandega vento, nomata Vento de Vero. La nomo estas konata nur de la saĝuloj kaj justuloj, kiuj rilatas kun Spiritoj, sed oni povas rekoni ĉi tiun venton, ĉar ekzistas preskaŭ neniuj homoj, al kiuj ĝi ne pikas la okulojn. Sub la blovo de tiu ĉi vento, dum la plena luno, ekkreskas sur la tomboj de l'mortintoj strangaj floroj, kiuj vivas nur unu nokton. Atendu ankoraŭ kelke da tagoj kaj la vento alflugos. Tuj kiam ĝi ekblovos kaj la nokta luno leviĝos, iru, potenca Itoki, post la urbon sur la monteton ĉirkaŭitan de alooj, kie en la ombro de la palmoj ripozas la restaĵoj de viaj edzinoj. Kiom da ili vi jam enterigis?”

„Mi pensas, ke ĉirkaŭ ok *tally*,” respondis la estro, „sed mi ne memoras bone. La lasta enterigo okazis antaŭ unu jaro. Ĉi tiu edzino estis malplej kara por mia koro, ĉar en ŝia frua juneco malsano manĝis la belecon de ŝia vizaĝo. Mi restigis ŝin ĉe mi pro kompato. La rakonto de ŝia tombo ne estas interesa por mi.

„La okulo de l’saĝa homo estas malfermita por ĉio, ĉar la scio povas de ĉie veni,” diris la saĝulo. „Iru do, granda Itoki, inter la tombojn kaj rigardu atente. Sur la tomboj de l’edzinoj, kiuj estis malfidelaj per la penso, vi vidos blankan floreton, kovritan de malgrandaj punktetoj, kvazaŭ superŝutitan per pistita rustaĵo. Floroj, ruĝaj kiel sango, kreskos sur la tomboj de l’edzinoj, kiuj perfidis per la vortoj; kaj el la tomboj de tiuj, kiuj estis malfidelaj per la agoj, leviĝos floroj brulantaj, kiel la flamoj de kena torĉo. Kiom da fojoj iu el ili trompis vin iamaniere, tiom da trikoloraj floroj vi trovos sur ŝia tombo. Iru do, rigardu, kalkulu, kaj vi scios la veron.

„Kaj la tomboj de tiuj, kiuj estis tutkore fidelaj?” demandis Itoki.

„Sur ili vi trovos neniam florojn, ĉar la virto estas silenta eĉ post la morto.”

„En tia okazo,” ekkriis Itoki, „mi estas certa, ke mi ne vidos eĉ unu floron . . .”

„Faru ĝin Plej Alta Spirito!” diris la saĝulo. „Sed tiam memoru, potenca Itoki, ke vi devos neniam dubi pri iu el viaj edzinoj, eĉ se vi vivos duan fojon naŭdek jarojn kaj eĉ se vi vidos ŝin en la brakoj de alia viro.”

„Tion ĉi mi ne promesas,” respondis Itoki, kies grizaj brovoj stariĝis, kiel ĉe sovaĝa kato. „La estinta tempo ne estas la estanta. Mi dankas vin, saĝulo, por via konsilo. Via Vento de Vero estas benita vento; sed mi preferus, ke ĝi blovu sur la vivantojn, ne sur la mortintojn.”

„Ne eble estas por la homoj trapenetri per unu fojo la superterajn misterojn” diris la saĝulo. „Post unu jaro mi revenos; se vi same deziregos scii la veron, kaj Plej Alta Spirito, aŭskultinte favore miajn preĝojn, donos al mi novan rimedon, tiam mi volonte komunikos ĝin al vi. Dume vivu trankvile kaj juste, ho potenca Itoki!”

Foriris la glora saĝulo en la montojn, akceptinte neniun el la luksaj donacoj, malavare oferitaj de la dankema Itoki.

La atendata tago eklumis, la tago de Vento de Vero. Ĉiuj iris tenante la manplatojn ĉe la frunto, por gardi la okulojn. Multaj tute kovris la okulojn per tukoj aŭ restis hejme por eviti la netolereblan pikadon.

Frue matene Itoki sendis sklavojn sur la tombejan monteton kaj ordonis purigi la tombojn, por ke neniu herbo restu sur ili. Vespere li eliris nerimakate el la palaco kaj rapidis ekster la urbon.

Li iris kun mallekita kapo, kun fermetitaj okuloj, ĉar ankaŭ lin pikis iom Vento de Vero. Nur kiam li haltis antaŭ la aloa ĉirkaŭbaro, li levis la kapon kaj terura krio elŝiriĝis el lia brusto.

Sajnis, ke la tuta monteto brulas kvazaŭ grandega fajrujo. Itoki sentis flamon en la brusto, flamon en la okuloj kaj ne sciis, kio tiel bruligas lin: ĉu doloro, ĉu kolero, ĉu cindrigita kredo de tiom da jaroj, ĉu la honto pro la malhonoro, pruvita per flama fajro.

En la unua momento li volis forkuri, sed konsiderinte, li eniris inter la tombojn, kutimiĝante iom post iom al la terura brilo kaj ne perdante la esperon, ke li trovos eble unu solan tombon, sur kies nuda brusto li povos apogi la kapon kaj plori larmojn de malespero kaj seniluziiĝo.

Bed li ne trovis tian. Eĉ la tombo de la lasta edzino, kies vizagon manĝis en frua juneco abomeninda malsano, eĉ ĝi donis al li nenian konsolon. Ne la floro de l'ago brulis sur

HAJOTA

ĝi, sed anstataŭe estis tie tiom da blankaj floroj, kovritaj de rustaj punktetoj, ke Itoki ne kuraĝis kalkuli ilin.

Sur ĉiuj aliaj tomboj kreskis la malpure blankaj floroj de la malfidelaj pensoj kaj deziroj, kaj la floroj, ruĝaj kiel sango, de l'perfidaj vortoj, sed ambaŭ paliĝis antaŭ la flamaj floroj de l'malfidelaj agoj.

Estis jam malfrua nokto, kiam Itoki revenis de la tombejo. Li tuj ŝlosis sin en siaj ĉambroj kaj dum dek tagoj estis malpermesite al ĉiuj viziti la reĝon, senlime malĝojan kaj malesperan.

En la dek-unua tago la plej intima kortegano kuraĝis eniri kaj diris:

„Potenca estro! En la deka nokto du viaj edzinoj mortis pro sopiro al vi. Ĉu vi ordonas, ke mi aranĝu la kutimajn solenajn funebrojn? Ĉu vi honoros la enterigon per via ĉeesto?”

Itoki, kiu dum la dek tagoj plimaljuniĝis dek jarojn, levis sur lin sian malĝojan, sed ĉiam ankoraŭ severan kaj energian rigardon.

„Ne!” diris li, „trifoje ne! Vi involvu la kadavrojn en palmajn matojn, ŝarĝu per ŝtonoj kaj ĵetu sur la fundon de l'rivero. De nun ĉiuj reĝaj edzinoj estos tiamaniere entombigataj.”

La mirigita kortegano foriris. Itoki mallevis la kapon sur la bruston kaj diris al si:

„Almenaŭ tie Vento de Vero ne atingos ilin. Neniu el miaj posteuloj, se ili havos la kondamnindan intencon elŝiri la sekreton el la tomboj, estos punata per tiaj honto kaj maldolĉo, kian mi sentas nun.”

Post unu jaro la saĝulo venis de la montoj en la palacon de Itoki, sed li jam trovis tie novan estron — tian plej aĝan filon. Itoki ne vivis plu. La saĝulo tre ĉagrenis lia morto. Kiam li eksciis pri la lasta ordono de l'reĝo: ĵetadi

HAJOTA

la restaĵojn de la reĝaj edzinoj sur la fundon de l'rivero, —
li demandis nenion plu kaj foriris, laŭdante la saĝecon kaj
bonecon de Grandaj Spiritoj, kiuj malkovras al la homoj
nur tiom da vero, kiom ili povas toleri.

★ ★

★

K. J U N O S Z A

LA FLIKISTO

Melankolia aŭtuna nokto lulis al la dormo la podlasan vilaĝon.

La dometoj kaj garbejoj dronis en la mallumo, kvazaŭ en grandega vazo, plena de inka akvomiksaĵo.

Post la plumbaj, pezaj nuboj nur malofte, kiam supre ekblovis pli forte la vento, aperis malgranda steleto kaj tuj kaŝiĝis kiel homo, kiu sekrete transiras la landlimon...

Regis tomba, solena silento, la lumoj estingiĝis, la homoj ekdormis... Nur la vento, diboĉanta sur la kampoj, latalis kontraŭ larĝabranĉa saliko kaj deŝiris de ĝi la lastajn flaviĝintajn foliojn...

La dika trunko de ĉi tiu ftizulo estis supre rompita de fulmotondro kaj interne putra; el la flankaj branĉoj elfalis la arbocerbo kaj tiamaniere la maljuna saliko fariĝis stranga fluto, per kiu la vento ludis malgajan melodion.

El la malproksima arbaro flugis de tempo al tempo la malĝoja kriego de malsataj lupoj — la sola viva sono en la mallumo kaj silento... La homoj dormis ŝtonan dormon, sen sonĝoj kaj fantomoj, la dormon de homoj malfacile korpe laborintaj.

La kokoj jam antaŭ longe proklamis la noktomezon. Morfeo aŭtokrate regis en la nobela vilaĝo kaj ĉiuj ĝiaj loĝantoj laŭte ronkis, kiel konvenas al veraj polaj nobeloj, el kiuj ĉiu, laŭ la proverbo, egalas princon.

Dum ĉi tiu griza aŭtuna nokto, en dometo ĉe la fino de

l'vilaĝo, briletis blanka, malklara lumeto kaj sur la fenestraj vitroj oni povis vidi ombron de kliniĝinta, kurbiĝinta homo, kiu senĉese egalmezure movadis la manon . . .

Kiu maldormas en tiel malfrua horo? Kiu bruligas kandelon dum la nokto, kiun oni ja donacis al ni por la dormado? Ni rigardu internen . . .

La ĉambro estas granda, kun du malgrandaj fenestroj. En la fajrujo kraketante bruletas du malsekaj betulaj ŝtipoj, sur kies ŝelo kuras de tempo al tempo pala flameto, haltas momenton kaj revenas al la centro de l'fajro, ĉerpas tie novajn fortojn, ree atakas fervore la ŝtipon kaj pli kaj pli varmege kisas ĝian blankan haŭton . . .

En la alia angulo de l'ĉambro staras grandega lito kaj sur ĝi kuŝas dika kusenego. El sub ĝia angulo vidiĝas kufo kaj parto da vizaĝo de energia nobelino.

Apud la kameno, sur freŝa pajlo ronkas grasa Brigido kaj kredeble ŝi sonĝas idilie-paŝtistajn sonĝojn, ĉar ŝi ofte faras geston, kvazaŭ ŝi forpelus de l'kampoj fremdajn brutojn.

Sur la benko apud la muro sin etendis dekdujara knabo, la plej juna membro de l'familio, apogis la kapon sur la kvarfoje faldita ŝafa pelto kaj kuŝas tiel trankvile kaj kviete, kiel tio okazas somere, kiam li paŝtas nokte laŭ bovojn kaj silente meditante rigardas la stelojn, migrantajn sur la ĉielo, kaj la laktajn vojojn, sur kiuj, laŭ la popolaj fabeloj, iras nur sanktuloj kaj anĝeloj.

Sinjoro Onufry, la posedanto de l'domo kaj kampoj, dormas en alia parto de l'domo, en la festa ĉambro, en kiu pinta tablo, flave kolorigita, ŝajnigas fraksenon, kaj hejme farita tolo tablotukon.

Sinjoro Onufry dormas profunde, same kiel ĉiuj liaj hejmanoj, kiel lia edzino, kiu kuris la tutan tagon, kriis kaj ankoraŭ pli multe babilis!

En la servistoĉambro, kiu estas ankaŭ kuirejo, kaj kie

bruletas la fajro, maldormas homa kreitaĵo, tute fremda al ĉi tiu domo.

Ĝi estis hebreo pala, malfortika, malgrasa kun ekstreme akrapintaj membroj.

Sur la longa nazo li havis malnovajn okulvitrojn, tra kiuj rigardas liaj nigraj, penetremaj okuloj, iom vualataj de larma nebulo, kiu pendas kvazaŭ tulo antaŭ la rigardo, laca pro la laboro kaj maldormo.

Lia vizaĝo estis longforma kun maldensa barbo, en kiu arĝentaj fadenoj de l'antaŭtempa grizeco briletas.

La mallarĝa, enfalinta brusto spiras malfacile; pene funkcias la pulmo por konservi la vivon de sia posedanto.

La pintaj kubutoj, la malgrasaj fingroj kaj la piedoj maldikaj kiel bastonoj, formas tuton, kiu similas skeleton en duobla ingo: la homa haŭto kaj kelke da metroj da nigra, eluzita drapo.

Ĉi tiu malforta, laborema kreitaĵo estas Judka Silberknopf „la unua varsovia tajloro en la tuta urbo Losice kaj ĉirkaŭaĵo...”

Antaŭ li kuŝas sur la tablo tondilo, plenmano da butonoj, kelkaj fadenaroj, peco da vakso algluita al tabuleto, kaj flartabakujo el betula ŝelo...

De tempo al tempo, kiam la larma nebulo tro kovras liajn okulojn, kiam la palpebroj fariĝas pezaj kiel plumbo kaj komencas senforte malleviĝi, la maldikaj fingroj de Judka ĉerpas el la ujo porcion da verda tabako kaj la fortoj revenas por momento.

En la okulojn ekfluas pli grandaj larmoj, forigas la nebulon kaj ree la rigardo pli klare vidas la pikojn de l'kudrilo, kiu verkas „fajn” varsovian palton kun tiel alta kolumno, kian ne posedas eĉ la princa moŝto...

Krom la flartabako staras sur la tablo ankaŭ malgranda botelo da brando, apude kuŝas peco da pano, du ajloj kaj

iom da salo en papereto; sed Judka estas praktika homo, li ne manĝos nun la ajlon, li ne trinkos la brandon, ĉar li scias tre bone, ke post kelke da horoj, kiam li alkudros la manikojn kaj tie okcidente inter la ĉielo kaj tero estos videbla blanka strio, kiu vekos la kokojn por tria krio — tiam li eksentos doloron ĉe la koro . . . Li eksentos tie tian premon kaj malfortecon, ke li preskaŭ defalos de l'seĝo; ĉio mallumiĝos antaŭ la okuloj kaj li vidos lumetantajn rondojn, tre belajn rondojn ruĝajn, verdajn, bluajn, orajn, nigrajn kun oraj punktetoj, kaj fine tute nigrajn, kiuj rapide kuniĝos unuj kun aliaj kaj formos unu nigran tuton . . . Tiam tremeto kuros sur lia dorso, grandaj ŝvitaj gutoj aperos sur lia frunto . . . la enfalinta brusto komencos malfacile labori kaj momenton ŝajnos al li, ke Jehovo fariĝis malriĉa, ke Li posedas nur malmulte da aero kaj kompreneble . . . nur por riĉaj hebreoj.

Judka konas tre bone tiajn momentojn; jam ofte ili vizitis lin. Poste li petas pardonon de Kreinto, ke li peke suspektis Lin, sed al li ŝajnis, ke jam tute mankas la aero por la malriĉuloj. Ĉar li ofte travivis tion, li do ne nun trinkas la brandon. Venos la horo, oni ne bezonas rigardi la horloĝon . . . La verdaj kaj oraj rondoj ekbrilos antaŭ la okuloj . . .

Tiam Judka ekstaros, rektiĝos, malsekigos la tempiojn per akvo, turnos la okulojn tien, kie la ora strio jam klare apartigos la teron de la ĉielo, kaj diros mallongan preĝon.

La preĝo enhavos nur dankojn. Judka diros: „Mi dankas vin, Sinjoro, ke Vi ne kreis min virino, ke Vi ne kreis min sklavon, ke Vi ne kreis min hundo!” Tio signifas: „mi dankas, ke mi estas brava viro, ke mi estas libera homo kaj ke mi povas labori ĉiutage dek ok horojn; fine, ke mi estas la unua varsovia tajloro en la tuta urbo Losice kaj ĉirkaŭaĵo, sed ne malbela kaj malsaĝa besto.”

Poste jam kun pura konscienco Judka elverŝos iom da brando teren, kaj la reston li trinkos malrapide, ĝuos ĉiun guton, kiu tuj liveros vivigan varmon al lia organismo, tremanta pro malvarmo. Trinkinte la brandon, li manĝos malmulte da pano kun multe da salo kaj unu ajlon — nur unu — ĉar ne ĉiutage oni trovas tiajn ajlojn. Ili estas grandaj, plataj, pale ruĝaj kun arĝenta brilo, — ili povus esti ornamo eĉ de la sabata festeno. Tial li lasos unu kiel provizon, en la plej profunda poŝo de sia eluzita vesto.

Fortiginte sian korpon, Judka kun ruĝaj okuloj, sed kun artefarita vigleco blovos en la fajron kaj metos tien du gladilojn kun teniloj envolvitaj en ĉifonoj, du gladilojn, tiel nigrajn kiel lia sorto kaj tiel malmolajn kiel la severega fatalo, kiu klinas lian dorson al la tero kaj antaŭtempe grizigas lian barbon.

Judka laboris jam kelke da tagoj ĉe sinjoro Onufry kaj laboris diligente, ĉar dum ĉi tiu tempo li faris belegan jakon por la sinjorino, el malnova surtuto — kaftanon por fraŭlino Brigido, flikis kaj refreŝigis dek diversajn vestojn kaj en ĉi tiu nokto li estis finonta majstroverkon: palton por sinjoro Onufry mem.

Kaj por ĉio ĉi Judka ricevos ekster veturilo da ligno, kiun sinjoro Onufry solene promesis liveri en la sekvonta semajno ĝis la domo de Judka, kontante kvar rublojn.

La majstroverko devas nepre esti preta templime.

„Aŭskultu, hebreo,” diris sinjoro Onufry, „mi pagas al vi, kanajlo, kiel sinjoro; sed ne forgesu, ke mi devas havi la palton vendrede en frua mateno; mi ja ne povas viziti la preĝejon sen konvena vesto.”

„Via sinjora moŝto,” penis klarigi la hebreo, „mi preskaŭ ne dormis la tutan semajnon . . .”

„Kial vi ne dungis helpanton?”

„Helpanton? Mi mem ricevos tre malmulte . . .”

„Mi jam diris al vi, faru kion vi volas, sed la palto devas estis preta . . .”

„Bone, ĝi estos preta, sed aldonu ankoraŭ duonbuŝelon da terpomoj por la infanoj . . . Ne avaru, via sinjora moŝto, malfacila estas nun la tempo.”

„Diablo vin prenu, hebreo! . . . Bone, mi donos al vi, kiom vi povos porti; mi rekomendos vin al mia najbaro, sed . . .”

La promeso estis por Judka sprono. Li maldormos la kvaran nokton, sed li ricevos ekster la interkonsentita salajro duonbuŝelon da terpomoj, kaj la espero ricevi novan laboron ne estis senvalora . . .

Li varmege eklaboris, kaj kiam la ora strio aperis oriente kaj li jam alkudris la manikojn al la majstroverko, li eksentis doloron ĉe la koro. La koloraj rondoj komencis rapide turniĝi antaŭ liaj okuloj kaj tuj fariĝis nigraj . . .

Tiam Judka, laŭ sia kutimo, rekonsciigis sin per glaseto da brando kaj per ajlo kun pano.

Kiam li refreŝigis sin kaj komencis gladi la palton, fraŭlino Brigido leviĝis de la lito kaj ekbruligis fajron, kiu sufiĉus por rosti bovidon. Ankaŭ la sinjorino leviĝis.

„Monama hebreo!” diris ŝi, „li ankoraŭ sidas ĉe la laboro.”

„Ĉiu malriĉulo devas esti monama,” respondis la hebreo, „sed ĝuste tial, ke li estas tiel avida, sinjoro via edzo estos vestita, kiel la grafo de Wiwloki . . . Tia palto estas maloftaĵo!

Sinjorino Onufrowa atente rigardis la palton, iom mallaŭdis la kudran laboron, kritikis la poŝojn, sed en realeco ŝi estis kontenta, ke la edzo havos por malgranda prezo tian elegantajn. Kiam ŝi ekvidis la palan, lacan vizaĝon de Judka, liajn okulojn, ruĝajn kiel ĉe kuniklo, ŝi ekkompatis la hebreon kaj diris:

„Mi donos al vi ion por manĝi, mia Judka, ĉar vi estas terure laca.”

„Dio rekompencu vian sinjorinan moŝton, sed kion mi povas manĝi ĉi tie? Malpermesite estas al mi manĝi, kion vi manĝas.”

La virino opiniis lin tute prava.

„Kredo estas kredo.” diris ŝi. „Ĉiu devas ŝati sian religion.”

Poste ŝi malfermis ŝrankon, verŝis brandon en glaseton kaj metis ĝin sur la tablon.

„Trinku!” diris ŝi, „tio ja estas permesita!”

La dua glaseto kaj la varmego de l'fajrujo ne restis senefikaj... Judka vigliĝis, ruĝo kovris lian vizaĝon, li fariĝis eĉ bonhumora.

Li spritis, glatigante la palton, per kiu li provevestis sinjoron Onufry.

„Rigardu Margareto!” diris sinjoro Onufry, „ĉu ĝi similas palton?”

„Lerta hebreo! Peko estus tion nei; li faris al vi belan veston.”

„Rimarku via sinjora moŝto, kiel ĝusta estas la mezuro,” diris Judka, glatigante la faldojn sur la dorso, „faru alia tian *fajn* palton! Bela ekzemplo de laboro, de arto! Aj vaj, via sinjora moŝto povus tuj veturi al edziĝa soleno! La laboro valoras duonbuŝelon da terpomoj!...”

„Bone, mi promesis, mi sendos la terpomojn kun la ligno.”

„Mi devos atendi ĝis lundo. Donu al mi hodiaŭ almenaŭ kvaronbuŝelon, mi ĝin portos mem. Via sinjora moŝto, miaj infanoj kredeble jam malsatas hejme; por tia *fajn* laboro ili manĝu almenaŭ iom da terpomoj!”

Sinjoro Onufry kondukis la hebreon en la kelon, helois lin plenigi la sakon per terpomoj, pagis la salajron kaj ili disiĝis.

Judka piediris hejmen. Sur la kurba dorso li portis la

pezan sakon, kiu enhavis, ekster la terpomoj, ankaŭ du ferajn gladilojn.

Abomeninda koto estis sur la vojo. En la aero pendis peza, griza nebulo, tra kiu oni vidis nur malklare la arbojn kaj arbetojn, starantajn ĉe la bordo.

Ĝis la urbeto estis preskaŭ du mejloj, kaj Judka devis veni tien antaŭ la krepusko, ĉar estis vendredo. Vespere komenciĝas la sabato.

Judka esperis, ke helpos lin lia malpezeco, la ligna ulno, sur kiun li sin apogis, fine, ke lin prenos sur sian veturilon iu ajn kamparano, kiun li renkontos.

Ĉiuj konas lin en la tuta ĉirkaŭaĵo... Por faciligi la paŝadon, li faldis la baskojn de sia surtuto kaj ligis lin al la zono.

Ne facile estas iri sur malebena vojo plena de densa koto, precipe kiam oni portas grandan ŝarĝon... Ho, tute ne facile! Sed Judkan puŝis hejmen granda feliĉo.

Li havis belegan semajnon kun tiel granda enspezo! Li ricevos lignon kaj terpomojn, en la poŝo li havas kvar rublojn kaj sur la dorso li portas kvaronbuŝelon da terpomoj!

Kun tia akiro penvaloras rapidi hejmen!

Li do iris kaj meditis.

Komence liaj pensoj koncentriĝis sur la mono, kiun li enspezis. Li kalkulis, rekalkulis, kion li povos aĉeti por la kvar rubloj, kaj kion valoras la ligno kaj terpomoj, kiujn li ricevos aldone... Pensante pri tio, li iris tre rapide, tiel rapide, ke li eksentis varmegon. Lia vizaĝo ruĝiĝis...

Li devis malrapidigi la paŝojn, fine li haltis, metis la ŝarĝon sur la teron, prenis iom da flartabako kaj rigardis posten, ĉu venas veturilo...

Li konvinkiĝis, ke li trairis ne pli multe ol du verstojn.

Kien povis atingi lia rigardo, la vojo estis dezerta...

ĉiuj veturis de l'kontraŭa direkto; lama almozulo prenis siajn irilojn sub la ŝultron kaj kurante rapidis preĝejon, kantante ne tre pian kanton.

Judka rememoris la interparoladon kun sinjorino Onufrowa kaj komencis mediti pri ĝi.

Li mem diris, ke malriĉulo estas monama kaj avida, kaj, ĉar li estas tia kaj ĉiam malsata, la riĉulo havas kudritajn vestojn. Vere, pensis li, la malriĉeco estas malbela afero, kaj la malsato similas vipon: ĝi vipas, tre forte vipas. La ĉevalo de l'akvoveturigisto ricevas multe da batoj, trenas multe da akvo, sed ricevas iom da fojno. En ĉi tiu malfacila tempo la ĉevalo faras bonan negocon, pli bonan ol la flikisto. Kial pli bonan? Ĉar la ĉevalo bezonas nur fojnon, havas nek edzinon, nek dek infanojn, vivas sen la sabata festeno kaj ne edzinigas la filinojn.

Judka jam estis envionta la ĉevalon, sed ektimis ĉi tiun penson.

Fi! Kia pekol! La ĉevalo estas bruto, kaj li estas la unua varsovia tajloro en la tuta urbo Losice kaj ĉirkaŭaĵo; li ĉiumatene dankas Dion por tio, ke Li kreis lin homo. La ĉevalo estas malsaga, kaj li kvin jarojn trinkis el la puto de la saĝeco de rabeno Jojna. La ĉevalon post ĝia morto manĝos la hundoj, kaj li kuŝos komforte en la tombo sub ligna koloneto, sur kiu oni skulptos kandelington. Lia animo iros al la gloraj antaŭuloj.

Ne! Li ne envias la sorton de l'ĉevalo. Ĉu li forgesis la belan enspezon de la lasta semajno?

Ripozinte, li daŭrigis la vojaĝon. Stranga dormemo malhelpas liajn paŝojn. Senpense li rigardas la grizan nebulon, paŝas aŭtomate, pli kaj pli malrapide.

La piedoj fariĝis pezaĵ, kvazaŭ ŝargitaj per plumboj ili ne sekvas la rektan direkton, sed ŝanceliĝas, desegnas arkojn, kiel la piedoj de drinkulo.

K. JUNOSZA

Sed Judka ne estis ebria, li nur sentis sin iom malforta.

Sed tio estas bagatelo, baldaŭ pasos; tio okazas ne unuafoje! . . .

Tio estas nur dormemo: la kapo iom doloras kaj tremo kuras sur la korpo. Iafoje ĉi tio antaŭdiras malsanon, iafoje pasas sen postsigno. Judka scias, ke oni povas kutimiĝi al tio; cetere, eble li renkontos veturilon . . .

Bedaŭrinde li vidas neniun.

Li jam trairis la duonon da vojo, sed la urbo tute ne proksimiĝas kaj la sako terure premegas. Ĉu sinjoro Onufry ŝutis en ĝin pizojn anstataŭ terpomoj?

Ne, terpomoj estis en la sako. Sed kial ili tiel premegas lian dorson, kial ili fariĝis tiel pezaj? Kiam li ekportis ilin, ili ne ŝajnis tiel pezaj kaj la dormemo ne turmentis lin.

La palpebroj malleviĝas senforte, la piedoj ne oĉeas plu, li nepre devas iom ripozi, ne eble estas daŭrigi la iradon.

Feliĉe tuj apud la vojo estis monteto, sufiĉe seka, kovrita de flaviĝinta herbo. Supozeble iam staris tie kverko, — restis ankoraŭ nigra, larĝa trunko.

Bonega loko por la ripozo!

Judka metis la sakon sur la trunkon kaj mem sidiĝis sur la monteto.

Restas ja ankoraŭ sufiĉe da tempo. La nebulo iom malleviĝis. La pala kaj kvazaŭ dormema suno, rigardanta tra la nuboj, ne atingis ankoraŭ sian tagmezan postenon. Oni povas veni hejmen antaŭ la subiro de l'suno.

Judka meditas, kial Dio donis al la homo malsaĝajn piedojn, kiuj tiel rapide laciĝas? . . . Anstataŭe Li donacis al li delikatan saĝon . . ., sed ne al ĉiuj. Ekzemple kiel bonegajn piedojn havas la faktoro, kiel li kuras por la negoco, kvazaŭ leporo! Sed li ne scias fari *fajn* varsovian palton kaj maldormi kelke da noktoj.

K. JUNOSZA

Tia estas la sorto: unuj ĝuas talenton, aliaj sanon. Judka posedas talenton.

Li kalkulas la kaftanojn, kiujn li faris en la lasta tempo: belegajn kaftanojn! Poste li divenas, kion Bajla kuiris por la sabato? Kredeble multajn bonajn aferojn! Belega tago estas la sabato; oni tiam manĝas, dormas kaj laŭdas Dion... Kiu elpensis la sabaton, estis tre saĝa!...

La pensoj de Judka revenas al la pasintaj tempoj — kvazaŭ en kalejdoskopoj li vidas novajn kaj novajn pentraĵojn... La tuta historio de lia vivo... Sed kion tio signifas? Li sentas sin ree malforta.

Tio estas la laciĝo; la dormo rememorigas pri siaj rajtoj.

La kapo falas sur la bruston, la tuta korpo kliniĝas posten senvole. La flikisto metas la manojn sub la kapon, etendas la piedojn kaj ekdormas...

Du kornikoj rondflugas super li. Fine ili eksidas sur bedo kaj klinante flanken la kapojn, rigardas la dormanton.

Poste ili leviĝas supren kaj de supre rigardas lin atente, laŭte kriante...

Sendube ili miras, kial la hebreo dormas apud la vojo. Li ne estas malviva, ne! Tion ĉi la korvoj scias ĉiam tre bone.

La suno jam malleviĝas okcidenten. Sur la kota vojo aperas grenveturilo kun tri ĉevaloj rapide trotantaj. Sur pajla garbo sidas sinjoro Jacenty, ekonomo de najbara bieno, veturigisto Grzela rapidigas la ĉevalojn. Verŝajne ili veturas por iu maŝino, ĉar ili metis multe da pajlo kaj prenis avenon por kelke da tagoj.

„Haltu, Grzela, haltu!” krias sinjoro Jacenty; „rigardu, kiu kuŝas tie!”

Grzela haltigis la ĉevalojn.

„Tio estas hebreo.”

„Ĉu li estas ebria aŭ malsana?”

„Sinjoro, eble li estas malviva; ni prefere forkuru, ĉar

alie oni vokos nin, kiel atestantojn.”

„Vi estas prava, sed ni vidu: se li vivas, ni prenos lin sur la veturilon, se ne, ni tuj forkuros!”

Grzela desaltis de la veturilo.

„Sinjoro, tio estas Judka, hebreo el Losice; ŝajnas, ke li vivas ankoraŭ, ĉar li spiras.”

„Hebreo, Judka!” kriis sinjoro Jacenty, „ĉu vi forgesis pri la baldaŭa sabato, sentaŭgulo?”

Judka salte leviĝis, ekrigardis per senkonsciaj okuloj kaj ne povis kompreni en la unua momento, kie li estas kaj kio okazis.

„Sidiĝu, kanajlo,” ekkriis Grzela, „ni veturigos vin al Losice . . .”

Dankante kaj salutante ĝis la tero, la flikisto suprenrampis la veturilon kaj rakontis al la ekonomo, de kie li venis.

„Strange estas,” diris la ekonomo al si mem, „li falis apud la vojo kvazaŭ ne homo!”

„Via sinjora moŝto,” respondis Judka, „ĉe ni oni diras: la kokino ne estas birdo, la kaprino ne estas bruto, la tajloro ne estas homo.”

„Li ne estas homo? Kio do vi estas?”

„Homo, sed ne homo, nur tajloro . . .”

„Infana babilado! Kiu ordonis al vi maldormi kvar noktojn?”

„Neniu ordonis, sed ĉiu homo devas vivi . . . Ankaŭ la tajloro devas vivi, sed se li volas vivi, li ne povas dormi, kaj se li volus dormi, li ne povus vivi, ĝi estas tute komprenebla . . .

„Sprita hebreo,” diris Grzela, „por ĉio li havas artifikon.”

.

Post kelke da horoj Judka sidis hejme en nova surtuto kaj pelta ĉapo ĉe la tablo kun festa manĝaĵo. La infanoj

K. JUNOSZA

jam dormis aŭ oscedis en la anguloj. Sinjorino Bajla en vesto ornamita per floroj kaj ruĝaj rubandoj metis sur la teleron de sia edzo kaj sinjoro pecojn da *fajn* spicita fiŝo. Kaj ĉi tiu sinjoro kaj edzo kaj estro de l'familio pensis, kiel bela estas la mondo, bongusta la *kugel*, feliĉa la vivo kaj benita la sabato.

★ ★

★

M. K O N O P N I C K A

MIA ONKLINJO

— „Sed, onklinjol!”

— „Sed, kara Julio, ne kolerigu min senbezzone. Kaj antaŭ ĉio . . . For de ĉi tie, Ĵolka! . . . Ne kisu senĉese miajn manojn!”

„Sed viaj manoj estas kvazaŭ kreitaj por la kisado,” ekkriis mi, ne ellasante ŝian dekstran manon, dum mi penis kapti la maldekstran, kiun ŝi kaŝis de miaj atakoj en la faldojn de sia vesto.

„Ah, kiaj fingretoj! Kvazaŭ el sukero! Kaj, onklinjo tuta . . . Ah, kia bela ruĝo sur la vangoj!”

„Iru, iru jam, mia kara. Hontu paroli tion!”

„Kion? Kial mi devas honti? Pro Dio! Ĉu tio ne estas vera?”

Mi parolis, ŝajnigante senĝenecon, sed efektive mi estis tre embarasita, starante antaŭ mia onklino, fraŭlino Konstanco Puleviĉ, posedantino de tre alta, tre mallarĝa kaj tre blanka domo, en ŝia malgranda salono odoranta lavendon. La virga blankeco de la muroj bele kontrastis la verdecon de l'arbetoj, amase kreskantaj antaŭ la fenestroj. Malnovmodaj mebloj, tegitaj per blankaj kovriloj, staris rigide apud la muroj, kaj la malmola, negastama seĝeto, sur kiu mi sidigis en la unua momento, ŝajnis indignanta pro mia intimeco.

Fraŭlino Konstanco, pli malpli kvardekjara, alta, rekta, malgrasa, en sia nigra vesto, kun la delikata, pala vizaĝo

kaj malhelaj, glate kombitaj haroj, inter kiuj jam brilis arĝentaj fadenoj, similis monahinon.

En tiu ĉi momento ŝi sidis rekta kaj rigida sur mallarĝa, alta seĝo kaj sur ŝiaj palaj vangoj aperis delikata ruĝo de malpacienco kaj konfuziĝo. Ĉe ŝiaj piedoj saltis kaj bojis Jolka kaj Finka; en granda, per blua ŝalo tapetita korbo dormis silkhara Pafcia, kaj la plej malica el ĉiuj, Dianka, kiu ĉiam malpaciis kun mi, murmuris sub la fortepiano.

Ĉio ĉi impresis min melankolie. Mi ĵus ricevis unuan profitan laboron, mi, freŝe diplomita inĝeniero, sed mi devis forveturi malproksimen kaj mi ne sciis, kie lasi mian Anulkan, kun kiu mi edziĝis antaŭ unu jaro.

Momenton daŭris silento, kiu antaŭdiris nenion bonan. Mi decidis tamen ataki ankoraŭ unu fojon.

„Kio estos, onklinjo?” demandis mi per plej dolĉa voĉo. Ŝi malpacience levis la ŝultrojn.

„Kio estos? Nenio . . .”

„Sed onklinjo, vi ja scias, ke mi devas forveturi, ke, se mi rifuzos la proponon de tia firmo, mi perdos grandan profiton kaj bonan klientaron. Ĉu vi rifuzos al mi tian bagatelon?”

„Bela bagatelo!” ekkriis ŝi, „preni en sian domon junan edzinon por kvar semajnoj . . .”

„Ne por kvar, ne! Eble por tri, por du, ĉu mi scias? Mi rapidos, mi laboros tutajn noktojn por reveni plej baldaŭ. Mi ja sopiros . . .”

„Ho jes, mi tion scias,” diris ŝi, rigardante min de l'alto de sia malmola seĝo kaj malestime kuntirante sian mallarĝan supran lipon.

Mi ŝajnis, ke mi tute ne rimarkis la malestimon al mia edza sopiro.

„Konsideru, onklinjo!” petegis mi. „Ĉu mi povas lasi mian birdeton sola? Ŝi havas ĉi tie nek patrinon, nek paren-

cojn . . . Si ĉagreniĝos, sopiros, ploros. Kaj en tia stato . . .”

Fulmo trakuris la vizaĝon de l'maljuna fraŭlino. Si saltis de la seĝo kaj iom kliniĝinte etendis kontraŭ mian bruston sian blankan kaj maldikan fingron. Jolka, Finka kaj Dianka, vidinte la atakan konduton de sia sinjorino, sin ĵetis al mi kun laŭta bojado. Pafcia dormante murmuris.

„Jes, jes! En tia stato!” ekkriis fraŭlino Puleviĉ kun triumfa voĉo de juĝisto, kiu sukcesis eltiri de kulpigito konfeson. „En tia stato! Jen viaj propraj vortoj! Mi mem neniam . . .” For. Jolka! Kuŝu kviete, Finka! . . . Sed, se vi mem komencis paroli pri tio . . . Silentu, Dianka! . . . Mi devas fine malfermi al vi la okulojn! Ĉu vi pensas, mia kara, ke mi estas infano? Ĉu vi opinias, ke mi ne scias, kio sekvas „tian staton”? Ho mia kara! Mi ne estas tiel naiva! Preskaŭ antaŭ dek jaroj mi ĉesis kredi pri viaj cikonioj . . . For, Dianka! . . . Kaj pri ĉiuj aliaj mensogoj. Kaj tial mi decidis akcepti nur tiajn loĝantojn, kiuj ne havis, ne havas kaj ne havos infanojn . . . Mi ne faras aliajn kontraktojn . . . Jes, mia kara . . . Mi scias, mi ĉion scias. Jam dum dek jaroj!

Si diris tion rapide, per kortuŝita kaj mallaŭta voĉo, kiu lom tremis, kaj malhela ruĝo kovris ŝin ĝis la tempioj.

„Dum dek jaroj! Jam tiel longe! Ha, ha, ha! Sed, onklinjo! Ha, ha, ha! Mia Anulka . . .”

„Silentu, mi vin petas!” diris vivege la fraŭlino, „vi estas dironta ree ion malsaĝan.”

„Sed, onklinjo, pri la cikonioj ne kredas nun eĉ la deklaraj knabinoj.”

„Diru nenion plu, klarigu nenion,” defendis sin fraŭlino Konstanco. „Miaj oreloj velkas pro viaj vortoj,”

„Ili velkas? Kontraŭe! Mi vidas, ke ili ĉarme ruĝiĝas. Jen ekzemple la maldekstra. Vera koralo! Ĝi min logas murmureti ion en ĝin . . .”

La maljuna fraŭlino levis ambaŭ manojn al la oreloj

por gardi ilin kontraŭ mi. Ĝiaj koleraĵoj brovoj estis kuntiritaj, la lipoj tremis, la okuloj ĵetis fulmojn. Ŝi estis preskaŭ bela en ĉi tiu momento.

„Pro Dio!” kriis ŝi. „Sufiĉe! Vi ne forgesu, ke vi estas en la loĝejo...”

Ŝi haltis, turnis la rigardon al la pordo kaj aŭskultis ion. Oni aŭdis bruon en la antaŭĉambro. Iu iris tie, kuris, oni malfermis la pordon al la vestiblo, el kiu flugis virinaj voĉoj kaj io, kvazaŭ kata miaŭo. Finka kaj Ĵolka ekbojis kaj, stariginte la orelojn, kuris al la sojlo. Dianka kaŝis sin sub la kanapon kaj furioze bojis.

Mi ankoraŭ ne certiĝis, de kie venas la neatendata interrompo, kiam en la salonon enkuris spireganta Wojciehova, la pordistino.

„Sinjorino... sinjorino!” parolis ŝi, rapide spirante pro kortuŝeco.

„Sinjorino...”

Ŝi ne povis ekspiri, levis la manojn al la brusto kaj nur post momento ekkriis:

„Oni submetis al ni...”

„Kion? Kion oni submetis?” miris la maljuna fraŭlino kun timego en la voĉo...

„Vi demandas kion?” miris Wojciehova. „Kompreneble infanon!”

„Infanon? Jezuo, Mario, Sankta Jozefo!” ekkriis fraŭlino Konstanco kaj, malespere kunpremante sian kapon, senmoviĝis, kvazaŭ ŝtone.

Silento ekregis en la malgranda salono. Wojciehova staris ĉe la sojlo kun larĝe malfermita buŝo kaj laŭte spiregis. Mi ŝiretis mian barbon, ne kuraĝante moviĝi.

„Plej sankta Dipatrino! Plej sankta Dipatrino,” murmuretis la maljuna fraŭlino per tremantaj lipoj. Fine ŝi ekkuraĝis malfermi la fermetitajn okulojn kaj rigardi Woj-

ciehova-n.

„Ĉu vi estas tute certa, ke ĝi estas infano?”

„Certa?” indignis la virino, „ĉu mi estas blinda? Ĉu mi ne konas infanojn? Dank' al Dio, mi havis miajn proprajn . . .”

„Bone, bone, silentu jam!” kriis la maljuna fraŭlino, levante la manojn al la oreloj. „Ho, kompatema Dio! Se ĝi estas infano, prenu ĝin, Vojciehova, kaj tuj redonu al la patrino . . .”

„Jes, vi estas prava . . . al la patrino!” rediris Vojciehova, levante la ŝultrojn, „tia patrino atendos, ĝis oni reportos al ŝi la infanon! . . .”

„Ho ve, mi malfeliĉa!” ĝemis la maljuna fraŭlino. „Prenu do ĝin, metu ien ajn, forportu el la domo, ĝi ne restu ĉi tie . . .”

„Onklinjo!” diris mi, rigardante trankvilige ŝiajn malesperajn okulojn, „kiu ĵetas infanon el la domo dum la frosto? Eble la etulo estas malsata, nuda . . .”

Fraŭlino Konstanco tuta tremis.

„Kompatema Dio, kompatema Dio!” murmuretis ŝi, kunmetante la manojn, kvazaŭ por preĝo . . .

„Kio do, sinjorino? Ĉu preni aŭ ne preni ĝin? Ĝi krietas, kompatindulo. . .”

„Kara Vojciehova . . ., iru! . . . Atendu! Dio, Dio, kompatu min! Kara Julio, eble vi ĝin prenos?”

„Mi? En la nomo de Patro kaj Filo! Mi? Por ke mia edzino eksuspektu min? Mi ne povas, absolute ne povas . . .”

Iu kompatema animo aperis en la pordo de l'antaŭĉambro.

„Faru ion kun ĉi tiu infano, kiam Dio ĝin donis al vi, Vojciehova! Ĝi ja ne estas hundido; ne lasu ĝin ĉe la sojlo! Eble ĝi jam estas baptita . . .”

„Jezuo, Mario! Jezuo, Mario!” kriis la fraŭlino, kurante

en la salono, kvazaŭ senkonscia. „Kia skandalo! Kia skandalo! Ĉiuj en la tuta domo jam scias tion! Mi tion ne post-vivos!”

Ŝi malespere krucigis la manojn kaj haltis, rigardante min kun petego.

Mi kore ŝin ekkompatis.

„Kia skandalo, onklinjo? Tio ja povas okazi al ĉiu. Trankviliĝu, onklinjo! Mi petas, mi tre petas vin! Donu la gaston!” — Mi min turnis al Vojciehova, kiam mi vidis, ke neniŭ kuraĝas decidi ion. „Oni ja devas almenaŭ vidi ĝin.”

Vojciehova eliris kaj post momento alportis paketon, el kiu oni aŭdis mallaŭtan krieton.

„Ho, ĝi ja estas jam granda!” diris mi, rigardante la submetiton, envolvitan en malriĉaj, sed sufiĉe puraj vindaĵoj. „Bela etulo! Ĉu knabo aŭ knabino?”

„Julio!” kriis la onklino, kaptante mian manon. „Pro Dio, mi petegas, indulgu min!”

„Bone, bone!” trankviligis mi ŝian virgulinan timon. „Min persone tio ne tre interesas...”

„Knabo, sinjoro!” respondis triumfe Vojciehova, „li estas jam verŝajne dudeksemajna. Brava knabeto!”

Mi proksimiĝis al la maljuna fraŭlino, kiu forkuris de ni kaj febre tremante kaŝis sin en angulo.

„Venu, onklinjo,” diris mi, prenante ŝian manon. „Ne timu! Rigardu la knabon! La diablo ne estas tiel terura, kiel oni lin desegnas. La knabo-sentaŭgulo estas beleta...”

„Julio mia, pri unu mi petas vin: elektu pli decajn es-primojn. Knabo-sentaŭgulo... Ĉu ne eble estas nomi ĝin alimaniere?”

Mi ekridegis.

„Alimaniere? Bonega propono! Kiel mi nomos lin? Terpomo, aŭ kio, pro diablo?”

La fraŭlino kunpremis la lipojn kaj mallevis la okulojn.

„Venu, onklinjo, venu, mi petas vin.”

Ŝi rifuzis, sed mi tiris ŝin post mi.

Ŝiaj piedoj tremis, la vizaĝon kovris varmega ruĝo.

„Rigardu,” diris mi, ne ellasante ŝian manon, „kia bela knabo! Kiaj saĝaj okuloj! Li ridetas . . . Vere, li ridetas . . .”

La fraŭlino staris antaŭ la infano, haltigante la spiradon kaj larĝe malfermante la okulojn.

„Prenu lin sur la manojn, onklinjo!” insistis mi. „Nur unu momenton! Vi vidos, kia ĝuo tio estas.”

Fraŭlino Konstanco saltis posten kun teruro.

„Ne! Ne! Neniam!” ekkriis ŝi, kovrante la okulojn per ambaŭ manoj.

„Hojda! Hojda!” dume kantis karese Vojcieĥova, balancante alten la knabon, kiun ŝi jam malvolvis el la dika lana tuko.

La infano estis sendube kontenta, ĉar li laŭte kore ridis, ŝvingante la manojn kaj piedojn.

Li gajigis la salonon; sur ĝiaj blankaj muroj lia ombro ŝajnis granda papilio.

La maljuna fraŭlino etendis la kolon, iom kliniĝis kaj scivola rigardis la submetiton. Ŝi rapide spiris, sur ŝia vizaĝo oni vidis ankoraŭ timon, sed la malfermetitaj lipoj komencis jam dolĉe rideti.

Finka, Ĵolka kaj Dianka, mirigitaj de la neordinara sceno, komencis boji, ĉiu alivoĉe, kaj saltis ĉirkaŭ Vojcieĥova.

„For, Ĵolka! Kuŝu, Finka! Silentu, Dianka!” kriis la fraŭlino kaj forpelis la hundojn.

Mi danke ŝin rigardis. Ŝi ekdefendis lin. Mi decidis forĝi la feron . . .

„Donu al mi la knabon, Vojcieĥova. Venu, samlandano,” diris mi, etendante la manojn.

„Jes, kompreneble tuj!” rediris la virino, „por ke vi tempu lin al mi?”

Tiu ĉi „al mi” ŝi diris per tia tono, kvazau ŝi estus nas-kinta, nutrinta lin kaj kvazaŭ li estus ŝia ekskluziva propraĵo. Ĝi iom kolerigis min.

„Estu trankvila, timu nenion! Li min nur ne . . . ataku, De mi nenio minacas lin! Donu, mi ripetas . . .”

Mi prenis la knabon sur la manojn. Li mire, serioze rigardis min, kvazaŭ kerubo, kiu ĵus falis de l'ĉielo.

„Rigardu, onklinjo, la belan knabon!” diris mi, proksimiĝante al fraŭlino Konstanco. „Kiel li rigardas ĉirkaŭe! Saĝa knabo! Kiel granda li estas! Prenu lin, onklinjo, mi petas! Ne timu! Malfeliĉa, malfeliĉa orfo . . . ,” diris mi, karese premante la etulon.

Sur la vizaĝo de la maljuna fraŭlino estis videbla korduŝanta batalo. Jen ruĝiĝis, jen paliĝis ŝiaj vangoj. La mallevitaj manoj liveris al la tuto trajtojn de malforteco kaj rezignacio.

Mi kliniĝis al ŝi. Mia buŝo proksimiĝis al ŝia maldekstra orelo, kiu ankoraŭ ne havis tempon por paliĝi.

„Vi ja ne elĵetos lin, onklinjo!” murmuretis mi. „Vi savos ĉi tiun homan estaĵon, estontan homon . . . Vi premos lin al via koro, vi edukos lin. Vi ekkonos la dolĉon de l'patrineco, vi plenigos vian malplenan vivon . . . Vi ne avaros al li nutraĵon, karesojn, ridetojn . . . Virgulino vi fariĝos patrino . . . Vi plenumos la virinan destinon . . .”

Ŝi klinis la kapon sur mian brakon kaj, kovrinte la okulojn per la mano, mallaŭte ploris. Ĵolka, Finka kaj Pafcia subite vekigis kaj terure ekbojis; la infano ektimis kaj komencis plori. La fraŭlino malkovris la vizaĝon, malsekan pro ploro, sed trankvilan.

„Vojciehova,” diris ŝi, „prenu la hundojn al vi en la kuirejon. La infano timas . . .”

Mi volis ekgenui antaŭ ŝi.

„Prenu ĝin, prenu, onklinjo!” insistis mi, plena de espero.

„Nur unu fojon premu ĝin al la koro, vi vidos, kiel dolĉa estas ĉi tio!”

„Sed mi timas, Julĉjo . . .,” diris ŝi mallaŭte. „Miaj manoj tremas . . . Mi neniam infanon . . .”

„Sidiĝu do, onklinjo! Mi metos ĝin sur viajn genuojn.

Ŝi obeis. Mi kondukis ŝin al la alta seĝego, similanta konfesseĝon. Mi envolvis la infanon en la tukon, sur kiu antaŭ momento kuŝis Pafcia, kaj metis la knabon sur la genuojn de l' fraŭlino. Ŝi volis levi lin, sed tiel mallerte ekfaris tion, ke Vojciehova levis la ŝultrojn indignante.

„Ho! . . . Ĉu oni tiel prenas la infanon? Tie ĉi sub la brako! Jen kiel! Kaj per la dua . . . sub la dorseto . . . Jen kiel!”

Kaj ŝi gvidis la delikatajn manojn de fraŭlino Konstanco, kiu ridetis kaj ruĝiĝis kiel rozo.

„Bonan tagon!” eksonis la laŭta voĉo de l'doktoro, kiu estis najbaro kaj granda adoranto de fraŭlino Konstanco, sed kiu povis neniam paciĝi kun ŝiaj hundoj.

„Kio estas?” diris li bonkore. „La fino de l'mondo? Mi vidas nek Filunka-n, nek Pifka-n (li ĉiam aliigis iliajn nomojn) kaj mia sinjorino kun infaneto sur la brako, kvazaŭ Madonna . . .”

Ŝi ekridetis, ne etendante al li la manon, ĉar ŝi ne sciis, kiun ŝi povus pli sendanĝere eltiri, la manon sub la brako aŭ sub la dorseto.

„Ah!” daŭrigis la doktoro, frotante la manojn, „io tentas min ekgenui antaŭ ĉi tiu manĝujo, kiel la bovo aŭ azeno en la kristnaska kanto . . . De kie vi ricevis la belulon?”

„Dio donis!” diris fraŭlino Konstanco per dolĉa, molavoĉo.

Mi komencis adiaŭi. Ŝi klinis al mi la frunton, kiun mi respektige kisis.

„Lasu ĉe mi vian Anulka-n,” murmuretis ŝi, „kaj ne mortigu vin tie per la laboro, ne rapidu . . .”

A. NIEMOJEWSKI

KAPREOLINETO

La arbara gardisto alportis ŝin el la arbaro, timanta, terurita. Pro plej malgranda murmureto ŝi tremis kiel tremolo. La grandegaj kortaj hundoj, Visla kaj Zagraj, saltis al ŝi, furioze bojante, kaj la gardisto pene forpelis ilin en ilian dometon. Sed Manjo komencis karesi la kapreolineton, alportis al ŝi lakton, kaj la malfeliĉa besto iom post iom kuraĝiĝis, komencis pli gaje ĉirkaŭrigardi, fine eĉ salti. Post kelke da tagoj ŝi jam sentime kuris en la tuta domo kaj ĝardeno, post kelke da monatoj ŝi ne evitis eĉ Visla-n kaj Zagraj-on, kiuj kuris al ŝi, kuŝiĝis ĉe ŝiaj piedoj, lekis ŝin kaj ŝian amikinon Manjon.

Manjo sidis tutajn horojn ĉe la fino de l'aleo antaŭ la pordeto, post kiu jam komenĉiĝis la arbaro, la kapreolineto ĉe ŝiaj piedoj. La kapreolineto fiksis sur la okulojn de Manjo sian rigardon molan, infanan, plenan de konfido, ke Manjo gardos kaj defendos ŝin en malfeliĉa okazo. Post la pordeto la arbaro bruis; tie estis la libero, la kunulinoj. Ŝi kuŝis ĉe la piedoj de Manjo kaj rigardis ŝiajn okulojn. Manjo estis ŝia kunulino.

La folioj flaviĝis, la floroj velkis, grizaj nuboj kovris la ĉielon, la arbaro malĝojiĝis. Poste la neĝo komencis fali, la blanka vintra kovrilo aperis sur la tero. Post la teruraj frostoj ree ekblovis pli molaj ventoj, la viviga suno komencis varmigi, la neĝo degelis. Alkuris la printempo, verde vestante la teron kaj ornamante ĝin per floroj. Manjo ree sidiĝis

A. NIEMOJEWski

kun sia kapreolineto ĉe la pordo de l'ĝardeno. Sed la kapreolineto, jam granda, pli kaj pli maltrankvile turnis sin al la arbaro, flaris, ĉirkaŭrigardis. Foje vespere la kapreolino estis ekstreme maltrankvila. La luno hele lumis. Ombro aperis ĉe la pordeto. Manjo, ektiminte, turnis tien la kapon kaj ekvidis post la pordeto inter la arbetoj kapon de altkreska kapreolo kun belegaj kornoj.

En la sekvinta tago Manjo vane serĉis la kapreolineton en la tuta ĝardeno. Nenie ŝi trovis ŝin. „Malfidela amikino!” murmuretis ŝi. Pasis multaj, multaj monatoj. Oni jam preskaŭ forgesis pri la kapreolineto.

Foje en vintra vespero Manjo en varma pelto iris tra la aleo ĝis la pordeto. La neĝo klinis al la tero la branĉojn de l'abioj. Post momento ŝajnis al Manjo, ke iu staras antaŭ ŝi kaj ŝin rigardas. Ŝi levis la okulojn kaj ekvidis post la pordeto la perdiĝintan kapreolineton. Ŝi ĝoje kuris al la amikino, sed la kapreolineto time forkuris. Manjo provis proksimiĝi al ŝi, la kapreolincto ree forkuris, sed post momento ŝi haltis kaj rigardis Manjon. Manjo sekvis ŝin pli kaj pli rapide. La kapreolino kuris antaŭ ŝi saltante kaj senĉese rigardis, ĉu ŝia antaŭa amikino efektive iras post ŝi. Tiamaniere la kapreolineto kondukis Manjon en la silentan arbaron, kie sendube neniam paŝis homa piedo. Subite la kapreolineto saltis en la densejon kaj malaperis. Manjo haltis, ne sciante, kien sin turni. En la densejo eksonis mallaŭta blekado. Manjo rampis tra la densejo kaj ekvidis la kapreolinan neston. Du malgrandaj tremantaj idoj kuŝis tie. Apud ili Manjo ekvidis la patrinon, sian malfidelan amikinson, kiu forlasis ŝin pro la arbaro, amo kaj patrineco. Larmoj ekfluis el la okuloj de Manjo. Ŝi proksimiĝis singarde al la etuloj kaj ame karesis ilin. La patrino rigardis ŝin trankvile, konfide, kvazaŭ dezirante diri ion al ŝi. En la arbaro mal-lumiĝis.

A. NIEMOJEWSKI

Feliĉe por Manjo la luno aperis super la arbaro. Post longa erarado Manjo renkontis la servistojn, kiuj serĉis ŝin kun lanternoj, ĉar la tuta domo maltrankviliĝis pro ŝia malapero.

En la sekvintaj tagoj Manjo penis ree viziti la rifuĝejon de sia amikino, sed malgraŭ kelkhora serĉado ŝi ne povis trovi ĝin. Kaj ree ŝi longan tempon forgesis pri la kapreolineto.

La kapreolineto estis forgesita, ĉar la belan domon ĉe la arbaro komencis viziti iu, kiun Manjo ĉiam atendis malpacience kaj ŝi senĉese rigardis tra la fenestro, se li ne venis dum kelke da tagoj. Baldaŭ oni festenis la fianĉiĝon. Poste oni komencis kudri la vestaron. Fine alveturis la familioj de l'estontaj geedzoj, amikoj, amikinoj; poŝte oni venigis la edziĝan veston, la fianĉo alportis la ringojn.

La gajaj junaj gefianĉo-kunuloj ĉirkaŭis Manjon; la tutan vesperon ili kantis al ŝi la konatan kanton:

La lastan fojon vi dormos ĉe via patrinjo,
Morgaŭ vi havos jam propran mastraĵon! . . .

Kiam la amikinoj sufokiĝis pro ridado, la fianĉo kliniĝis al Manjo . . . neniue rigardis . . . kaj tiam . . . unuafoje . . .

Manjo forkuris de li en la ĝardenon. Ŝia kapo brulis. Ŝi duonsvenis, deziris esti sola en la ĝardeno, malproksime de l'edziĝa bruo. Estis silenta, luma, luna nokto. Manjo iris tra la tuta aleo ĝis la pordeto, sidiĝis sur la benko . . .

„Morgaŭ? . . . Kio okazos morgaŭ? . . . Leviĝos tago ne simila al la hodiaŭa! . . . Kion ĝi postulos de ĉi? . . . Kion ŝi al ĝi ŝuldos? . . .”

Subite ŝi ekaŭdis murmureton post la pordo. Terurita ŝi saltis de l'benko. Inter la abioj moviĝis ombroj. Proksime io griza . . . ĝi estas ŝia kapreolino, kun du timemaj idoj! . . . Kapreolineto, venu al mi, venu! . . .

A. NIEMOJEWSKI

La kapreolino, starante post la pordeto, rigardis Manjon per siaj konfidemaj okuloj: la junaj idoj, kiuj eble unuafoje elkuris el sia nesto en la vastan mondon post la patrino kondukanta ilin, time kaj mire rigardis la junan knabinon.

La okuloj de tiu ĉi patrino kvazaŭ parolis ion al Manjo, kion ŝi ne povis kompreni, sed ŝi demande rigardis ilin, kiel juna amikino la okulojn de pli sperta amikino. La kapreolineto turnis la kapon jen al la idoj, jen al Manjo . . .

Subite en la aleo eksonis mallaŭta murmureto: „Fraŭlino Mario, fraŭlino Mario!” La kapreolineto kun la idoj forkuris, ankoraŭ unufoje rigardis al Manjo kaj malaperis inter la abioj.

EN KVIETA VESPERO

Super Betanio pendis la virga bluo de la ĉielo. La suno lumis okcidente sur la deklivo de Oliva Monto, plenigante la aeron per ora polvo kaj blindigante la okulojn tien rigardantajn. La montojn, dronantajn en la ombro, kovris blua nebulo, kaj silento estis en la aero, kvazaŭ la feliĉo, destinita por la homoj, jam atingis ĉiujn angulojn de l'tero, ĉiujn dometojn kaj tendojn.

De tempo al tempo flugis supren perlaĵ kolomboj, flirtis en la aero kaj are falis sur la montojn.

De tempo al tempo eksonis sur la paŝtejo plenda kanto de paŝtisto, disflugis en la aero kaj eksilentis. Post momento la eĥo ripetis la kanton. Ŝajnis, ke la plendo trafis la ĉielan firmamenton kaj resaltinte eksonis sur la tero.

En la fino de l'urbeto staris malgranda domo, tute kaŝita en hederoj. La domo estis ĉirkaŭita per muro, trans kiu kreskis cipresoj. Interne estis olivaj, figaj, granataj arboj kaj kakttoj. Sur la vojo post la ligna pordeto leviĝis la polvo,

brilanta en la sunaj radioj. Areto da nudpiedaj homoj iris tie, sekvanse maljunulon kun granda, senhara kapo, nur ĉe la tempioj kovrita de arĝentaj bukloj. La areto ĵus foriris de la pordeto al la urbo kaj baldaŭ malaperis post la arboj. La polvo iom post iom falis sur la vojon, kaj post momento en la pura aero tremis nur la sunaj briloj.

Antaŭ la domo, sub branĉoriĉa cedro estis pumpilo, sur kiu sidis viro en blanka vesto. Palaj haroj, disigitaj sur la kapo, kovris la flankojn de l'malgrasa vizaĝo kaj kuniĝis sur la ŝultroj. Malgranda barbo, same pala, plilongigis liajn trajtojn. Liaj bluaj okuloj rigardis la sunan brilon kaj sorbis la radiojn de la blindiganta lumo. Stranga kvieto ornamis lian palan vizaĝon, nur ĉe la buŝo vagis ia malĝojo. De la alta frunto brilis kvazaŭ triumfa ĝojo, la vizaĝo esprimis kvieton, kaj la buŝo malĝojon. Oni volus senfine rigardi ĉi tiun vizaĝon.

La viro, fiksante la rigardon sur la subiranta suno, silentis. En la mano li tenis floron de rozo.

Ĉe liaj piedoj sidis juna virino, rigardanta lian belan vizaĝon. La trajtoj de l'virino esprimis senliman bonecon, la blankeco de l'vizaĝo egalis alabastron. Ŝiaj malpalaj haroj kun kupra brilo, falis sur la dorson, ŝultrojn kaj manojn, sur kiuj ŝi apogis la kapon.

Sur la sojlo de l'domo, en la duone malfermita pordo, staris alia virino kun punktita pladeto en la mano kaj kun brikokolora kruĉo sur la kapo. Ankaŭ ŝi estis juna kaj bela, sed diferencis de la alia per la bruneco de l'vizaĝo kaj per la korve nigraj haroj, kiuj brilis kvazaŭ ekbrulante pro la suna fajro. Ŝi turnis la nigrajn okulojn al la viro ĉe la pumpilo, rigardante kun sindonemo kaj admiro de virino, kiu eble ne komprenis lin kiel la viroj, sed kiu sekvus lin plej malproksimen, por forigi antaŭ li la pikilojn de l'arbetaĵoj, ĉerpi por li akvon el rivereto kaj prepari al li manĝaĵon, kiam vespere

li ripozas post la migrado dum la tuta tago.

Ankaŭ nun ŝi pensis pri tio, enirante en la vestiblon de l'domo, en kiu regis granda ĝojo, ĉar ilia amata frato, Lazaro, resaniĝis. Ŝi, Marto, kaj sidanta ĉe la pumpilo Mario, jam tute perdis esperon, ĉar la malsano estis terura, daŭris jam kelke da jaroj kaj senhalte progresis. Foje post la tagmezo la malsanulo fermetis la okulojn, ĉiu spiro forkuris el lia brusto kaj morta bluo kovris lian vizaĝon. Ĝuste tiam la juna *rabbi*, sidanta tie ĉe la pumpilo, venis Betanion. La senesperaj fratinoj serĉis lin en la tuta urbo, ĝis fine ili trovis lin en la domo de pia impostisto. Li ne povis tuj veni. Atendante do ĉe la pordo, ili malespere etendis la manojn, ĉar ĉiu minuto estis kara. Post longa atendado ili tute perdis la esperon kaj pensis, ke ĉiu helpo estos vana. Sed li leviĝis de l'tablo, sekvis ilin kaj transpaŝis la sojlon de ilia domo.

Longe li rigardis Lazaron, kuŝantan senmove. La fratinoj staris en la pordo kaj ploris. Li medite turnis sin al ili kaj diris, montrante la kuŝanton:

„Kiel kviete li dormas! . . .”

Kaj poste li aldonis, kvazaŭ parolante al si mem:

„Ĉu interrompi lian dormon? . . .”

Sed vekis lin el la meditado la laŭta ploro de l'fratinoj, kiuj, aŭdinte liajn vortojn, ĉirkaŭprenis unu la alian kaj ploregis:

„Ni perdis la amaton!”

Tiom da malespero estis en ilia plendo kaj tiom da doloro sur iliaj vizaĝoj, ke kompato ekregis lin. Li ordonis al ili eliri, eksidis ĉe la lito de Lazaro kaj prenis lian malvarman manon, senmove pezan.

Ekregis silento.

La fratinoj ekgenuis en la alia ĉambro, apogis la vizaĝojn al la muro kaj ploris. Poste ilia plorego fariĝis malespera ĝemo, kiu iom post iom mallaŭtiĝis.

A. NIEMOJEWSKI

Longe daŭris la silento, ĝis fine eksonis ĉe la lito forta voĉo:

„Mi ordonas al vi, Lazaro, leviĝu!”

Oni ekaŭdis ĝemeton, poste ekpaŝon kaj post momento aperis sur la sojlo la *rabbi* kondukanta Lazaron.

La fratinoj sin ĵetis kun ploro al la frato, ĉirkaŭprenis kaj karesis lin, kaj poste kisis la piedojn de l'*rabbi* kaj verŝis sur ilin larmojn de dankemo kaj feliĉo.

La *rabbi* ekamis ĉi tiujn homojn kaj dum sia loĝado en Betanio ĉiuvespere vizitis ilin. Ofte li longe paroladis kun Lazaro. Tiam Mario sidis ĉe liaj piedoj, kaj Marto preparis la vespermanĝon.

Lazaro zorgis, ke nenio manku al la kolegoj de l'*rabbi*, kiuj restis en la urbeto. Kiam li forestis, la *rabbi* parolis ankaŭ kun Mario.

Ili interparolis ĉe la pumpilo pri la montoj, super kiuj lumis la suna polvo de l'okcidento; pri la virga bluo de l'ĉielo, pendanta super Betanio; pri diversaj floroj, kies bonodoro plenigis la aeron; pri la homoj kaj proksimaj okazoj.

Kiam la *rabbi* parolis, Mario fiksis siajn okulojn sur lia buŝo kaj kaptis ĉiun vorton. Kaj li ne nur meditis, sed ankaŭ kvazaŭ laŭte meditis, ne kaŝante de ŝi siajn pensojn. Ĉar ŝi estis al li fidela kaj sekvus lin kiel Marto. Sed irante, ŝi ne zorgus pri la akvo kaj nutraĵo: ŝi nur klinus la oreilon al tio, kion li dirus. Kaj se duboj vizitus lin, ŝi lin subtenus per dolĉa vorto kaj fidela rigardo.

Nun, kiam li venis Betanion, kiam li estis apud la sojlo de Jeruzalemo, kies turoj blue brilis post la intermontoj, kiam li estis forlasonta simplajn sindonemajn provincanojn por iri en la bruan ĉefurbon de la lando, nun li sentis, ke tian fidelan koron li pli bezonos ol iam ajn; ke eble venos momento, kiam la plej fidelaj ekstremos, forkuros teruritaj kaj lasos lin sola en malfacila horo. Kaj li deziris havi tian koron ĉe sia

A. NIEMOJEWSKI

flanko, se tia horo venos.

Li rigardis maltrankvile la brilantajn turojn. Li sentis, ke tie finiĝos la dramo de lia sorto. Post la pordeto ĵus malaperis liaj kunuloj, kiujn li sendis en la urbeton, por ke ili prepariĝu por morgaŭa foriro. Ĉi tiu vespero estis eble la lasta de la plej bela periodo de lia vivo

Pasas jam la tria jaro de l'tago, kiam li ĉesis vivi izolita kaj aperis inter la homoj, kiam li komencis iradi de urbo al urbo, de urbeto al urbeto, instruante en la sinagogoj. La tri jaroj pasis kvazaŭ tri tagoj, kvazaŭ unu sonĝo! Amasoj homaj ĉirkaŭis lin kaj li sidiĝis kun ili sur la montoj kaj paroladis. Aŭ, veturante sur lago, li ordonis direkti la ŝipeton al la bordo, kie atendis multego da homoj. Proksimiĝinte tiamaniere, ke oni povu lin aŭdi, li instruis per komparoj. Oni kondukis al li infanojn, petante lian benon. La suferantoj deziris, ke li rigardu ilin kaj metu la manojn sur iliajn kapojn. Aliaj penis almenaŭ tuŝeti la randon de lia vesto. Jam tri jarojn li vizitis la grizajn montojn, veturis sur la bluaj lagoj kun la fiŝkaptistoj, kiuj lin amis kaj respektis, sidis post varmegaj tagoj ĉe la pumpilo kaj rigardis la subirantan sunon, levante iafoje bonodoran floron al la vizaĝo.

Ĉirkaŭis lin amantaj koroj kaj simplaj animoj, kiuj lin kredis. Li amis ilin kaj estis kara por ili.

Se do lia devo estis montri al la homoj la serenecon kaj belecon de l'vivo, trankviligi la korojn kaj pruvi, ke oni povas vivi sur la tero noble kaj feliĉe, li jam plenumis ĝin . . .

Se lia devo estis doni ekzemplon, kiamaniere oni povas altiri al sia kredo homajn amasojn, kiel konduki ilin kaj forigi ilian malĝojon, li jam plenumis ĝin . . .

Sed nun li devis fari pli multe.

Ĝis hodiaŭ li renkontis sur sia vojo korojn, kiuj memvole malfermiĝis antaŭ li; sur ĉi tiuj montoj, valoj kaj lagoj oni

atendis tian homon. Kiam do li aperis, oni rekonis kaj ekhonoris lin.

Sed li sentis, ke tie inter la blue brilantaj turoj ĉio aliĝos; ke tie lia tasko estos pli malfacila, ke li devos ataki korojn malmolajn kiel ŝtono kaj spiritojn glitigajn kiel serpenta korpo. Farinte jam tiel multe, li ne povis halti. Li devis tien iri, kiel la suno devas lumigi ne nur la liberajn suprojn, sed ankaŭ atingi la kreskaĵojn sin kaŝantajn post muro kaj akceli ilian vivon. Li antaŭsentis, ke tie oni akceptos lin per aliaj rigardoj kaj alie efikos liaj vortoj, kiuj devos esti bruligaj; ke tie li renkontos animojn malgajajn kiel la nokto kaj pensojn pli obstinajn ol la ŝtonegoj.

Kaj domaĝe estis foriri de ĉi tiuj homoj puraj, simplaj kaj fidelaj, forlasi ĉi tiujn montojn, sunan polvon, virgajn bluaĵojn, bonodorajn florojn; ne vidi plu ĉi tiujn belajn tagojn kaj kvietajn vesperojn, plenajn de revoj, de noblaj pensoj kaj pasigitajn en interparoladoj antaŭ la domo de ĉi tiuj homoj.

Li deturnis la okulojn de l'suno, por momento fermetis ilin, kaj poste mallevis ilin al Mario, kiu, apoginte la kapon sur la manplato, rigardis lin kun senlima amo kaj sindonemo.

Longe li silentis kaj rigardis ŝin, ĝis fine li malfermetis la lipojn kaj demandis:

„Ĉu vi amas min? . . .”

Ŝi ekgenuis antaŭ li, almetis la vizaĝon al liaj genuoj kaj levinte siajn okulojn al liaj, respondis per larmoplena rigardo.

Li ree silentis kaj rigardis; fine li demandis:

„Vi ne forlasos min? . . .”

Tiam ŝi ekploris kaj metinte la okulojn sur liajn genuojn, ne povis trankviliĝi.

Li daŭrigis:

„Vi ne forlasos min, kiam ĉiuj timigite forkuros? . . .

Kiam ĉiu, tremante pro si mem, diros, ke li ne konas min? . . .

A. NIEMOJEWSKI

Kiam mi restos sola kun maltrankvilo kaj doloro? . . .”

Ŝi ploris kaj larmis, ne povante diri vorton. Ŝi nur ĉirkaŭprenis liajn piedojn kaj kisis liajn genuojn.

Li demandis:

„Vi ne forlasos min, kiam la malbenoj falos sur mian kapon, kiam la homoj indigninte disŝiros siajn vestojn, kiam ili levos kontraŭ min ŝtonojn? Kiam oni sendos gardistojn, kaptos min, ligos kaj kondukos al la juĝo? . . . Ĉu vi ne forlasos min tiam? . . .”

Ŝi levis la kapon kun teruro kaj kunmetis la manojn; paleco kovris ŝian vizagon.

Li daŭrigis:

„Kiam oni forŝiros mian veston por min vipi? . . . Kiam oni kraĉos sur mian vizagon, nomante min mensogulo kaj blasfemulo? . . . Kiam mia nomo estos moko? Kiam tiuj, kiuj kredos min, riskos sian vivon? . . . Kiam vi vidos min malhonorita, sanganta . . . Ĉu vi ne forlasos min tiam? . . .”

Ĝemo eliĝis el la brusto de la juna virino. Ŝiaj okuloj estis kvazaŭ senkonsciaj, la lipoj tremis.

Li ankoraŭ pli kliniĝis super ŝi kaj fine murmuretis per interrompata voĉo:

„Kiam oni eble trenos min ekster la murojn de tiu ĉi postmonta urbo kaj krucuminte lasos al la grakantaj birdoj? . . . Kiam venos la timo kaj la agonio kaj la plej malfacila momento? . . . Kiam nokte oni devos demeti, lavi, envolvi kaj entombigi min, kaj alŝovi la ŝtonon . . . Ĉu vi ne forlasos min tiam? . . .”

Mario falis al liaj piedoj kun plorego. La doloro premis lian koron, la pensoj implikiĝis kaj konfuziĝis. Ŝi almetis la buŝon al liaj piedoj, kaj per la mano premis la brulantan tempion, en kiu, kvazaŭ martelo, batis timo, doloro kaj malespero.

Li silentis kaj ne leviĝis, atendente respondon.

A. NIEMOJEWSKI

Tiam ŝi mem iom leviĝis, sed kvazaŭ senkonscia; ŝi frotis la frunton kaj rigardis per malklaraj okuloj la ĉielon kvazaŭ demandante: ĉu povas realiĝi tio, kion mi aŭdis? . . . Poste ŝi rigardis la montojn kvazaŭ kun demando: ĉu eble estas, ke oni faros tion al li? . . . Ŝi rigardis la olivajn, granatajn arbojn, la hederojn de l'domo, la belan, kvietan vesperon, fine liajn blankan veston, helan frunton kaj la veron, brilantan en liaj okuloj. Ŝi rigardis kvazaŭ senkonscie kaj ne povis kompreni.

Ŝi do sidis mutiĝinte. Ekregis longa silento.

Tiam Marto aperis sur la sojlo. Ŝia bruna vizaĝo ruĝiĝis, en la okuloj brilis vivo. Ŝi tenis en la mano kruĉon kaj starante en la pordo, diris al la fratino:

„Ĉu vi ne helpas min prepari la vespermanĝon? La frato baldaŭ revenos el la urbeto kaj invitos la gaston al la tablo. Kaj kiamaniere ni montros al la gasto nian sindonemon, se ni ne zorgos por kontentigi lin?”

Mario ree ekpremis la tempiojn; ŝi aŭdis nenion, ŝiaj pensoj forkuris malproksimen.

La *rabbi* malĝoje ekridetis, rigardis Marton kaj diris:

„Ne riproĉu ŝin. Eble ŝi zorgas nun pli multe ol la aliaj.”

Marto aliris al la pumpilo, metis la kruĉon sur la teron kaj demandis:

„Kiel vi komprenas tion, *rabbi*?”

Mario uzis la okazon por foriri kaj malaperis post la pordo de l'domo. Marto ankoraŭ ne finis la interparoladon kun la juna *rabbi*, kiam Mario reaperis, portante kupran vazon kaj proksimiĝinte al la *rabbi*, ekgenuis ĉe liaj piedoj. Ŝi estis tre pala. Sur la rigida vizaĝo fluis larmoj. Ŝiaj manoj tremis.

Ŝi lavis la piedojn de l'*rabbi* kaj viŝis ilin per la bukloj de siaj haroj. Poste ŝi larmis sur ilin kaj ree viŝis per siaj longaj haroj. Fine ŝi oleis ilin per multekostaj oleoj.

A. NIEMOJEWSKI

La *rabbi* metis unu manon sur ŝian kapon kaj per la dua kovris sian vizaĝon.

Marto rigardis lin kaj la fratinon, ne komprenante.

En la sama momento estingiĝis okcidente la lasta radio de la plej bela tago sur la tero.

★ ★

★

E. O R Z E S Z K O

LEGENDO

Unu post alia falis sur Romon malfeliĉegoj: fajro, pesto kaj mortiga atako de etruskoj. La urbo estis tiam malgranda kaj malriĉa, kaj eĉ la lepora gento, ĉiam timigata kaj malsata, ne enŝuis al la loĝantoj ilian sorton. Sed Numa Pompilius kreskis inter tiuj mizeraj dometoj kaj en la matura aĝo li pensis kaj klopodis pri la malfeliĉa loĝantaro. Kiam do nun el ĝia brusto eliris duoblaj plendoj, li demandis la ĉielon kaj la teron: pro kio?, vokante al la ĉielo kaj al la tero: helpon! La aŭguroj diris: Jupitero estas ofendita! La estro de l'popolo suriru la Eskvilinan monteton, kaj tie en sankta arbareto la tondroĵetanta dio aperos al li kaj anoncos, kia penta ofero povos forigi lian koleron.

Sur la Eskvilina monteto, inter la arboj, kovritaj de la nokta mallumo, Numa ĵetis sin teren kaj lia vizaĝo falis sur la herbojn, malsekajn pro nokta roso. Super li aperis la reĝo de i'tondroj kaj de l'favoroj, de l'mallibero kaj de la liberigo. Li aperis en lumaĵo, teruranta la homajn pupilojn, en vesto fleksita kiel la cigno, kun aglo ĉe la flanko kaj kun arko, streĉita per fulmo, en la mano. La arboj senmoviĝis, silentiĝis la murmuroj kaj la sonoj de l'tero; en tiu ĉi silento de teruro kaj de atendo ekbruis la voĉo de Jupitero:

„Sur mian altaron, por kvietigi mian koleron, metu morgaŭ kvincent kapojn!”

La malsekaj herboj ekmurmuris sub la tremanta korpo de Numa; lia mallaŭta voĉo, humile peteganta, rediris:

„Vi postulas kvincent kapojn, Sinjoro de l'mondo, sed kiajn? Mia mortema orelo ne aŭdis tion ĉi. Morgaŭ, en la ĝardenoj, kiujn ankoraŭ ne detruis Tibro superakvanta la landon, antaŭ ol la oraj haroj de Febus lumigos la teron, mi detranĉos kaj metos sur vian altaron kvincent kapojn de ajlo!

En la ree silentiĝinta spaco ektondris la voĉo de Jupitero:

„Vi estas avarulo, Numa, kaj vi provas ŝpari la kapojn de viaj romanoj. Donu do al mi mil korojn, elŝiritajn el homaj brustoj!”

Numa respondis:

„Jen mi estas. Mi suferas por miloj, — mil koroj batas en mi. Elŝiru ilin, Sinjoro, el mia brusto.”

„Vi ŝparas ankaŭ la korojn. Donu do al mi unu vivon, sed tian, en kiun mia kreanta genio spiris la grandecon plej altan.”

„Jen mi estas. Mi fariĝis la estro de mia popolo, — mi estas la plej granda el ili.”

„Mi ŝanĝas mian volon. Mi postulas, ke vi oferu la vivon de tiu el romanoj, kiu estas la plej malalta el la plej malaltaj.”

„Jen mi estas. Mi servas la tutan mian popolon; mi estas servisto de ĉiuj, mi estas pli malalta ol la plej malaltaj.”

La brovoj de la dio de l'tondroj iom malsulkiĝis kaj la teruraj fulmoj erarantaj antaŭ liaj okuloj, paliĝis. Kiam li ekparolis, lia voĉo similis la silentiĝantan tondron.

„Vi plaĉas al mi, amanto de ĉiela Egerio. Estas domaĝe lasi vin en malriĉa kaj turmentata Romo. Leviĝu kaj iru en la landon de etruskoj. Tie la kampoj estas fruktodonaj kaj la ĝardenoj estas riĉaj; en la marmoraj palacoj sonoras luksaj festenoj kaj en la sanktejoj staras monumentoj de grandaj homoj. Mi ordonos, ke vi estu reĝo de potencaj kaj feliĉaj etruskoj. Via vivo fluos en la ĝuo, kaj la manoj de majstro skulptos monumenton por vi kaj lokos ĝin sur plej altan supron.”

Numa levis sian petegantan vizaĝon de la herboj, kovritaj de la roso kaj respondis per demando:

„Sed ili, Sinjoro?”

„Vi ankoraŭ pensas pri ili. Mi do ne sendos vin al etruskoj, sed prenos en mian ĉielon. Jen etendiĝas al vi la flugilo de mia aglo. Ĝi estas larĝa kaj mola. Metu sur ĝin viaj membrojn, lacajn pro la tera laboro, kaj sur la delikataj ondoj de l'aero flugu en la spacon de l'senmorta feliĉo!”

Numa ree demandis:

„Sed ili, Sinjoro? Sed miaj romanoj?”

„Vi ankoraŭ pensas pri ili! Pensu pri via Egerio! Ŝi estas ĉielanino, kaj vi, filo de la tero. Sole sekrete kaj malofte vi povas vidi ŝin apud la bordo de l'rivereto, kiu fariĝis el ŝiaj larmoj. Via morto tranĉos la fadenon de via amo. Vi ne vidos ŝin en malluma Erebo, kaj por ŝi mia Olimpo fariĝos malluma Erebo. Jen mi sendas el mia arko fulmon; kaptu en viajn manojn la fajran rubandon, ĝi alportos vin al Egerio kaj al la eterna feliĉo.

La malsekaj herboj tremis sub longa ĝemo de Numa, sed levante sian vizaĝon de l'tero, li rediris:

„Sed ili, Sinjoro, sed ili? Sed ili?”

Estingiĝis la fulmo, tuj rapidonta el la arko de Jupitero, kunmetiĝis la flugilo de la aglo. Sur la potencaj ŝultroj de Jupitero la haroj ondis pli kaj pli delikate, kaj en la voĉo de l'kolera dio aŭdiĝis favoraj sonoj, kiam li diris:

„Faru, Numa, ke en via Romo fluu rivero da tia amo, kia la via, kaj mi ligos ĉiujn sagojn en mia sagujo!”

Kaŝiĝis la ĉiela apero. En la sankta arbareto restis Numa kun vizaĝo sur la tero. En la nokta mallumo la herboj tremis sub liaj ĝemoj, malsekiĝis pro la roso de liaj larmoj.

„Kiel mi tion faros, Sinjoro de l'mondo? Kiel mi povas fari tion?”



O M B R O J

Kiam la briloj de l'suno estingiĝas sur la ĉielo, de l'tero leviĝas la krepusko. La krepusko — la granda nokta armeo de miloj da nevideblaj taĉmentoj kaj milionoj da batalistoj. Potenca armeo, kiu de nememoreblaj tempoj batalas kontraŭ la mondo, forkuras ĉiumatene, venkas ĉiuvespere, regas de la subiro ĝis la leviĝo de l'suno kaj tage, rompita, kaŝas sin en nestoj kaj atendas.

Ĝi atendas en la montaj profundaĵoj kaj en la keloj de l'urboj, en la arbaraj densaĵoj kaj en la lagoj mallumaj. Ĝi atendas, kaŝante sin en la eternaj kavernoj de l'tero, en la minejoj, en la kavoj, en la anguloj de l'domoj. Dispelita kaj ŝajne forestanta, ĝi tamen plenigas ĉiujn kaŝejojn. Ĝi estas en ĉiu fendo de l'ŝelo de l'arboj, en la faldoj de l'homa vesto; ĝi kaŝas sin sub la plej malgranda sablero, kroĉiĝas al la plej maldika aranea fadeno kaj atendas. Timigita en unu loko, ĝi tuj transiras en alian, uzante ian ajn okazon por reveni tien, de kie oni forpelis ĝin, por surrampi neokupatan postenon kaj superversi la teron.

Kiam la suno estingiĝas, la armeo de krepuskoj en densaj taĉmentoj eliras el siaj kaŝejoj, silenta kaj singardema. Ĝi plenigas la koridorojn de la domoj, la vestiblojn kaj la malbone lumigitajn ŝtuparojn; ĝi forlasas sian postenon sub la ŝrankoj kaj tabloj, elrampas en la mezon de la ĉambroj kaj aldiĝas sur la kurtenoj; tra la ventoliloj de la keloj kaj tra la fenestraj vitroj ĝi elŝovas sin en la stratojn, en surda

silento ĝi atakas la murojn, la tegmentojn kaj, atendante sur la pintoj, ĝi restas trankvila, ĝis okcidente paliĝos la ruĝaj nubetoj.

Ankoraŭ unu momento kaj subite leviĝos grandega malluma eksplodo, kiu atingos la ĉielon. La bestoj kaŝos sin en la nestojn, la homo forkuros hejmen; la vivo, kvazaŭ kreskaĵo sen akvo, kuntiriĝos kaj komencos sekiĝi. La koloroj kaj formoj disfluos en neesto; la timo, eraro kaj krimo ekregos la mondon.

En tiu momento sur la malpleniĝantaj stratoj de Varsovio aperas stranga homa kreitaĵo kun malgranda flameto super la kapo. Li rapide kuras tra la strato, kvazaŭ lin persekutus la mallumo; li haltas apud ĉiu lanterno unu momenton, kaj ekbruliginte gajan lumon, li malaperas, kiel ombro.

Kaj tiamaniere ĉiutage. Ĉu sur la kampoj la printempo parfumas ĉion per la bonodoro de la floroj; ĉu bruegas julia fulmotondro; ĉu aŭtunaj ventoj disblovas sur la stratoj polvajn nebulojn; ĉu en la aero flugas vintraj neĝoj — li ĉiam, kiam venas la vespero, trakuras kun sia flameto la stratojn, ekbruligas la lumon kaj poste malaperas, kiel ombro.

De kie vi devenas, homo, kaj kie vi kaŝas vin, ke ni ne konas vian vizagon, nek aŭdas vian voĉon? Ĉu vi havas edzinon aŭ patrinon, kiu atendas vian revenon? Aŭ infanojn, kiuj, stariginte en angulo vian lanterneton, surrampas viajn genuojn kaj ĉirkaŭprenas vian kolon? Ĉu vi havas amikojn, al kiuj vi rakontas pri via feliĉo aŭ nesukceso, aŭ almenaŭ konatojn, kun kiuj vi povus paroli pri ĉiutagaj aferoj? Ĉu vi posedas hejmon, kie oni povus trovi vin; nomon, per kiu oni vin povus voki; bezonojn kaj sentojn, kiuj farus vir tia homo, kiaj ni? Aŭ ĉu vi vere estas senforma kreitaĵo, muta kaj nekomprenebla, kiu aperas sole en la krepusko, ekbruligas la lumon kaj poste malaperas, kiel ombro?

B. PRUS

Oni respondis al mi, ke li vere estas homo; oni eĉ donis lian adreson. Mi iris tien kaj demandis la pordiston:

„Ĉu loĝas ĉe vi la homo, kiu eklumigas la lanternojn sur la stratoj?”

„Ĉe ni.”

„Kaj kie?”

„En tiu ĉambreto.”

La ĉambreto estis fermita. Mi rigardis tra la fenestro, sed mi vidis nur simplan liton apud la muro kaj la lanterneton sur alta bastono. La lanternisto forestis.

„Almenaŭ diru al mi, kia estas lia mieno?”

„Kiu povas scii?” respondis la pordisto, levante la ŝultrojn. „Mi mem ne konas lin bone,” li diris, „ĉar tage li neniam estas hejme.”

Post duonjaro mi venis duan fojon.

„Ĉu hodiaŭ la lanternisto estas hejme?”

„Ho!” diris la pordisto, „li ne estas kaj ne estos. Hieraŭ oni enterigis lin. Li mortis.”

La pordisto ekmeditis.

Demandinte pri kelke da detaloj, mi forveturis tombejon.

„Montru al mi, tombisto, kie oni hieraŭ enterigis la lanterniston.”

„Lanterniston?” ... li ripetis. „Kiu povas scii? Hieraŭ oni alveturigis tridek mortintojn.”

„Sed li estas enterigita en la parto por la plej malriĉaj homoj.”

„Alvenis dudek kvin tiaj.”

„Sed li kuŝis en nekolorita ĉerko.”

„Oni alveturigis dek ses tiajn.”

Tiamaniere mi ne vidis lian vizaĝon, mi ne aŭdis lian nomon, mi ne trovis lian tombon. Kaj li restis post la morto, kia li estis dum la vivo: estaĵo videbla nur en la krepusko, muta, senforma kiel ombro.

B. PRUS

En la krepusko de l'vivo, kie la malfeliĉa homaro eraras palpe, kie unujn rompas la malhelpoj, aliaj falas en profundegaĵon kaj neniu scias certan vojon; kie la malfeliĉo, mizero kaj malamo ĉasas la homon, ligitan de la superstiĉoj, ankaŭ sur la mallumaj vojoj de l'vivo rapidas lanternistoj. Ĉiu portas super la kapo flameton malgrandan, ĉiu ekbruligas lumon sur sia vojeto, vivas nekonata, laboras neŝatata kaj poste malaperas kiel ombro.

LA ŜIMO DE L'MONDO

Mi estis unu fojon en Pulawy kun botanikisto. Ni sidis en la ĝardeno sur benko, sub grandega ŝtono, kovrita de musko aŭ ŝimo, kiun mia klera konato esploradis dum kelke da jaroj.

Mi demandis, kion interesan li trovas en la neregulaj makuloj grizaj, cindrokoloraj, verdaj, flavaj aŭ flavruĝaj?

Li rigardis min nefide, sed konvinkite, ke li havas antaŭ si malklerulon, li komencis klarigi:

— „La makuloj, kiujn vi vidis, tute ne estas senviva malpuraĵo, sed kolekto da vivaj estaĵoj. Nevideblaj por nearmita okulo, ili naskiĝas, moviĝas, edziĝas, naskas idojn kaj fine mortas.

Ankoraŭ pli rimarkinde estas, ke ili formas kvazaŭ sociojn, kiujn vi vidas tie ĉi, kiel diverskolorajn makulojn; ili kulturas sub si la teron por la postaj generacioj, kreskas, koloniigas la neokupitajn lokojn, eĉ batalas unuj kontraŭ la aliaj.

Tiu ĉi cindrokolora makulo, granda kiel manplato, estis antaŭ du jaroj ne pli granda ol kvargroŝa monero. Tiu malgranda griza makuleto ne ekzistis antaŭ unu jaro kaj devenas de ĉi tiu granda makulo, kiu okupas la supron de la ŝtono.

B. PRUS

Tiuj ĉi du: la flava kaj la flavruĝa batalas unu kontraŭ la alia. Iam la flava estis tre vasta, sed iom post iom la najbaro elpuŝis ĝin kaj okupis ĝian lokon. Rigardu la verdan — kiel la griza najbaro enmetas bedojn en ĝin, kiom da grizaj strioj, punktoj kaj insuletoj oni vidas sur la verda supraĵo?"

„Kiel inter la homoj," mi rediris.

„Ne," respondis la botanikisto. „Al ĉi tiuj societoj mankas la lingvo, artoj, konscio, sentoj, unuvorte: ili ne havas animojn kaj korojn, kiujn posedas ni, homoj. Ĉio fariĝas tie blinde, meĥanike, sen simpatio kaj sen antipatio."

Post kelke da tagoj mi estis apud la sama ŝtono, nokte kaj en la lumo de la luno mi observis la ŝanĝojn en la formo kaj grandeco de diversaj makuloj.

Subite iu puŝis min. Tio ĉi estis mia botanikisto. Mi petis, ke li sidiĝu; sed li ŝarigis sin tiel, ke li kovris la lumon de la luno, kaj mallaŭte murmuretis ion.

La ĝardeno, la benko kaj la ŝtono malaperis. Mi sentis ĉirkaŭ mi neklaran lumon kaj grandegan malplenon. Kaj kiam mi turnis la kapon flanken, mi ekvidis kvazaŭ lernejan geografian globon, brilantan malforte, tiel grandan, kiel la ŝtono, apud kiu ni estis antaŭ momento.

La globo malrapide turniĝadis, montrante diversajn landojn. Jen la azia kontinento kun la malgranda duoninsulo Eŭropo; jen Afriko, ambaŭ Amerikoj...

Rigardinte pli atente, mi rimarkis sur la kontinento tiajn samajn makulojn grizajn, cindrokolorajn, verdajn, flavajn kaj flavruĝajn, kiajn mi vidis sur la ŝtono. Ili konsistis el multaj malgrandaj punktetoj, ŝajne senmovaj, sed efektive moviĝantaj tre maldiligente: unuopa punkto ŝoviĝadis antaŭen ne pli multe ol duminutan arkon en daŭro de unu horo, kaj ne rektalinie, sed kvazaŭ turniĝante ĉirkaŭ sia centro de movado.

La punktoj kuniĝadis, disiĝadis, pereadis, aperadis sur la

supraĵo de l'globo; sed ĉiuj tiuj aperoj ne estis speciale rimarkindaj. Gravan karakteron havis la movoj de l'tutaj makuloj, kiuj pligrandiĝadis, kreskadis, aperadis sur novaj lokoj, miksiĝadis reciproke aŭ forpuŝadis unu la alian el la okupataj postenoj.

La globo senĉese turniĝadis kaj ŝajnis al mi, ke ĝi faris centojn da miloj da turniĝoj.

— „Ĉu tio ĉi estas la historio de la homaro?“ mi demandis la botanikiston, starantan apud mi.

Li jese balancis la kapon.

— „Bone — sed kie estas la artoj, la scienco?“

Li malgaje ekridetis.

— „Kie estas la konscio, la amo, la malamo, la deziroj?“

— „Ha, ha, ha! . . . ,“ ridis li mallaŭte.

— „Unuvorte: kie estas la homaj animoj kaj koroj?“

— „Ha, ha, ha! . . . “

Lia konduto indignigis min.

— „Kiu vi estas? . . . ,“ demandis mi.

En tiu ĉi momento mi ree troviĝis en la ĝardeno, apud la ŝtono, kies neregulaj makuloj baniĝis en la briloj de la luno.

Mia kunulo malaperis, sed mi rekonis lin pro liaj mokado kaj melankolio.

ĈU ŜI AMAS AŬ NE AMAS?! . . .

Foje mi renkontis nokte sur Luterana Placo mian amikon Karlo. Kun alte levita kapo li strange, senorde vagis tie. Li kuris zigzage, haltis, iris flanken, malantaŭen, marŝis sur la herbo kaj tuŝegis la junajn arbojn.

Ŝajnis al mi, ke li havas sekiĝintajn lipojn kaj malsane ruĝajn vangojn.

B. PRUS

Li ne tuj rekonis min kaj komencis paroli kun febra rapido:

„Vi ridas? Mi scias, ke vi trovas min freneza. Tamen mi ne ŝanĝus mian frenezon por via filozofa trankvilo. Indiferentaj estas por mi viaj grandaj demandoj! . . . La amo — jen estas demando . . .”

„Ĉu vi atendas iun?”

„Kompreneble!” respondis li per senbezone aroganta voĉo. „Ĉu vi pensas, ke mi tion malkonfesos? Tute ne. Mi eĉ diros al vi, ke mi pasigas ĉi tie tutajn vesperojn kaj mi estas feliĉa, se post semajna vagado mi renkontos kaj rigardos ŝin — nur dum kelke da minutoj.”

„Tio estas en ĉiu okazo iom unutona.”

„Mi tion diversigas: iafoje mi pensas, ke ŝi jam amas min, iafoje mi divenas, ĉu ŝi min amas? Aŭ mi aranĝas ludon por antaŭvidi la sorton kaj irante de unu rando de l'placo al la alia mi kalkulas la paŝojn: „Ŝi amas” — „ŝi ne amas” — „ŝi amas” — „ŝi ne amas” . . . Sed hodiaŭ mi elpensis ludon pli konvenan por mi. Mi elektas sur la ĉielo stelon kaj poste sur la placo mi serĉas punkton, de kiu mi povus vidi ĝin ĝuste super la pinto de l'preĝeja kupolo. Se mi tuj trovas tian punkton, kaj mia stelo ekbrilas super la kruco, tio ĉi signifas: „ŝi amas” . . .

„Ĉu vi ofte trafas?”

„Sufiĉe . . . kaj tio neesprimeble ĝojigas min.”

„Bonan nokton!” mi diris.

„Ho!” murmuretis li, tirante mian manon, „vin mirigas, ke ekzistas homo, kiu kuraĝas laŭte diri, ke li amas kaj kiel li amas . . .”

Foririnte de kelke da paŝoj, mi haltis ĉe la trotuaro, kaj mia amiko ree komencis sian ludon, ŝanceliĝante kvazaŭ ebria.

Sur la kurbiĝo de l'voĵeto, preter la enamiĝinto, du ombroj

B. PRUS

pasis. La paro kaj la solulo ne rimarkis unu la alian, ĉar li seninterrompe observis la stelojn, kaj ili vive parolis. Ili iris brakon ĉe brako, malrapide kaj tiel proksime unu ĉe l'altra, ke ili formis kvazaŭ unu estaĵon. La virino klinis la kapon al la ŝultro de l'viro, kaj li — ŝajnis al mi — premis ŝian maneton.

Kiam ili proksimiĝis al la trotuaro, la lumo de la lanterno falis sur ilin. La virino estis ŝi, la viro — alia mia amiko Jozefo.

Ili rapide salutis min por plej baldaŭ liberiĝi de mi. Nur ŝi nerve premis mian manon kaj, fiksante sian rigardon sur miaj okulvitroj, diris mallaŭte:

„Mi esperas, ke Karlo ne aŭdos pri tio eĉ unu vorton...”

Kaj ili foriris, sed ŝi ankoraŭ unu fojon rigardis min minace kaj aldonis per voĉo, kiu similis la murmureton de kolombaj flugiloj:

„Alie mi estos tre kolera!”

Mi estas certa, ke en tiu ĉi momento mia amiko Karlo vidis la stelon ĝuste super la kupola pinto...

EL LA LEGENDOJ DE ANTIKVA EGIPTO

Rigardu, kiel vantaj estas la homaj espero kaj kompare kun la sorto de l' mondo, kiel kadukaj kompare kun la dekretoj, kiujn Eternulo skribis sur la ĉielo per fajraj signoj!...

Centjara Ramzes, la potenca estro de Egipto, agoniis. Sur la bruston de l'potenculo, kies voĉo dum duono da jarcento tremigis milionojn, sufoka fantomo falis kaj trinkis saĝon el lia koro, forton el lia ŝultro, eĉ konscion el lia cerbo. Kiel faligita cedro, kuŝis la granda faraono sur peltito de hinda tigro, kovrinte la piedojn per triumfa mantelo de etiopa reĝo.

B. PRUS

Severa eĉ por si mem, li alvokis plej saĝan kuraciston el la sanktejo en Karnako kaj diris:

„Mi scias, ke vi konas fortegajn rimedojn, kiuj aŭ mortigas, aŭ tuj resanigas. Preparu por mi unu el ili, konforman al mia malsano, kaj ĝi iel finiĝu . . .”

La kuracisto ŝanceliĝis.

„Pripensu, Ramzes,” murmuretis li, „ke de l' tempo, kiam vi malsupreniris de l' alta ĉielo, Nilo jam centfoje superakvis la landon; ĉu mi povas doni al vi sanigilon, malcertan eĉ por la plej juna el viaj batalistoj?

Ramzes sidiĝis sur la lito.

„Kredeble mi estas tre malsana,” ekkriis li, „se vi, pastro, kuraĝas konsili min! Silentu kaj plenumu, kion mi ordonis. Vivas ja Horus, mia tridekjara nepo kaj posteulo. Egipto ne povas havi estron, al kiu ne eble estas sidi sur milita veturilo kaj porti ponardegon.”

Kiam la pastro per tremanta mano donis al Ramzes la sanigilon, la faraono eltrinkis ĝin, kiel soifanto trinkas glason da akvo; poste li alvokis la plej gloran astrologon el Tebo kaj ordonis malkaŝe rakonti, kion montras la steloj.

„Saturno kuniĝis kun la luno,” respondis la saĝulo, „tio ĉi antaŭdiras la morton de ano de via dinastio, ho Ramzes! Vi trinkis hodiaŭ la sanigilon; vi faris malbone, ĉar la homaj intencoj estas kadukaj kompare kun la dekretoj, kiujn Eternulo skribas sur la ĉielo.

„La steloj do antaŭdiris mian morton,” reparolis Ramzes, „kiam ĝi okazos?” demandis li la kuraciston.

„Antaŭ la leviĝo de l' suno, Ramzes, aŭ vi estos sana, kiel rinocero, aŭ via sankta ringo aperos sur la mano de Horus.”

„Konduku,” diris Ramzes per mallaŭtiĝanta voĉo, „Horus-on en la ĉambregon de faraonoj; li atendu tie miajn lastajn vortojn kaj la ringon, por ke la estrado ne ĉesu eĉ unu momenton.”

Ekploris Horus (li havis koron plenan de kompato) pri la proksima morto de l' avo; sed, ĉar la regado ne povis interrompiĝi, li iris en la ĉambregon de la faraonoj, ĉirkaŭita de granda aro da servistoj.

Li sidiĝis sur la balkono, kies marmoraj ŝtupoj malsupreniris ĝis la rivero, kaj plena de nedifinebla malĝojo, li rigardis la ĉirkaŭaĵon.

La luno, apud kiu bruletis funebra Saturno, oris la akvon de Nilo, pentris sur la herbejoj kaj ĝardenoj ombrojn de l' grandegaj piramidoj kaj lumigis la tutan valon sur spaco da kelkaj mejloj. Malgraŭ la malfrua nokto, en la domoj kaj palacoj la lampoj brulis, kaj la loĝantaro eliris el la domoj sub la liberan ĉielon. Sur Nilo ŝipoj naĝis amase, kiel en festa tago; en la palmaj arbaroj, sur la bazaro kaj stratoj, apud la bordoj de l' akvo kaj ĉe la palaco de Ramzes nekalkulebla popolamaso moviĝis kiel ondo. Malgraŭ tio ĉi la silento estis tia, ke la murmureto de l' akva kano kaj la ĝema kriego de la ĉasantaj hienoj alflugis ĝis Horus.

„Kial ili kunvenas?“ demandis Horus korteganon, montrante la nemezureblan maron da homaj kapoj.

„Ili deziras saluti vin, sinjoro, kiel la novan faraonon, kaj aŭdi el via buŝo pri la favoroj, kiujn vi intencas donaci al ili.“

En ĉi tiu momento sento de fiereco ekbatis la koron de l' princo, kiel alkuranta maro batas krutan bordon.

„Kaj tiuj lumoj kion signifas?“ daŭrigis Horus la demandojn.

„La pastroj iras al la tombo de via patrino, Zeforo, por transporti ŝian korpon en la faraonajn katakombojn.“

En la koro de Horus ree naskiĝis kompato por la patrino, kies korpon la severa Ramzes enterigis inter sklavoj pro ŝia protektemo por ili.

„Mi aŭdas ĉevalajn blekojn,“ diris Horus aŭskultante

B. PRUS

„kiu elveturas en ĉi tiu horo?”

„La kanceliero sendas kurierojn al via instruisto Jetron.”

Horus ekĝemis, rememorinte pri sia amata amiko, kiun Ramzes ekzilis el la lando, ĉar li inokulis en la animo de l' nepo kaj posteulo la abomenon al la milito kaj la kompaton al la premata popolo.

Kaj tiu lumeto post Nilo?”

„Ĝi estas la saluto,” rediris la kortegano, „de via fidela Bereniko el la monaĥeja malliberejo. La pastrestro jam sendis por ŝi faraonan ŝipon; kiam la sankta ringo ekbrilos sur via mano, la multepeza monaĥeja pordo malfermiĝos kaj via sopiranta amatino revenos al vi.

Aŭdinte ĉi tiujn vortojn, Horus ne demandis plu; li ek-silentis kaj kovris la okulojn per la mano.

Subite li ekriis pro doloro.

„Kio okazis, Horus?”

„Abelo pikis mian piedon,” rediris la paliĝinta princo.

En la verdeta lumo de la luno la kortegano esploris lian piedon.

„Danku Oziris-on,” li diris, „ke ĝi ne estis araneo, ĉar ĝia veneno en ĉi tiu horo estas mortiga.”

Ho, kiel kadukaj estas la homaj esperoj kompare kun neforigeblaj dekretoj!

En ĉi tiu momento la militistestro eniris kaj salutinte Horus-on, diris:

„Granda Ramzes, sentante, ke lia korpo jam malvarmiĝas, sendis min al vi kun la ordono: „Iru al Horus, ĉar baldaŭ mi mortos, kaj plenumu lian volon, kiel vi plenumadis la mian. Eĉ se li ordonus al vi cedi Supran Egipton al etiopoj kaj fari kun ĉi tiuj malamikoj fratan ligon, obeu, kiam vi ekvidos sur lia mano mian ringon; ĉar per la buŝo de l' estroj Oziris parolas.”

„Mi ne donos Egipton al etiopoj,” la princo diris, „sed

B. PRUS

mi paciĝos kun ili, ĉar domaĝo estas verŝi la sangon de mia popolo; skribu tuj la ordonon kaj preparu kurierojn: kiam la unuaj fajroj ekbrilos por honori min, ili kuru en la landon de l' tagmeza suno kaj portu la favoron al la etiopoj. Skribu ankoraŭ unu ordonon: sur la batala kampo neniam oni elŝiru al la militkaptitoj la langon el la buŝo. Tiel mi diris . . ."

La militestro ĵetis sin teren kaj foriris por skribi la ordonojn; la princo ree postulis, ke la kortegano esploru lian vundon, ĉar li sentis grandan doloron.

„Via piedo iom ŝvelis, Horus," diris la kortegano. „Kio fariĝus, se, anstataŭ abelo, vin estus pikinta araneo! . . ."

Nun la kanceliero eniris en la ĉambregon kaj, kliniĝinte antaŭ la princo, diris:

„Potenca Ramzes, sentante, ke lia vidado jam mallumiĝas, sendis min al vi kun la ordono: „Iru al Horus kaj blinde plenumu lian volon. Eĉ se li ordonus al vi liberigi la sklavojn de l' katenoj kaj donaci al la popolo ĉiujn kampojn, vi faros tion, kiam vi ekvidos sur lia mano mian sanktan ringon, ĉar per la buŝo de l'estroj Oziriso parolas."

„Tiel malproksimen mia koro ne celas," diris Horus. „Sed tuj skribu ordonon: la lupagoj kaj impostoj estos duone malpligrandigitaj kaj la sklavoj havos tri liberajn tagojn en la semajno kaj sen juĝo neniam estos batataj per la bastono. Skribu ankaŭ ordonon, revokantan el la ekzilo Ĵetron-on, kiu estas la plej saĝa kaj nobla el egiptanoj. Tiel mi diris . . ."

La kanceliero ne havis la tempon por foriri por skribi la ordonojn, kiam eniris la pastrestro.

„Ho, Horus," diris li, „tre baldaŭ granda Ramzes foriros en la regnon de l' ombroj kaj Oziris metos lian koron sur la seĝeraran pesilon. Kaj kiam la sankta ringo de l' faraonoj ekbrilos sur via mano, ordonu, mi obeos vin, eĉ se vi deziros renversi la miraklan sanktejon de Amon, ĉar per la buŝo de l'estroj senmorta Oziriso parolas."

B. PRUS

„Mi ne detruos,” rediris Horus, „sed konstruos novajn sanktejojn kaj pligrandigos la pastrajn trezorojn. Mi nur postulas, ke vi skribu ordonon pri la solena transporto de l' korpo de mia patrino Zeforo en la katakombojn kaj alian ordonon pri la liberigo de amata Bereniko el la monaĥeja malliberejo. Tiel mi diris . . .”

„Saĝe vi komencas,” rediris la pastrestro. „Ĉio jam estas preparita por plenumi viajn postulojn, kaj mi tuj skribos la ordonojn; kiam vi tuŝos ilin per la faraona ringo, mi eklumigos ĉi tiun lampon, por ke ĝi anoncu la favoron al la popolo, la liberon kaj amon al via Bereniko.

Eniris la plej saĝa kuracisto el Karnako.

„Horus,” diris li, „via paleco ne mirigas min, ĉar Ramzes, via avo, jam mortas. La sanigilo estis tro forta por li, por ĉi tiu granda potenculo. Nur la anstataŭulo de l' pastrestro restis ĉe li; kiam la faraono estos mortinta, li demetos la sanktan ringon de lia mano kaj alportos ĝin al vi, kiel signon de nelimigebla potenco. Sed vi paliĝas pli kaj pli forte, Horus . . .?” aldonis li.

„Esploru mian piedon,” ekĝemis Horus kaj falis sur oran seĝon, sur kiu akcipitraj kapoj estis skulptitaj.

La kuracisto ekgenuis, esploris la piedon kaj ekstremis pro teruro.

„Horus,” murmuretis li, „vin pikis tre venena araneo.”

„Ĉu mi devas morti? . . . En tia momento? . . .” demandis Horus per voĉo preskaŭ neaŭdebla.

Poste li aldonis:

„Kiam ĝi fariĝos? . . . Diru la veron . . .”

„Antaŭ ol la luno kaŝiĝos post tiun ĉi palmon . . .”

„Kaj Ramzes? Ĉu li ankoraŭ longe vivos? . . .”

„Kiu povas scii? Eble oni jam portas al vi lian ringon . . .”

En ĉi tiu momento la ministroj eniris kun la pretaj ordonoj.

„Kanceliero!” ekkriis Horus, kaptante lian manon, „ĉu

vi plenumos miajn ordonojn, se mi tuj mortos?"

„Vivu, ho Horus, ĝis la aĝo de via avo!" rediris la kanceliero. „Sed eĉ se vi ekstaros antaŭ la juĝo de Oziris tuj post la morto de Ramzes, ĉiu via ordono estos plenumita, se ĝi antaŭe estos tuŝita per la sankta faraona ringo.

„Per la ringo!" ripetis Horus, „sed kie ĝi estas? ..."

„Kortegano diris al mi," murmuretis la militistestro, „ke granda Ramzes spiras jam la lastan spiron.

„Mi sendis al mia anstataŭulo," aldonis la pastrestro, „por ke li demetu la ringon tuj, kiam la koro de Ramzes ĉesos bati.

„Mi dankas vin!" diris Horus. „Domaĝo estas ... ho, kia domaĝo ... Sed mi mortos ne tuta. Post mi restos benoj, trankvilo kaj feliĉo de l' popolo kaj ... mia Bereniko estos libera ... Ĉu longe, ankoraŭ? ..." demandis li la kuraciston.

„La morto estas de vi en interspaco de mil paŝoj de militista marŝado," malĝoje respondis la kuracisto.

„Ĉu vi ne aŭdas, neniuj iras de tie? ..."

Silento.

La luno proksimiĝis al la palmo kaj tuŝis jam ĝiajn unuajn foliojn. La malgrandaj eroj mallaŭte murmuretis en la sablohorloĝoj.

„Malproksime? ..." demandis Horus.

„Okcent paŝoj," reparolis la kuracisto; „mi ne scias, Horus, ĉu vi havos sufiĉe da tempo por tuŝi ĉiujn ordonojn per la sankta ringo, eĉ se oni tuj alportos ĝin ..."

„Donu al mi la ordonojn," diris la princo, aŭskultante, ĉu iu jam kuras el la ĉambroj de Ramzes, „kaj vi pastro," li turnis sin al la kuracisto, „diru, kiom da vivo restas al mi, por ke mi povu sankcii almenaŭ la plej karajn ordonojn."

„Sescent paŝoj," murmuretis la kuracisto.

La ordono pri la malpligrandigo de l' impostoj al la popolo

kaj de la laboro al la sklavoj elfalis el la manoj de Horus teren.

„Kvincent . . .”

La ordono pri la paco kun etiopoj deglitis de la genuoj de l' princo.

„Ĉu jam iras iu . . .”

„Kvarcent . . .”

Horus ekmeditis kaj . . . la ordono pri la transporto de l'korpo de Zeforo falis teren.

„Tricent . . .”

Sama estis la sorto de l' ordono pri la revoko de Jetron el la ekzilo.

„Ducent . . .”

La lipoj de Horus bluiĝis. Per kuntiriĝinta mano li ĵetis teren la ordonon pri la neelŝirado de la langoj al la militkaptitoj, kaj li restigis nur . . . la ordonon pri la liberigo de Bereniko.

„Cent . . .”

En terura silento oni ekaŭdis frapadon de sandaloj. En la ĉambregon enkuris la anstataŭulo de l' pastrestro. Horus etendis la manon.

„Miraklo! . . .” ekkriis la veninto. „Granda Ramzes resaniĝis . . . Li vigle leviĝis el la lito kaj intencas matene ĉasi leonojn. Vin, Horus, li favore invitas akompani lin . . .”

Horus ekrigardis per estingiĝanta okulo post Nilon, kie lumo en la malliberejo de Bereniko brilis, kaj du larmoj, sangaj larmoj ruliĝis sur lia vizaĝo.

„Vi ne respondis, Horus? . . .” demandis la miranta sendito de Ramzes.

„Ĉu vi ne vidas, ke li mortis? . . .” murmuretis la plej saĝa kuracisto el Karnako.

. . . Vantaj estas la homaj espero kaj kompare kun la dekretoj, kiujn Eternulo skribas sur la ĉielo per fajraj signoj! . . .



6,00

Książnica Podlaska
im. Ł. Górnickiego w Białymstoku



KP-F14-0000967